2a-Jaro, Numero 1 • Dumonata Ja[illegible]26

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht
Mariannenstrasse 22, I.
Leipzig-Neustadt (Germ.)
Poŝtĉeka
numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sujadinova*, 3 Fonthill Road, *London N 4* (Anglio).
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## LA NOVA JARO

*Al ĉiuj niaj membroj ni deziras feliĉan kaj prosperan novjaron.*

Konsiderante, kion atingis aro de aktivuloj de nia Ligo, dum tia nelonga ekzisto, ni estas fieraj. Sen mono, sen scio, sen sperto, ni eliris en la maron de superstiĉo kaj antaŭjuĝo por ponti la homojn kun libera penso. La plej multo de liberpensuloj kaj niaj membroj pensas, ke jam ne necesas ke ili plu klopodu, ĉar fortoj, kiuj nun movas la vivon, forbalaos el ekzisto la organizitan religion. Same pensis edukita Romano en la unua jarcento de kristanismo. Ĉu li povis imagi, ke kolekto de plej sensencaj superstiĉoj formos poste la nunan kristanismon, kaj ke ĝi povas minaci la civilizon pri kiu li estis fiera. Sed venis tempo kiam la roma civilizo troviĝis en rubaĵujo, kaj la superstiĉo degradis intelekton. Same okazis en Hispanio, kie la malalta kristana kulturo inundis la altan maŭran kulturon kaj ekstermis ĉiun postsignon de ĝi ĝis hodiaŭ. Ne dormu. Intelekto hodiaŭ denove estas minacata de malalta kristana kulturo. Hodiaŭ la plej noblaj homoj kaj altaj intelektoj estas ekster eklezioj, nur mezgraduloj restas en ili. Ĉi tiuj mezuloj patronas diversajn religiajn fakirojn kaj nesciajn trompulojn. Ni estas nun en pozicio paralela al Romo en tagoj de ĝia velko. La katolikoj per sia unga mano (g)rabas ĉie la influajn poziciojn. La kristanoj enŝoviĝas en la lernejojn kaj kaptas la cerbojn de estonteco. La amaso nescia estas superstiĉa, kaj la kristanoj tion ekspluatos en sia intereso.

Ĉe flanko de liberpensuloj ni vidas indiferentecon, kie devus esti batalo por protekti nian heredaĵon. Indiferenteco estas la plej granda malamiko, kiun la idealistoj renkontas sur sia vojo. Sed ĝi estas la plej bona amiko de obskurantismo.

Viroj kaj virinoj en batalkampon! Por triumfo de ideoj. Ĉu vi jam ne estas standardportantoj da niaj martiroj por triumfo de intelekto. Niaj ĵurnaloj, kiuj staras por ideoj, cirkulas anemie. La ĵurnaloj kun krimoj, amskandaloj, kristanaj mortigantoj, plej naŭzaj rakontoj, havas milionan legantaron. Tamen ideoj estas potenco. Sur tiuj, kiuj komprenas tion, kuŝas la respondeco fari la mondon alia.


**Pagu vian Kotizajon!**

Neatento estas danĝera. Laŭ nia komputo estas kelkaj miloj da liberpensuloj-Esperantistoj. Se ili ĉiuj aliĝus al la ligo, kaj ĉiu helpus iomete puŝi la aferon, la rado de intelekto rulus tra la kristana pagana mondo.

Ni esperas, ke en la nova jaro vi ne preteriros la superstiĉojn ridetante. Oni ne povas mortigi superstiĉojn per preteriro aŭ rideto. Ni devas per unigita fronto antaŭeniri al triumfo. Ni iros pli rapide antaŭen, se ĉiu el ni faros almenaŭ ion. Ankoraŭ unu jaro dronis en senfunda pasinteco. Ni ĝoju pri venkoj faritaj kaj lecionoj lernitaj. Pasinteco estas for, estanteco fluas for, restas nur estonteco, kiu, certe, estas nia.

Ni marŝis antaŭen kun brulo en la koro, ne por la fiŝetoj, kiujn ni kaptis, sed por grandegaj fiŝoj, kiujn ni esperis kapti. Tiu ne efektivigita triumfo pelas nin antaŭen kun flama juna koro por kapti ĝin.

*Redakcio*



Ilustrajo kun permeso afabla de "SUNDAY WORKER"

WILLIAM MONTGOMERY BROWN, episkopo de Arkansas, Ameriko, ekskomunikita pro herezo. Li protestas kontraŭ la ceremonio senrobigi lin publike en la preĝejo de St. Paŭlo. "Nur perforte ili senrobigos min", li deklaris.

## Mia Herezo

De Episkopo *Montgomery Brown*
(Tre mallongigita pro manko de spaco)

La kvin episkopojn, juĝantojn, li alparolis jene: *Al Konsilantaro de Episkopoj de la Protestanta Episkopala Eklezio en Usono — saluton.*

Ĉi tiu letero temas pri mia herezo kaj la via kaj pri via eraro tiri min pro mia al la tribunalo.

La herezo pro kiu oni juĝas min estas resumita en la vortoj: *Forpelu diojn el la ĉielo kaj la kapitalistojn de la tero;* — moto, kiu troviĝas sur mia libro „Komunismo kaj Kristanismo".

Mia herezo estas pro mia natura vidpunkto ke homo havas en si ĉiujn potencojn necesaj por plej utile uzi sian vivon.

Kiel homo devas nutri, vesti kaj hejmigi sian korpon sen helpo de iu konscia aŭ persona dio, tiel same devas li per

Österreichische Nationalbibliothek Digitale Services

siaj propraj penoj, sen iu helpo, per propra sperto, observo, esploro kaj rezonado grimpi ĉiun ŝtupon de la longa ŝtuparo el sia animala stato ĝis la humanismo.

Mia herezo estas en tio, ke mi elĵetas el la teologio la tradician supernaturalismon kaj replenigas ĝin per natura scienco. Mi nur liberigas la testamentojn de Moseismo kaj Paŭlismo kaj anstataŭigas ilin per Darvinismo kaj Marksismo.

Tion faras ĉiuj miaj fratoj. Ili same elĵetas el la biblio ĝian Ptolemean astronomion kaj anstataŭigas ĝin per tiu de Kopernik; malgraŭ tio, la nova astronomio igis paradizon neebla super la tero aŭ inferon sub ĝi.

Mian korpon mi heredis de miaj animalaj antaŭuloj, kion pruvas la 207 restantaj senutilaj organoj. El tiuj 12 estis tute neutilaj al iu miaj plej antikvaj prauloj jam depost fiŝa stadio. Ĉiu fiziologo dirus al mi, ke mi estus stulta, se mi penus liberigi mian korpon de tiu ĉi heredaĵo.

Mian animon mi heredis de miaj civilizitaj, barbaraj, sovaĝaj kaj animalaj prapatroj, kion pruvas la necivilizataj kaj malhumanaj emoj kaj instinktoj. Ĉiu psikologo dirus al mi, ke mi estas stulta, se mi penus liberigi mian animon de ĉi heredaĵo.

Ni havas muzeojn en kiuj la korpaj restaĵoj de niaj animalaj prapatroj estas gardataj. Ili estas tre interesaj kaj la mondo ne volonte ilin fordonos . . . . . .

Ni havas preĝejojn, kiuj estas, tiel diri, muzeoj en kiuj la psikaj restaĵoj de niaj homaj, barbaraj kaj sovaĝaj prapatroj estas gardataj. Ili estas treege interesaj kaj la mondo ne volonte ilin fordonos.

Ĉio estas morta en ambaŭ tiuj muzeoj krom la homoj; kaj la plej morta afero en ambaŭ estas la viro kaj la virino, kiuj en la muzeo de la prapatraj animoj atendas de sia senviva dio iun supernaturan helpon.

Venos tempo kiam homoj iros al preĝejo por kio kelkaj (mi inter ili) nuntempe tien iras, nome, — lerni pri evoluo de homa animo, ne por adori; kaj ankaŭ pro la inspiro de ĝia dramo, arto kaj muziko.

La tri superstiĉoj de la elaĉeta religio estas: la sun-mito, la spirit-mito kaj la falusa-mito[1]).

Kiel la vegetala kaj la animala vivantajo interrilatas, la malaltaj estante parencoj de la altaj, same la falusa-mito esta ido de la sun-mito kaj la nepo de la fantom-mito.

En antikveco, timo kaj nescio, parencoj de fantazio kaj superstiĉoj, enloĝigis ĉion sur la tero kaj en la ĉielo per fantomoj aŭ senmortaj animoj; sed nuna scienco pruvas, ke ne estas tiaj diaj aŭ homaj, anĝelaj aŭ diablaj fantomoj.

La kompare nova rapide kreskanta scienco, kiu elektis por sia kampo la esploron de la origino kaj kresko de religiaj kredoj, institucioj, tradicioj kaj literaturo kolektis monton da nerenverseblaj faktoj. Sur ili mi staras. De tiu starloko mi vidas klare, kiel dum tago, ke nenio estas unika pri kristana dio, eklezio pastreco, sakramentoj aŭ biblio.

Ĉiuj malnovaj supernaturaj ideoj pri la mondo, pri ĉio religia estas sur sojlo de ŝanĝo.

En Kristanismo estos transmeto de ĝia kredo en konscia persono *patro-filo-spirito-*(fantazio) kaj *Ĉiela Paradizo* sur novan bazon de scio, al senkonscia, senpersona *Materio-Forto-Movo*, kio estas la realo, la naturo. Obeo al la leĝoj per kiuj ĝi funkcias estas la sola kondiĉo por havi paradizon, ĉi tie sur la tero.

Moralo estas afero de konscia aŭ nekonscia influo super aliaj, kaj ĝi devas esti bona kaj ne malbona; vera — ne mensoga.

Religio, alie moralo, estas afero grava; ĝia celo estu plej utile uzi la vivon dum oni estas sur la tero; konservi ĝin tiel longe kaj tiel feliĉe kiom eble. Ĉi tiu celo havas neniun rilaton al iu alia vivo, en iu alia loko aŭ iam estonte.

Atingo de ĉi tio dependas ne de iu speciala revelacio de konscia *patro-filo-spirito*-dio, sed de scio, vivo kaj instruo pri leĝoj, kiuj klarigas la funkciadon de *ne*konscia *ne*persona *materio-forto-movo*-naturo. Scii, vivi kaj instrui la leĝojn, per kiuj oni povas havigi plenan vivon. ĉion en ĝi, en plej granda mezuro, jen la tuta religio, moralo kaj senmorteco, la plej ebla sankteco aŭ paradizo.

Laŭ anglikana kredo la kristana pastreco estas heredaĵo rekte de jesuaj apostoloj, longa kaj seninterrompa serio de konsekroj.

Laŭ scienco la kristana pastreco de anglikana eklezio estas same kiel la pastreco de ĉiuj aliaj kristanaj eklezioj, kiel la pastreco de eklezio de aliaj supernaturaj religioj; tio estas, heredaĵo tra longaj kaj ne rompitaj serioj de evoluoj, komencanta per la sovaĝa kuracsorĉisto kaj pluvpastro de niaj barbaraj kaj sovaĝaj antaŭuloj.

La ĉefo de la anglikana eklezio, la ĉefepiskopo de Canterbury (Kanterberi), la plej Respektinda kaj Ĝuste Honorat-a D-ro Davidson, kaj la ĉefo de anglo-amerika eklezio episkopo de Bethlehem, la plej Ĝuste Honorata D-ro Talbot, laŭ ilia pastro ordo: Ekscelenco, Aŭtoritato kaj Efikeco, estas nur grandaj kuracsorĉistoj kaj pluvpastroj, plenumantaj sian pastran oficon en belaj katedraloj, vestitaj en luksaj silkaj kaj purpuraj roboj kvazaŭ reprezentantoj de ĉiela dio. Al la mondo ilia servo estas ne pli utila ol tiu de iliaj antaŭuloj plumitaj kaj kolorigitaj. Sen iu valoro.

Se la biblio devas esti akceptita laŭvorte, mi estas blankhara herezulo sen eĉ unu ordodoksa ruĝa haro. Kaj en nia episkoparo ĉiuj tiel supozataj ruĝharuloj fratoj miaj, havas multajn blankajn harojn inter la ruĝaj.

(Sekvas tekstoj el Biblio kaj leĝaro, kiuj pruvas lian argumenton.)

Neniu episkopo povas esti plene mezurata per ĉi tiu mezurilo. Do, ĉiuj estas herezuloj. Ankaŭ mi ne devas esti ekskomunikata por miaj herezoj.

Mi ne renuncas iun doktrinon, se mi povas interpreti ĝin simbole, parabole aŭ alegorie.

La granda sciencisto kaj pensulo, la mortinta D-ro Paŭlo Carus, kvankam, kiel mi, materialisto, same kiel mi ne estas senreligiulo kaj ne senreligia. Mi povas subskribi kion li skribis en sia libro:

— Libera penso rifuzas rekogni specialan revelacion, ĉar ĝi kredas je universala revelacio de Vero.

— Ĉar dion oni elpensis kiel iluziston, faranta miraklojn kaj ĉar pastraro ree kaj ree postulas, ke nur tiuspeca dio estu nomata dio, la Libera Penso estas pelata al neado de teismo.

— Libera Penso ne estas simple neado de kredo, ĝi ne penas ŝanĝi religion aŭ la religian aŭtoritaton. *Libera Penso* estas en si mem forta potenca kredo. Ĝi estas kredo en Vero.

Laŭ kristanismo je la Sankta Vendredo oni rememoras la grandan tragedion, kiam estis oferita per krucumo la Savanto-dio por tiamaniere elaĉeti la homaron de dio-Ruiniganto kaj pacigi la dion-Kreanton, pro malobeo de unuaj gepatroj de la homaro.

Se laŭvorte preni la biblion, la tuta afero estas malaltiga superstiĉo.

Mia kredo en ĉi tiu tragedio kiel simbolismo estas pli granda.

La Beelzebubo en ĉi mondo, la patro de diabloj, estas la ekonomia sistemo, kiu dum multaj longaj epokoj dividis la homaron en du kontrastaj klasoj, la posedanta klaso, ne granda kaj ĉiam pli malgrandiĝanta, kaj la laboranta sklava klaso, la granda kaj ĉiam pligrandiĝanta.

La viktimoj de nehistoria krucumo estas simboloj de historiaj viktimoj, kiuj ĉiam pendas sur krucoj en ĉiuj kapitalistaj landoj. En la mezo estas Kristo — la Laboro —, la vera savanto-dio de la mondo. Dekstre pendas Libereco kaj maldekstre Scienco, la du rabistoj, kiuj rabos la nescion kaj la superstiĉon. Tiuj estas destinitaj reviviĝi al povo kaj gloro kun Kristo kaj forpeli la kapitalistojn kun ilia infero el la tero kaj la diojn kun ilia paradizo el ĉieloj. Tiamaniere oni kreos senklasan mondon kaj lokon en kiu oni povos vivi, senklasan paradizon anstataŭ la klasa infero.

En nomo de Vero kaj Prudento mi demandas vin, ĉu estas eble al edukita kaj honesta homo esti alia ol revolucia herezulo en religio, se oni postulas de li, ke li kredu en neeblaĵoj pri kreo, falo kaj elaĉeto de homaro, kaj paradizo aŭ infero?

Kaj en la nomo de Vero kaj Prudento mi demandas vin, ĉu estas eble al edukita kaj honesta homo esti alia ol revolucia herezulo en politiko, se oni postulas, ke li kredu en absolute ne ebla doktrino de kapitalismo, ke la posedanta parazita klaso, kvankam faranta nenion utilan, rajtas havi ĉion, kaj la laboranta, ĉion produktanta, klaso havu nenion?

Kun plej bonaj deziroj al ĉiu, mi tutkore via . . . . . .

[1]) Grek. Phallus-vira organo por generi. Simbolo de krea povo de la naturo. Kruco estas la emblemo de kulto "Adorado al Faluso".

## La virgulina nasko

Ĵus pasis kristnaska festo; do, estas la ĝusta momento por diri kelkajn vortojn pri kredoj al miraklaj naskiĝoj en antaŭkristana epoko. En tiu tempo kredo en virgulina nasko estis afero tute ordinara. Ĉiu dio kaj ĉiu heroo naskiĝis de dio kaj iu tera virgulino; same oni kredis, ke la reĝoj estis de dia deveno en antikva tempo. Budha en Hindio, Horuso en Egipto, Konfucio en Ĥinio, Zoroastro en Persio kaj tuta plejado de malpli gravaj herooj de Romo kaj Grekio estis naskitaj de virgulinoj, edzinoj de dio. En la Apokrifo de Nova Testamento unu el fruaj pastroj, Justin Martiro, konsentas kaj asertas ke Bakĥuso kaj Eskulapo estis de virgulina naskiĝo. Per tio li penis pruvi al paganoj, ke se iliaj dioj povis naskiĝi de dio pere de virgulino, same Jesuo povis. En tiu tempo tiuj virguline naskitaj sinjoroj estis afero tre ofta. Kial fari tiom da bruo pri tio, ke ankaŭ Jesuo estis tiel naskita, kiam tio estis afero ordinara? La fama egiptologo Profesoro Samuel Sharpe, en sia „Egipta Mitologio" donas specimenon de egipta desegnaĵo, kiun li interpretas jene. Li diras, ke sur la muroj de Luksor estas desegnitaj tutaj serioj de eventoj, kiuj estas preskaŭ la historio de Jesua naskiĝo. Unu bildo povas esti nomata Anunciacio, Gravediĝo, Naskiĝo kaj Adorado. Unue tie estis la dio Tot, kiu anoncas al la virga reĝino, ke ŝi naskos filon, kiu estos reĝo de la lando. Poste estas dio Knef (kiu similas al Sankta Spirito) kaj Ator, kiuj ambaŭ prenas la reĝinon sub brako kaj metas en ŝian buŝon la simbolon de la vivo, kiu devas esti la vivo de la estonta infano. En sekvanta bildo estas montritaj akuŝistinoj, kiuj klopodas apud ŝi dum ŝi naskas, frotas ŝiajn manojn por malpliigi la doloron. En apuda bildo vartistinoj tenas la infanon Horuso, kiu havas sian fingron en la buŝo. Kaj en la lasta desegnaĵo nombro da pastroj aŭ saĝuloj adorantaj la nov-naskiton. Ĉar ĉi tiu trezoro pri miraklaj naskiĝoj estas kelkaj miloj da jaroj pli antikva ol la evangelia rakonto pri virgulina nasko, ni ne povas "supozi, ke la egiptaj pentristoj prunteprenis tion ĉe kristanoj".

La nekonataj aŭtoroj, kiujn oni nomis Mateo kaj Luko, simple rerakontis la antikvan religian miton por doni gravecon al Jesuo kaj veki intereson. Hodiaŭ, kiam la historio de virgulinaj naskoj estas al ĉiuj konataj, gravas "pripensi, kia estas speco de homa cerbo al kiuj ĉi tiuj fabeloj ŝajnas esti la vero, kaj pri la socia medio, kiu kreas kaj daŭrigas subteni tian menson". Ĉi tie ni havas ŝlosilon al ĉiu kredo en supernaturaj fenomenoj: ili estas rezulto de difektita kaj malsana funkciado de la cerbo.

Jen vorto al kristanoj: Via rakonto pri virgulina nasko estas monstra insulto al homaro. Insulto, ĉar vi sugestas, ke la maniero laŭ kiu via dio dekretis al ni komenci nian vivon en ĉi tiu mondo estas malpura kaj peka. *Leonhard Mason.*

## Kristana Teroro

La katolikaj disĉiploj de Jesuo, por gloro de sia instruisto, revivigas la Mezepokon de murdo kaj fajro.

En Polio, Bavario, Hungario, Rumanio kaj eĉ en Anglio ĉi tiu krima sekto elstreĉas siajn fatalajn ungojn. Sed en Italio ĝi montras sin en tuta kristana belo. Dum la tuta historio ĉi tiuj kristanoj, preparante sin al iu nova fiago grandskala, alprenadis novan nomon. Sub nova nomo la simpluloj ne tiel rapide eltrovos, kiu agas. Ĉi tiun fojon ili portas la nomon "faŝistoj".

Post murdo de Matteotti kaj centoj da laboristoj, ĉi tiuj faŝistoj turnis sin kontraŭ Framasonoj, liberpensula sekto vaste disvastigita en Italio. Dum ĉi tiu jaro la faŝistoj detruis framasonajn loĝiojn en Milano, Venecio, Genoa, Bologna, Turin, Leghorn, Torento, Bari, Perugia kaj la grandan loĝion en Romo.

Je la fino de la kvara semajno de Septembro 1925 en Italio, laŭ raporto el Chiasso, 100 personoj, konataj aŭ suspektataj esti framasonoj, estis bastonitaj sur la stratoj de Florenco antaŭ la okuloj de policanoj.

Sed la plej granda teroro regis en Florenco en Novembro, kie dum unu semajno 18 liberpensuloj estis mortigitaj. Unu estis linĉita sur stratoj kaj la alia mortpafita en sia lito antaŭ la okuloj de sia edzino. 60 butikoj estis bruligitaj. La fajrobrigado kaj la polico staris flanke kaj observadis nur; la revolveroj de faŝistoj direktitaj sur ilin.

Framasonaro estas nun deklarita eksterleĝa kaj la kristanoj povas amuziĝi per ilia vivo kaj posedaĵo kiom al ili tio plaĉas.

Ĉio, kion oni diris pri bolŝevikoj estas pala antaŭ la agoj de romaj kristanoj en la jaroj 1924 kaj 1925. *T. Sujadinova.*

## Potpurio en regno de dio

La "Katolika Eduka Kino Kompanio", Londono, anoncas, ke por la unua fojo en Anglio ĝi per filmoj montros „La historion de Vatikano". Enirprezoj 3 sv. frankoj, 2 sv. frankoj ktp.

Veran historion de Vatikano, ĉu?! Kompreneble katolikoj zorgos, ke la halo estu plena. Ni volas scii ĉu la filmo estas dece aspergita per sankta akvo antaŭ la uzo, kaj ĉu lia sankta moŝto, la Papo, benis ĝin antaŭe.

La direktoroj de la kompanio apartenas al eklezio, kiu ĉiam instruis, ke mensogi pro dio estu konsiderata kiel vero. Kaj ĉi tiu Historio de Vatikano estas unu el tiuj veraj mensogoj. Ĉi tiu kompanio estas la lasta vorto de la antaŭa Romo kaj Ko.

La plej antikva eklezio en komerco.
Vendistoj de kandeloj, portretoj de sanktuloj.
Liverantoj de incenso kaj odoroj.
La solaj veraj kreantoj de misteroj
Specialistoj en kuracado per kredo.
La plej distingaj montristoj de ceremonioj.

Romo kaj Ko. estas ĉefe kaj ĉiam vendistoj. Ili vendas ĉion kaj ĉiun. La plej taŭga enskribo sur ilia nomtabulo devus esti: Vendistoj de kantoj, ĉifonoj kaj mortaĵoj.

Ni kuracas malsanajn animojn — por pago.
La ĉielpordon malfermas — por pago.
Bilditajn korojn, sangon gutantaj
Kaj preĝojn por mortintoj
Ni proponas al vi — — por pago.

Virgulinojn el kreto ni vendas — por pago,
Magiajn lampojn por via sanktejo — por pago.
Vinon sorĉitan en sangon,
Kiu en sankta altaro staris,
Ni ofertas al vi — por pago.

Sanktajn kandelojn ni ofertas al vi — por pago,
Kaj ludilojn, nomataj rozarioj — por pago.
Ostojn kaj krurojn de martiroj
Kaj ungojn tra vitroj
Ni montras al vi kelkfoje — por pago.

Nun ni montras sur skreno — por pago,
"Ruĝajn ĉapelojn" kaj papojn — por pago.
Kvankam sinjoro Kohen diras ne,
Tamen, Romo kaj Ko. historion ni rakontas;
Kaj ni montros al vi tiun mensogon — por pago. *El "Freethinker".*

* * *

Laŭ ordono de papo estis konferenco de katolika eklezio, en kiu estis decidita la speco de robo, kiun katolika virino rajtas porti, kiun — la knabino, kiel longa, kiom dekoltita. Post nelonge ni aŭdos, ke Lia sankta Moŝto, gardanto de la Petra trono, atencos je la vivrimedoj de niaj modgvidantoj, li deklaros sin la ĉefredaktoro de "La Moda ĵurnalo".

Samtempe la meksika ĉefepiskopo minacas ekskomuniki virinojn, kiuj post la unua de Januaro 1926 portos mallongajn harojn.

* *

En Jerusalemo oni komencas proceson kontraŭ mulao (muzulmana pastro), kiu sin okupis per vendado de biletoj por lokoj en paradizo. Loko plej proksima al Mahometo kostis pli.

La afero estis granda sukceso. En nelonga tempo li kolektis 100 000 fundojn. Por liberigi la konscion, parton de la mono mulao disdonis en almozoj al malriĉuloj. Li estus ĝis nun vendanta lok-

ojn por paradizo, sed lia avareco pereigis lin. Li vendis lokon ĉe la dekstra mano de Mahometo al unu komercisto por tre alta sumo. La komercisto mortis kaj nun la parencoj de la mortinto, jam sidanta ĉe la dekstra mano de Mahometo, trovis la kvitancon kaj repostulas pere de la juĝejo ĉi tiun sumon de la mulao. Ĉu juste?

* * *

Jen ekzemplo donita al ni por sekvi: Abrahamo, por esti sata dum malsata jaro, komercis sian edzinon. (Genezo XII. 10—16.)

Al li ne sufiĉis unu edzino, li adultis kun la servantino. (Genezo XVI. 1—4.)

* * *

Loto malvirtis kun propraj filinoj. (Genezo XIX. 30—36.)

Moseo murdis ĉirkaŭ 3000 homojn (Eliro XXXI. 28—32.)

Elia tranĉis la gorĝon al 850 homoj. (Reĝoj XVIII. 19—40.)

Davido aranĝis la morton de Uria por havigi lian edzinon Bat-Ŝeban. (II Samuelo XI) ktp.

* * *

Kiel povas la valora sango de Jesuo elverŝita antaŭ dumil jaroj (kio estas treege duba) forviŝi la pekojn de hodiaŭaj kristanoj.

* * *

Angloj plendas, ke ne estas haveblaj veraj viroj por la eklezio. Kiujn ili havas estas aro elektita el maljunaj sinjorinoj de ambaŭ seksoj.

* * *

1. Unuj estas kristanoj pro kutimo; aliaj timas esti io alia. 2. Kelkaj estas kristanoj pro timo; aliaj ĉar ĝi estas afero enspeza. 3. Kelkaj estas kristanoj senpripense; aliaj ĉar ili ne povas pensi.

* * *

En Arkansas (Usono) d.ro W. T. Carter aperis en la juĝejo kiel atestanto por la ŝtato. Sekvis dialogo inter la advokato por defendo kaj atestanto.

"D.ro Carter, ĉu vi kredas en ekzisto de kristana dio?"

"Ne, mi ne kredas en ekzisto de kristana dio,"

"Ĉu vi kredas en postmorta vivo?"

"Ne."

"Ĉu vi kredas, ke kiam homo mortas, li mortas kiel bovino aŭ animalo?"

"Jes."

"Ĉu vi kredas en Ĉiopovulo?"

"Ne."

Ĉe tiu vorto la juĝisto, L. S. Britt, ordonis ne akcepti la doktoron kiel atestanton, kaj la juĝito, d.ro Berrow, perdis sian proceson. En tiu lando oni preferas falsulon, kiu kredas en dio, al honesta homo kiu ne kredas; kaj de tiu speco konsistas la regno de dio.

* * *

Jam kristanoj nun penas per leteroj al la "Freethinker" pruvi, ke Jesuo Kristo estis fondinto de Liberpenso.

* * *

Dum la paska festo en Romo ĉiu pilgrimanto, kiu grimpis 28 ŝtupojn ĉe la domo de Pontio Pilato, ricevis absolvon de siaj pekoj por 9 jaroj. Naŭfoje 28 estas 252, sekve ĉiu el ĉi tiuj kredantoj havos ne-elĉerpeblan bileton por libera pekado por multaj jaroj eĉ post sia morto. Kion ili faros en ĉielo por elĉerpi ĝin?

* * *

En Kaŭkazio la ĉefmonaĥo de unu monaĥejo pro modo iĝis bolŝeviko. En siaj predikoj li deklaras, ke Jesuo estis la unua komunisto, ke li ankaŭ vokis al ribelo kontraŭ la kapitalo kaj pro tio pereis, ke Kristo estas samideano de Lenin, ktp. Kun burĝoj Jesuo estas kapitalisto, kun militistoj — militisto, kun komunistoj — komunisto. Ĉu estas alia religio pli fleksebla en iu ajn direkto?

* * *

En Abertillery (Britlando) estis fermitaj pro manko de laboro 4 minejoj. La loka eklezia konsilantaro subite eltrovis, ke la distrikto suferas pro malbona ekonomia stato. Do, ili decidis agi. Ili faris "unuigitan kunvenon kaj preĝis".

Ili petis Dion supre esti tiel bona rigardi suben sur ilin kun kompato. Kaj li faris tion; li donis sian unuan kompatan rigardon: 250 viroj en minejo ĉe Arrial Griffin ricevis avizon, ke ili estos maldungitaj. Mi poste aŭdis, ke tiu konsilantaro ne denove organizas preĝkunvenojn.

* * *

Por kompreni la kruelaĵojn de kristanoj en pasinteco kaj hodiaŭ, ni alrigardu la inspiron kiun ili ricevas el la vortoj de ilia propra dio:

...Kiu adoras iun alian dion, krom la Sinjoron, tiu estu tute detruita.

Se via frato, la filo de via patrino, aŭ via filo aŭ via filino, aŭ via propra edzino, aŭ via amiko, kiu estas kiel via propra animo, allogas vin sekrete, dirante, "Ni iru kaj adoru aliajn diojn..." vi ne konsentu kun li, nek aŭskultu al li... nek via okulo havu kompaton al li, nek vi indulgu lin, nek vi ŝirmu lin, sed ja mortigu lin, via mano estu la unua kontraŭ li por mortigi lin, kaj poste la manoj de la tuta popolo. Kaj vi ŝtonumu lin, ke li mortu." Biblio.

Estas vero, ke protestantoj — mem herezuloj — ne punas homon, kiu trovas alian dion, sed ili protektas specialan dion kaj enkarcerigas tiun, kiu sen respekto parolas pri ilia dio aŭ kiu faras karikaturon de li.

* * *

La rusaj kristanoj en Suĥum (Kaŭkazio) uzis novan metodon por bredado. Por ke bovino nepre havu idon, la kristanoj kunligis ŝiajn piedojn, streĉis inter la piedoj lignan stangon, levis ĝin en la aeron kaj kun kanto de himnoj portis ĝin ĉirkaŭ la preĝejo naŭ fojojn. La malfeliĉa bruto dum tiu amuzaĵo rompis al si la kornojn kaj vundis sin.

* * *

La dekalogo 2000 antaŭ k.

La dekalogo kaj multaj el la leĝoj de Moseo estas troveblaj en leĝaro verkita de Ĥamurabi, reĝo de Babilono 2000 jaroj antaŭ k., kaj en aliaj kodoj.

Neniu intelekta homo povas permesi, ke tia antikva aŭtoritato regu lian menson, se li ne volas iĝi sklavo en intelekto.

## Queen Silver

(El artikolo "Rajtoj de Infanoj")

Mi opinias, ke infanoj rajtas kreski liberaj kaj intelektaj, ke ili rajtas disvolvi sian cerbon uzante ĝin, kaj eduki en si senton de sendependeco, estante sendependaj. Mi ankaŭ diras, ke vi povos havi virojn kaj virinojn liberajn nur se vi cedos ankaŭ la rajton al libereco. La indiano volis, ke lia filo estu kuraĝa, tial li neniam punis lin. Li volis ke lia filino estu submetiĝema, tial li eĉ permesis al la filo puni la filineton kiam ajn li sentis deziron al tio.

* * *

La unua afero, kiun patrino ordinare instruas al sia infano, estas timo, timo al io. Longe antaŭ ol infano povas marŝi ĝi timas multajn aferojn. Ĝi neniam povas venki sian timon al fulmo kaj tondro, aŭ al mallumo, aŭ al koboldoj kaj fantomoj kaj demonoj, ĝis ĝi povas rezoni sufiĉe por kompreni ke ĝiaj timoj estas la rezulto de ies nescio. Ofte, la timo metita en la infanon malebligas mensan evoluon ĝis tiu grado ke ĝi difektas ĝian rezonon. La patrino penas igi sian infanon bona, farante ĝin timulo.

La plej granda el ĉiuj timoj en infana menso kutime estas timo antaŭ iu dio. Ĉu la patrino estas kristano, mahomedano, hindo, aŭ zuluo el Afriko, ŝi, certe, instruas al sia infano, ke ekzistas timiga dio. Ŝi ankaŭ instruas al sia infano, ke dio donos premiojn al ĝi, se unue bonaj donacoj aŭ oferoj estas donataj al tiu dio, ĉu sovaĝaj, ĉu civilizitaj kristanaj patrinoj, ili agas same, instruante al siaj etuloj timi koleran dion kaj aĉeti la bonecon de subaĉetebla dio. Neniu patrino iam vidis dion pri kiu ŝi tiom rakontas al sia infano, nek renkontis iun, kiu ĝin vidis. Sed, se la infano dirus, "Patrino, kiel vi scias, ke tio, kion vi diras al mi, estas vero?" ŝia sola respondo devus esti, "Kiam mi estis malgranda, kaj nescia, kaj ne kapablis rezoni, iu parolis al mi pri tiu dio, kaj mi kredis al li, mi ne sciis pli bone. Ĉar nun mi ne scias pli ol mi tiam sciis, mi transdonas al vi kion oni rakontis al mi, kaj mi ne pripensas, ĉu aŭ ĉu ne ili diris al mi la veron."

Neniu infano iam timis dion, aŭ sentis, ke ekzistas ia speco de dia estaĵo ĝis kiam oni rakontis al ĝi tiujn religiajn fe-rakontojn. Mi pensas, ke mi estis ĉirkaŭ kvarjara, kiam iu sinjoro diris al mi, ke la montoj ĉe la fonto de la rivero Misuri, en Montana, kiujn mi en tiu momento rigardis por la unua fojo, estis faritaj de dio. Li simple eksaltis kiam mi diris: "Sinjoro, vi devas esti tre nescia, se vi kredas tion."

* * *

Malgrandaj infanoj ne povas rezoni, sed ili povas amasigi faktojn en siajn cerbojn. Infaneta cerbo estas magazeno en kiun ĝi metas ĉiujn faktojn, ĉiujn mitojn, ĉion bonan kaj malbonan kion ĝi aŭdas aŭ spertas. Ĝi sorbas ĉiujn impresojn, senracie, ne pensante pri la afero, sen ia konscia mensa aŭ korpa peno. Se vi permesas al via infano amasigi multajn mensogojn, fabelojn, sensencaĵon por la menso, vi trovos, ke kiam ĝi komencas konscie studi kaj lerni por si mem, ĝi preferas la neutilan sensencaĵon, per kiu ĝi jam plenigis sian magazenon, al informoj pli seriozaj. Ĝi havos malseriozan menson, kiu ne kapablos serioze studi. Se vi klopodos, ke ĝi ricevu valorajn informojn, se vi protektos ĝin kontraŭ fe-rakontoj, mitoj kaj superstiĉoj ĝis ĝi disvolvos kapablon por rezoni, tiam vi trovos, ke ĝi havas deziron akiri plu de la saĝa scio. Vi devas cedi al viaj infanoj la rajton akiri utilan scion.

* * *

Kiam infana menso estas libera, atendanta ricevi veran scion, komprenu, kiel grave la patrino kaj la instruisto krimas, kiam ili penas plenigi tiun verbon per kvanto da sensencaĵoj. Ofte oni diras, speciale kiam oni parolas pri mi, "Tiu infano ne devus esti permesata tro laborigi la cerbon". Ĉu vi ne komprenas, ke infana cerbo ĉiam laboras, kaj la sola demando estas, ĉu vi devigos vian infanon cerbumi pri io neutila, aŭ ĉu vi lasos al la infano la rajton uzi sian cerbon kaj intelektan energion per aferoj utilaj al ĝi?

* * *

Knabo aŭ knabino kiu estas "bona" preskaŭ ĉiam estas stulta. Mi faras al vi ĉi tiujn paroladojn ĉar neniam en mia tuta vivo mi timis diri al iu kion mi pensas. Mi ne timas esprimi mian opinion pri iu temo, je iu tempo. Mi neniam devis gardi miajn pensojn pro timo, ke iu min punos pro tro da rekteco. Oni neniam instruis al mi respekti la opiniojn de aliaj, nur ĉar ili venis de personoj pli aĝaj ol mi, eĉ ne de parencoj. Mi neniam amikiĝis kun homoj, kiuj pensas, ke hipokriti estas necese, por esti ĝentila. Se mi renkontas homojn, kiuj ofendiĝas je tio, kion mi diras, ĉar mi diras al ili ĝuste kion mi pensas, kaj ili ne ŝatas tion, ili plej komplezas al mi, se ili evitas min. Mi ne ŝatas homojn, kiuj timas ideojn. Mi scias neniun motivon, kial mi ŝajnigu kredon al io kion mi ne kredas. Nur por doni al mi la eblecon kuniĝi kun intelektaj hipokrituloj kun kiuj mi tute ne volas kunesti. Ŝajnas al mi, ke la socio estas bazita sur hipokriteco, kaj ke la dua leciono, kiun infano lernas, post kiam ĝi lernis timi, estas Esti Hipokritulo.

## Statistiko de londona polico pri krimuloj

Dum la jaro 1924 estis registritaj en Londono 770000 krimuloj. Ĉiu krimulo estas membro de iu kristana sekto, la plej multo de anglikana eklezio. Eĉ unu liberpensulo ne estas trovebla en tiu nombro.

*Raportis T.S.Y.*

## Grava! Atentu!

Ofte oni havas aferojn en juĝejoj kiel plendanto aŭ atestanto. Do, ĉiu angla liberpensulo sciu, ke en Anglio ekzistas leĝo, kiu donas rajton al liberpensuloj FARI AFIRMON. Tio estas nia laŭleĝa rajto kaj ni uzu ĝin. Ne permesu, ke ĉi tiu leĝo de parlamento estu flankenmetata.

Liberpensuloj de aliaj landoj eltrovu ĉu ĉe vi ekzistas simila leĝo. Se jes, uzu ĝin. En landoj, kie tia leĝo ne ekzistas, oni rifuzu ĵuri kaj postulu rajton afirmi. Tio eble elvokos proceson, sed donos okazon por lokaj liberpensuloj havigi pere de parlamento tiun leĝon.

Oni devas alkutimigi la aŭtoritatojn kredi je nia vorto de honoro. Kaj en Anglio oni fidas al afirmo de liberpensulo, kion oni neniam fidas al kristano. Al kristano oni kredas nur, se li ĵuras per sankta fasko da paperoj.

**Neniam ĵuru.**

**Insistu afirmi je nomo de Honoro.**

## Mi ne estus liberpensulo, se ne pro pastro

Tio okazis apud urbo Vologda (Rusio). Foje pastro Aleksandro, — ni nomis lin kuniklo pro liaj strabaj okuloj, — vokis min.

— A, nu, Razin, diru, kiom da filioj havis Noa, kaj per kio li sin okupis.

Flustras la knaboj: "Diru, per drinkado".

Mi senpripense ripetis.

"Per kio li sin okupis, konate, Noa estis drinkemulo; foje li tiom drinkis da tiu vinbera suko, ke li perdis tutan honton, kuŝis nuda kaj dormis. Nu, kia patro — tiaj filoj!

— For vi! de morgaŭ vi ne plu estas lernanto de ĉi tiu lernejo! Hejme patra rimeno fajfis sur mia dorso kaj aldone mi devis pasigi la tutan tagon sen manĝo en kelo kun la biblio en la manoj.

Alian matenon mi iris en la lernejon.

— Akceptita! Ĉio iris tre bone. Sed jen venas denove la tago de sankta instruo. Denove la longhara kuniklo aperis.

— Hm... Razin ĉi tie! Kiel vi fartas? Patra rimeno saĝigis vin. Ĉu vi scias bone vian lecionon nun?

"Jes patro-pastro, mi scias. — En la koro mi estis ĝoja, pensante ke tuj mi respondos pli bone ol iu, la plej altan markon mi ricevos.

— Do, bone, ke vi ellernis vian lecionon.

Li demandas kaj demandas kaj ne haltas.

— Diru de kiu Jesuo Kristo naskiĝis.

"Kompreneble de Jozefo, mi diras".

— Ne de Sankta spirito?

"Ne, pastro, naski de spirito — de kolombo estas tute ne eble... Jen ekzemple, via patrino ne de koko naskis vin, same la knabino Mario.

— Stultulo! Porko! Vi malsaĝa krudulo! — kaj li kaptis min per orelo.

— Kion vi en la kapo nur havas! Kiam vi komencos dece lerni! — kaj frapis min sur pupitro.

Vi povas kompreni, ke mi ne forte amis la sanktan lecionon. Kaj hodiaŭ mi estas liberpensulo.

*Junkero Nikolao Razin.*

## Laboro de liaj manoj

En la fako por vizitantaj pacientoj areto da studentoj de medicino kaj fama neŭrologo staras ĉirkaŭ patrino pala kaj elĉerpita, kiu kun peno tenas sur siaj genuoj grandan bubon kun dikaj membroj, elstaranta stomako, malgranda kapo, plata nazo kaj migdalformaj okuloj. Estas tipo de idioto nomata "mongola" pro ioma simileco kun mongola fizionomio.

La idioto subite disĵetas sencele la brakojn kaj krurojn, forte tordiĝas kaj preskaŭ falas de la patrinaj genuoj.

"Ho, doktoro", plorvoĉe pledas la perdita patrino, "faru ion por resanigi lin! Li estas granda ĝeno, kaj mi devas fari ĉion por li, ĉar li ne kapablas fari ion por si, kaj jam li estas kvarjara. Mi ne scias kion mi faru kun li."

"Nu, nu patrino, portu nun eksteren la infanon kaj remetu liajn vestaĵojn, poste mi venos paroli al vi", diras kuracisto.

Malantaŭ fermita pordo la neŭrologo parolas al la studentoj. "Jen, gesinjoroj, vi vidas, tipa ekzemplero de mongola idioteco." Kaj senemocie li daŭrigas priskribi la specialajn signojn de la malsano. Fine li diras, "rilate al la kuraco, nenio estas efika. Vere, mi ne scias kion diri al tiu patrino. Mi ne povas ion fari. Tiel la Sinjoro faris lin, *kaj kiu mi estas, ke mi aliigu la laboron de Liaj manoj?"* *W.*

## IIa kongreso de proletariaj liberpensuloj

La supra kongreso okazis en Leipzig 11-a ĝis 14-a de Decembro 1925. Ĉeestis delegitoj el Aŭstrio, Germanio kaj Ĉekoslovakio.

La reprezentantoj de Rusio ne ricevis permeson eniri la landon. Aliĝis novaj organizaĵoj el Danio, Usono kaj Rusio. Ankaŭ la Proletaria Junularo de Germanio estis akceptita. Estis decidite ne filiiĝi al la Brusela Fédération Internationale de Libre Pensée, kaj nur de tempo al tempo kunlabori. La gazeto, intencita en tri lingvoj, pro diversaj kaŭzoj, ne povas efektiviĝi; la unua numero baldaŭ eliros nur en germana lingvo. La raportoj de la delegitoj pri la ekonomia kaj spirita statoj en respektivaj landoj estis tre interesaj. Ĉiu parolado montris, ke la reakcio marŝas ĉie; kaj oni konstatas ĝojigan fakton, ke fine la laboristoj komencas rezisti al la reakcio. Oni ĉefe sin okupis pri internaj aferoj. La proksima kongreso okazos aŭ en Moskvo aŭ Praha.

## La Nova Testamento kaj la ĝenerala germ. sindikato

Kiam mi aŭdis, ke la eldonejo de la supre nomita sindikato eldonis Novan Testamenton, mi pensis, ke tio estas ŝerco. Sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke fakte, la eldonejo de la socialistaj laboristoj eldonis la Novan Testamenton. Mi demandas al mi ĉu estas iu bezono por laboristoj havigi al si tiun verkon, aŭ ĉu la Bibliaj Societoj ne havas sufiĉan kvanton da Novaj Testamentoj por liveri. Mi pensas, ke la gvidantoj de la eldonejo estas, la tiel nomantaj sin, religiaj socialistoj, kaj ili intencas doni po ekzemplero al ĉiu agemulo en la sindikatoj kiel helpilon en la ekonomia batalo. "Returnen, returnen!" verŝajne, estas la devizo de tiaj homoj. Iam mi legis ĉe John Most en: "Dio — Pesto" la jenon: "Ju pli bona la reputacio de homoj, kiuj religiajn sensencaĵojn miksas kun la laboristaj celoj, des pli danĝeraj tiuj homoj estas. Kiu predikas la trompon de Dio en iu ajn formo, devas esti aŭ stultulo aŭ kanajlo." La liberpensuloj protestis kontraŭ tiu faro de la eldonejo.

*Legantoj, kiuj pensas, ke almenaŭ unu internacia gazeto por la liberpensularo de la mondo devas ekzisti en Esperantujo, subtenu ĝin mone, per konsiloj, varbante novajn membrojn, tute kvazaŭ la ekzisto de la gazeto estus via persona afero. Skribu personan leteron al la gazeta komitato. Ĝi ĝoje ricevos ĝin.*

*La Gazeta Komitato*

## *Risku pensi!*

*Orig. de Kastelano*

*Kial do por vi proletoj*
*Ĉiam zorgoj kaj sufer'*
*Kaj por viaj infanetoj*
*Vivo kvazaŭ la infer'?*
*Do nur tial, ĉar vi restas*
*Stultaj kaj nepensemul'*
*Kaj sopiroj viaj estas*
*Ĉiam en ĉiel'-nebul'.*

*Kial do la luksa stato*
*Por malmultaj en la mond'*
*Kaj por multaj la malsato*
*En la sama homa rond'?*
*Kulpa estas via kredo*
*Kaj, ke vi ne pensas mem;*
*Vi esperas per la cedo*
*"Dian" savon el dilem'.*

*Ne, — vi karaj kamaradoj*
*Vi neniam el mizer'*
*Povas veni per helpadoj*
*De aliaj al liber'.*
*Nur sin mem per forta volo*
*Povas savi proletar';*
*— "Risku pensi!" — vi popolo, —*
*Tiam venos liberfar'.*

## *La diferenco*

*De Kastelano*

*Pastro sidas sur balkono,*
*En la mano ora mono*
*Jus pagita de la ŝtato:*
*Dumil markojn po monato*
*Por labora liverita*
*Ne utila — sed "spirita".*

*En minejo laboristo*
*Laboregas kun persisto, —*
*Monon nepre li bezonas —*
*Impostisto lin admonas.*
*Venas la salajrotago:*
*"Nur cent markojn!" — tuta pago.*

*Pastro laŭdas karan dion,*
*Amas sian religion,*
*Ĉar kontenta li ja estas;*
*Sed la laboristo restas*
*Malkontenta ĉe nenio . . .*
*Ĉar ne kredas li al dio.*

## Teatro de idealoj

En la grandaj urboj de Britujo dimanĉo ne estas al iu ĝojiga tago, ĉar por centmiloj da gejunuloj, kiuj havas nek bonan hejmon nek rimedon por fari ekskursojn en la kamparon, ekzistas nenio krom la malgajaj stratoj. La urbaj aŭtoritatoj kvazaŭ diras: "Iru al preĝejo aŭ al diablo". Kelkaj kinoj estas malfermitaj, sed en tiaj ejoj multaj bildoj montrataj, ankaŭ la ĝenerala atmosfero, tute ne estas cerbo-sanigaj. Tie kaj aliloke estas altgrada altpreza koncerto. Dum la somero en kelkaj publikaj parkoj ludas muzikistaro — ne ĉiam unuaklasa. Butikoj-fermitaj, krom kelke da bombonejoj, kaj en la vespero ĉiu drinkejo estas malfermata. Nenie oni povas trovi teatraĵon. Ekzistas Ligo nomata "Nacia Dimanĉa Ligo", kiu ludas muzikon en tre nemultaj teatroj; ankaŭ nur en malmultaj distriktoj tiu Ligo estas permesata ludi.

Lastan vintron la mensa ekvilibro de Londonanoj estis skuita per anonco, ke Arturo Bourchier, fama aktoro, afable disponis al la Brita Laborista Partio la uzon de sia teatro ĉiun dimanĉon vespere. La Laborista Partio tuj aranĝis teatraĵojn, muzikaĵojn, paroladojn, ktp. Eniro estas senpaga, oni faras monkolekton.

Granda estis la sukceso — la teatro estis ĉiam plenplena. Oni nomas ĝin "La Teatro de Idealoj".

Tre interesa estis la eksperimento; ĝi montris kiel oni povus plenigi preĝejojn kaj transformi ilin en centrojn de klereco kaj homeco. Sed pastroj persistas en sia kaduka religio, kiu nur tedas la menson de pensanta homo.

Mi ne konas la Roman eklezion, mi parolas nur pri la anglikana eklezio. La plimulto de la ekleziuloj tute ne kredas en la biblio; ili akceptas la Evoluan kaj aliajn teoriojn de moderna scienco; ili diras, ke la historio de la "kreado" dum ses tagoj estas alegorio, kaj multaj el ili ne kredas pri la mirakloj aŭ la virgulina nasko. Ili neniam parolas pri la diablo aŭ pri la infero; ili simple asertas, ke Dio kaj paradizo ekzistas; ili murmuras vortojn dum diservo — kiuj kontraŭdiras tion, kion ili efektive kredas. Kie, en tia fantomo de religio oni povas trovi aŭ inspiron aŭ idealon aŭ ian allogon por ordinara homo? Se oni transformus kaj la teatrojn kaj la preĝejojn en "Teatroj de Idealoj" ili tuj estus plenplenaj. Kio okazas nuntempe? Teatroj restas fermitaj ĉiudimanĉe kaj la preĝejoj plejparte malplenaj.

*M. Emberson (Londono).*

## Elĉerpaĵo el "Libereco de viro, virino kaj infano"

de *K. G. Ingersoll*

(fama amerika liberpensulo)

Kio laŭ mi signifas libereco? Libereco en ago, laŭ mi, estas la rajto fari ion ajn kio ne interrompas la feliĉon de la alia. Libereco intelekta, laŭ mi, estas la rajto pensi ĝuste kaj la rajto pensi malĝuste. Pensado estas la rimedo per kiu ni celas atingi la veron.

Se ni jam scias la veron, ne estas necese pensi. Estas postulata nur honesta intenco. Vi demandas mian opinion pri io. Mi ekzamenas ĝin honeste, kaj kiam mi decidiĝis, kion mi diru al vi? Ĉu mi diru miajn verajn pensojn? Kion mi faru? Oni metas libron en miajn manojn. Oni diras ke ĝi estas la Korano; ke ĝi estis verkita sub inspiro. Mi legis ĝin. Supozu, ke post tralego, en mia koro kaj menso mi konsideras ĝin mensoga. Vi tiam demandas al mi, kion mi opinias? Nu, se mi loĝus en Turkio, kaj havas nenian ŝancon akiri oficon, se mi ne subtenas la Koranon, kion mi devus diri? Ĉu mi konfesu kaj diru, ke je mia honoro, mi ne kredas al ĝi? Kion vi pensus tiam pri miaj kun-civitanoj, se ili dirus: Tiu homo estas danĝera; li estas malhonesta. Supozu, ke mi legas la libron nomata la Biblio, kaj, traleginte ĝin, mi decidas ke ĝi estis verkita de homoj. Pastro demandas al mi, "Ĉu vi legis la Biblion?" Mi respondas ke jes. "Ĉu vi ne pensas ke ĝi estas de dio inspirita?" Kion mi devus respondi? Ĉu mi diru al mi, "Se mineos la inspiron de la sanktaj skriboj, oni neniam donos al mi povon"? Kion mi respondu? Ĉu mi ne devus kuraĝe respondi, "Mi ne kredas en ĝi?" Ĉu mi ne devus doni la veran impreson de mia menso? Aŭ ĉu mi agu hipokrite kaj ŝajnigu tion, kion mi ne sentas, kaj malamu min mem por ĉiam poste kiel servuteman senkuraĝulon? Miaparte, mi preferus, ke oni diru kion oni honeste pensas. Mi preferas, ke oni gardu sian kuraĝon. Mi preferus milfoje esti sentima nekredanto ol timema kredanto. Kaj se estos tago de juĝo, tago en kiu ĉiu staros antaŭ iu supera estaĵo, mi pensas, ke mi staros pli alte, kaj havos pli bonan ŝancon ricevi juĝon favora al mi, ol iu homo, kiu ŝteliras tra sia vivo pretendante kredi tion, kion li ne kredas.

Por indulgi la tiranecon kaj pravigi la sklavecon, la eklezio instruis, ke homo estas tute malvirta. La vero estas, ke ni estas kaj bonaj kaj malbonaj.

La plej bonaj kapablas al bonaj agoj kaj ankaŭ kapablas fari malbonajn. La plej malnoblaj povas leviĝi kaj la plej noblaj povas fali. La homaro povas esti dividita en du grandajn grupojn: pekuloj kaj sanktuloj. Je periodo de grava katastrofo, vokata eble de malesperaj voĉoj de virinoj, viroj, kulpigitaj de la eklezio kiel tute malvirtaj, kuras en morton kvazaŭ al festeno. Tiuj homoj faras agojn tiom plenaj de memofero kaj sindonema kuraĝo, ke milionoj tributas al ili ne nur admiron sed ankaŭ larmojn.

Super ĉiuj kredoj, super ĉiuj religioj tamen, ja estas supera kvalito — la humaneco. De tempo al tempo, dum ŝippereo, sur la vasta tumulta maro, aŭ inter la rokoj ĉe iu danĝera marbordo, aŭ kie flamoj kiel serpentoj sin tordas kaj siblas, iu nobla koro, ia alta animo faras agon brilan kiel stelo, kaj montras la mensogon de ĉiuj dogmoj kaj superstiĉoj. Oni uzis ĉiujn tiujn ĉi abomenajn doktrinojn por degradigi kaj sklavigi la homaron.

For por ĉiam la dogmojn, kaj librojn, kaj leĝojn, kaj religiojn, kiuj prenas for de la animo liberecon kaj racion.

For la ideon, ke pensado estas danĝera. Pereu la malhonora doktrino, ke homo rajtas posedi homon. Ni malakceptu kun indigno ĉiun provon kateni niajn mensojn. Se ne estas iu dio, certe, ni ne devas nin klini, nek fleksi la genuon, nek rampi. Se estas dio, ne devus esti iaj sklavoj.

Tradukis *J. Floro, Londono.*

---

# Recenzo

La Nedaŭraj Reenkorpiĝoj en Mantes s. Seine. De Jules Thiebault. Prezo ne montrita.

En Radiaj rondoj oni publike faras sugestojn, ke estas tute eble pere de radio igi la spiritojn videblaj, — se ili ekzistas, revenigante ilin el ekstervidebla ebeno — en videblan. Se, kiel asertas spiritistoj, en ĉi tiu mondo svarmas spiritoj pli dense ol infektaj ĝermoj, estos do tiam tute facile kapti multajn specimenojn dum ĉiu seanco aranĝota de nia Esperanta amiko J. Thiebault, en Mantes. Tiam ni donos pluan opinion pri la reenkorpiĝoj. Leginda libro al spiritistoj.

Dume ni devas sciigi pri eraro kiu okazis en spirita mondo. Mesaĝo estis sendita el spirita mondo de komandanto Josefo Honner. Antaŭ multaj jaroj komandanto Honner estis kunŝipano kun certa admiralo, nun spiritisto, kaj tiu admiralo ricevis la mesaĝon. Aŭdinte pri la afero, komandanto Honner skribis en la jurnalo "The Daily News" Londono, ke li estas ankoraŭ en ĉi tiu mondo. Do, vi vidas, ke homo en ĉi tiu mondo tamen povas paroli pere de mediumo. Tiu fakto estas pruvo, ke tute ne estas necese transiri en alian mondon por paroli pere de mediumo. Sed eble spiritistoj povus pruvi al Komandanto Honner, ke li tute ne estas tiel vivanta kiel li opinias. Komandanto Honner nuntempe estas tre scivolema eltrovi kion li diris.

---

## *Atentu!*

*La membrokartoj estas dissenditaj; kiu ne ricevis sian karton, skribu al la sekretariejo. Ĉiu membro ricevas kun ĉi kajero la broŝureton. "Kion vualas la Biblio". Membroj pagintaj la kotizon por 1926 trovis ĉi tie glumarkon kiel kvitancon. Bonvolu glui ĝin en la membrokarton.*

# Bibliografio de internacia liberpensula gazetaro

(Daŭrigo. Vidu ankaŭ n-roj 1, 3, 5 [1925].)

### Germanio

*Der Lichtbringer* (La Alportanto de Lumo). Komunikilo de Komunumo de la proletar. liberpensuloj, distrikto Pirna. Monate. Germane. Nur por membroj. Adreso: Albert Barthel, Pirna-Copitz.

### Svisio

*La Libre Pensée internationale* (La libera penso internacia). Dusemajne. France. Fondita 1905. Adreso: Lausanne, Rue de la Paix 4.

# Libroj ricevitaj

*Organiza Statuaro* de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

*Kongresa Dokumentaro* de deksepa Universala kongreso de Esperanto (Genevo). Havebla je la prezo de 1.25 sv. fr. aŭ egalvaloro ĉe Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, 12, Boulevard du Theatre, Geneve (Svisio).

*Die Privatsache Religion* (La privatafero religio) de prof. Hartwig, prez. de la Internacio de la Proletariaj Liberpensuloj, Sidejo Wien I, Wipplingerstr. 8. Prezo: Aŭstrio 50 groŝoj, Ĉekoslovakio 3 ĉ. kr., Germanio 50 orpfenigoj, aliaj landoj —.90 sv. fr.

Ĉi broŝuro germanlingve verkita de la fame konata liberpensulo prof. Hartwig traktas en facilkomprenebla maniero la temon "La privatafero religio". Ni nur povas rekomendi al ĉiu liberpensulo la verketon kaj estus dezirinda se ĝi estus legata de socialistoj apartenantaj ankoraŭ al eklezio. La socialista tezo postulas la disiĝon de eklezio kaj ŝtato. Malgraŭ tio, la proletariaj partioj ofte atakas la liberpensulojn pro ilia varbado por eksiĝo el eklezio. Hartwig diras ĝuste: "Sed kiel oni volu efektivigi la disiĝon de eklezio kaj ŝtato kontraŭ la kredantoj kiuj estas la plejmulto? Laŭ demokrata starpunkto la eklezio estas ja prava, ĉar ĝi havas la plejmulton por si, inter ĝi granda parto de socialistoj. Jen nur estas unu respondo: eksiĝu el la eklezio! La broŝuro estas ankaŭ havebla ĉe nia ligo.

**Proletaria Liberpensa Junularo**

(Germanio) Sekcio de Internacio de la Proletariaj Liberpensuloj

serĉas interrilatojn kun la liberpensa junularo tutmonda. Ĉiu organizaĵo kaj junulo skribu al:

**Anton Schneiderheinze,** Kanzlerstr. 27 **Leipzig-Lindenau** (Germanio)

*Membroj! Publikigu la supran anoncon en la liberpensa gazeto de via lando.*

## Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N 4.

Belgio: Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, Antwerpen.

Blankrusio: Dim. Snejko, poŝtkesto 33, Minsk.

Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.

Ĉinio: Pandiŝo, N. Y. M. S., Lunghwa, Shanghai.

Francio: Emil Gasse, 15 place Gambetta, Le Havre

Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)

Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.

Japanio: Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio.

Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.

Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)

Polio: Jan Zawada, ul. Kröla Lesczeryns-kiego 36 m. 2, Lublin.

Rusio: H. Frank, Leningrad Gubkom Esperantistov, 3-aja Sovetskaja n-o 2 I, kv. 25.

Skotlando: Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, Glasgow.

Svedio: Einar Adamson, Göteborg, Box 73.

Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.


**Eine Bibliothek umsonst**

bieten wir jedem Leser dieser Zeitschrift. Kein Schwindel, keine Verbindlichkeiten. Jeder Leser sende Karte mit Adresse an:

**Versandbuchhandlung "Die Wölfe" Leipzig-Plagwitz 88.**

**GAZETO "QUEEN SILVER"**

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 15 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.

Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:

**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**

Germanoj mendu ĉe:

**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**


## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

*Atenton gek-doj!* K-doj povantaj paroli germanan lingvon el alilando, kiuj iam travojaĝos Bavarion kaj estas pretaj paroladi en nia urbeto pri iu ajn temo estas petataj antaŭe sciigi nian "Liberpensula Societo" sub adreso: *Karl Späth, Dachau ĉe München (Bavario), Flurstr. 8.*

*Andreo Sidorov,* N-strelkovij polk Dondivizij, Rostov n/Don, Rusio, dez. koresp. per leteroj kaj p. k. il. kun ĉiuj landoj.

*Sudelik Stanislaw,* Koluszki-stacja (Polio) deziras interŝanĝi jurnalojn, p. k. il. pri liberpensa movado kun eksterеŭropaj samideanoj. Nepre tuj respondos.

*Ŝ. Trejvas,* Zydu Vaiku Namai, Pilies gve 13, Kaŭnas (Litovio) deziras korespond.

*Riva Berzak,* Kante gve 2, Kaŭnas (Litovio) deziras korespondadi.

*Wilhelm Möhle,* kompostisto, Pontestr. 7, Görlitz (Germ.) deziras korespondadi per L, Pk. il.


**UNS**

**PRODUKTIV-GENOSSENSCHAFT G. M. B. H.**

**Presejo kaj eldonejo**

Laŭ plej moderna stilo estas liverataj: GAZETOJ // ĴURNALOJ VERKOJ // KATALOGOJ BROŜUROJ // AFIŜOJ en ĉiuj eŭrop. lingvoj

**ESPERANTO-FAKO**

Petu oferton k. katalogon

LIBROBINDEJO

**LEIPZIG-CO. ELISENSTR. 163 TELEFON 35622**

**Mendu la kolekton de liberpensaj gazetoj**

(ĉirkaŭ 35 diversaj gazetoj).

Havebla ĉe la Ligo. Prezo: Por Germanio kaj Aŭstrio gm. 4.—, aliaj landoj gm. 5.— Poŝtelspezoj ne estas kalkulataj

**ALFRED REHTZ**

**LA VERDA STELO**

Versoj (germanlingve)

Prezo 0.50 mk. g.

La konata poeto prikantas en sia nova versaro la Esperanton. Estas certe la unua fojo, ke germana poeto varbas tiamaniere por Esp-o. La Esperantomondo akceptis la broŝuron ĝoje. Rehtz pruvas al la kontraŭuloj kaj indiferentuloj de la mondhelplingvo kun akra logiko, la nepra neceso de Esp-o. Bonega rimedo plibeligi esp-ajn solenojn kaj propagandvesperojn.

Ĉiu Esperantisto devas legi

**Kion vualas la Biblio?**

nun presita broŝure.

Prezo: 15 pfenigoj, Angle 2 d., France 1 fr. kaj aliaj landoj samvalore.

Havebla ĉe:

**Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt.**

**NOVAJ TEMPOJ**

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de TAGE

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Specimeno kostas 0.25 mk. g.

Mendu ĉe:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**


## Sendiuloj en Minsk

petas de ĉiulandaj kamaradoj, por sendiula ekspozicio ĉe centra klubo je la nomo K. Marks, alsendon de materialo: sendiula, liberpensula, naci- kaj esperantlingvaj gazetoj kaj jurnaloj. ✶ Adresu al:

**Minsk, Poŝtkesto 33, Agentejo "Esperanto" por Ŝukeviĉ-Tretjakov**

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

2a-Jaro, Numero 2 | Dumonata | Marto—Aprilo 1926

# Liberpensulo


Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig - Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht
Mariannenstrasse 22, I.
Leipzig - Neustadt (Germ.)
Poŝtĉeka
numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la gazetkomitato. Adreso: S-ino *T. Sufadinova*, 3 Fonthill Road, *London N 4* (Anglio).
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## Religio de Saĝeco



komenciĝis meze de revolucia renverso en Rusio, kiam ĉiuj antaŭaj valoroj perdis sian valoron. La gvidantoj de ĉi tiu religio eltiris ĉion taŭgan kaj homan el antaŭaj valoroj, eljetis ĉion fantazian kaj eliris al la homaro kun prediko, celanta revoluciigi la homan spiriton kaj humanigi la homaron. Ĝiaj apostoloj sonoris sian alvokon laŭlonge la rivero Volga, en Kaŭkazio kaj tra la tuta norda parto de la Nigra maro. Ili vokas por Penso, Belo kaj Forto. Apostolado, misiado kaj starigo de kolonioj estas la agado de la Religio de Saĝeco. La apostoloj vojaĝas de urbo al urbo kaj de estradoj donas sian mesaĝon al amaso. La misiistoj restas en siaj lokoj de loĝado kaj formas staciajn ĉelojn. La koloniistoj kuniĝas kaj formas koloniojn meze de maro homara. En tiuj kolonioj vivos nur anoj de tiu religio. La kolonio, kiu estas apud Leningrado, estas la centro de tiu movado. Ĝia devizo estas: "*Komprenu, Akceptu, Manifestu.*" Homo komprenas per cerbo, akceptas per emocio kaj manifestas per ago. Sur ĝia statuto staras:

Paragrafo IX. Religio de Saĝeco estas religio sen dio, sen kredo en postmorta vivo aŭ mirakloj. Paragrafo X. Religio de Saĝeco estas kulto de Intelekto (penso), kulto de Emocio (belo) kaj kulto de Volo (forto). Paragrafo XII. Religio de Saĝeco estas neevitebla ŝtupo al Superhomaro.

La fondinto de la Religio de Saĝeco estas *Anatolio*, filozofo - individualisto. Kovri la mondon per reto de ĉeloj de tiu religio li celas. Li vokas al ĉiuj, kiuj vidas en "ekcelsior" individuoj la estonton de *supera homaro*, skribi al li. *Anatalio* estas alprenita nomo de la filozofo, kiam li suriris sian apostolan vojon. Nun — Esperantisto kaj membro de nia Ligo. Adreso: Anatolio. *Samopomoŝĉ.* Leningrad. USSR.

*T. Sufadinova-Yelland.*

## Mi — Anatolio

(Elĉerpaĵo el 84 paĝa verko "La tri Veroj")

Mi — Anatolio, ido de la homaro.
Kaj mia vorto estas ne de mi, sed de la homaro kreinta min.

De generacio al generacio transdoniĝis la sentoj kaj pensoj de miaj antaŭuloj; ree kaj ree falis en ruinojn la altaroj al antikvaj dioj, kaj ree oni edifadis al novaj.

Kaj suferis la homaro, miaj antaŭuloj, ĉasante el koroj siaj la antikvajn diojn; kaj per ekstazo pleniĝadis ilia koro, kiam ili trovadis novajn, pli superajn.

Kaj transdonis al mi miaj antaŭuloj la memoron pri siaj suferoj kaj siaj ekstazoj.

Amon al tiu homaro, kiu kreis min tra suferoj kaj ekstazoj.

Ne reviviĝos por mi la dioj de mia primitiva prapatro; ĉar entombigis ilin miaj antaŭuloj ne por tio, ke mi, ilia malproksima posteluo denove veku ilin al vivo.

Lume brilas en mia brusto la vero, elkreskinta sur la tero; kaj nova templo ekstariĝas sur la ruinigitaj altaroj de fantomaj dioj,

Kaj mi dediĉas mian vivon al radianta *Universo*, la sola vero, kaj ne ekzistas aliavero.

*

La flugilo de eterneco tuŝis min, kiam mi aŭdis en mia soleco la susuradoa de konstelaro. Per forto iĝis plena min spirito, kaj koro mia pleniĝis per emocio, kaj konscio per profundeco de la mistero.

Mortis por mi la lasta ĉiela idolo, kaj ekkonceptis mi la veran dion — la *Universon.*

La lastan tavolon de polvo de sur mia animo la vento forblovis; kaj nuda mi staras antaŭ mia radianta dio.

**Sendu artikolon pri la liberpensa movado en via lando**

Kaj diris mi al mi mem: — Vi, feliĉa en via nudeco, iru kaj gloru vi vian dion; trovu aliajn homojn, nudaj kiel vi, kaj tiel multobligu vian ĝojon. Ĉar ja estas viaj similuloj inter la homa idaro, kiuj serĉas vin, kiel vi serĉas ilin.

*

Jen iris mi trans la surfaco de la tero inter homoj, meze de la sonĝanta silento de urboj.

Kaj vidis mi la tombmontetojn, la oferaltarojn kaj idolojn de antikvaj dioj, kaj la incenson en la preĝejoj.

La vizaĝoj de le preĝantoj estis lacaj; eluzita ilia spirito, ĉarmigita per vizio neekzistanta; iliaj lipoj murmuris antikvajn preĝojn al dioj ne aŭdantaj.

Kreis tiuj homoj por si diojn laŭ sia aspekto kaj loĝigis ilin ĉirkaŭ si, en montoj kaj valoj, nuboj kaj akvo.

Estis, estas kaj estos religio ĉe la homaro, ĉar ĝi estas parto de la *universo,* kaj neniam rompiĝos ligo inter la kreanto kaj ĝia kreitaĵo.

Nuda mi rigardis tra la fenestro de vivo kaj vidis mi en la *universo* nek komencon nek finon.

La fajraj gutoj, la fajr-steloj, naĝas en la fluego de la lakta vojo kun suno de nia tero, kaj en sia kuro forportas en spacon la teron kaj ĉion vivantan sur ĝi.

Antaŭ vi, mia naskinto stelara, mirinda fonto de ekzisto, mi staras. Mi — momenta ekflamo de vivo, la filo de la homaro. Premas mi min, nuda homo al via sino.

Antaŭ vi, mia stelara naskito, ne ekzistas mensogo; kaj malaperas antaŭ via vizaĝo. la suferoj de la homo.

*

Ankoraŭfoje mi ekflugis per miaj mensaj flugiloj ekster la vivo homa.

Jen popolo de fiŝoj kaj birdoj, reptiloj, kvarpiedaj bestoj, rodbestoj, formikejo; oni ĉie konstruas ion tre gravan, — sian efemeran vivon.

Kaj pleniĝis koro mia je amo al besto kaj birdo, fiŝo kaj kreskaĵo; kaj ekvidis mi en ili miajn junajn fratojn antaŭ la vizaĝo de la *universo,* kiu kreis min.

Benon al vi bestoj, reptiloj, fiŝoj, kreskaĵoj kaj mineraloj. Ĉar vi suferis kaj kreadis la riĉecon de via vivo, por poste transdoni ĝin al la homaro.

De vi mi havas miajn okulojn por vidi la stelaron, de vi miajn orelojn por aŭdi la sonon de vento; de vi mi havigis miajn sentkapablojn kaj mian prudenton, por kompreni la universon kaj ĝoje tremi antaŭ *ĝi.*

En suferoj vi kreadis la plej altan estaĵon — la homon. Amon mian al vi por tio, miaj malaltaj fratoj.

Ne forpuŝos mi vin pli kun fisento, ĉar mi estas ja via heredanto.

Miaj sentoj estas delikataj, mia cerbo akra. Mi ne malŝparos la heredaĵon ricevitan de vi, sed ĝin mi multobligos.

El kreemaj penoj miaj naskiĝos nova homo, nuda homo. Kaj estos li granda kaj bela. Kaj estos li ĝojo de la vivo.

Kaj mi enpenetris mense en la profundecon de tempoj por vidi kiel vivis la homa familio.

Mi vidas la unuan tagon de homo sur la tero, kaj la vicon de centjaroj kaj milionjaroj de la vivo de homa familio, la naskito de la tero.

Laŭlonge la riveroj kaj maroj ariĝas la domoj de homoj, en rokoj, kaj kaŝas sin en arbaroj kaj rokgorĝoj. Gravan aferon faras homoj en siaj loĝejoj, ili kreas sian vivon.

Aroj da tiuj dioj plenigadis la infanecan cerbon de la homaro, miloj da orakoloj kaj oferistoj proklamadis la volon de neekzistantaj dioj.

Jen mi dispecigas la lastan falsan dion! kaj forpelas lin de, al li ne apartenanta, trono.

Kaj ne estas pli idolo por ŝirmi de mi la *universon* stelaran.

*

Kaj vidis mi la fajreron de la granda *universo* — la polveran teron, naĝanta en ĝia sino; kaj vidis mi la homaron en estinteco, estanteco kaj estonteco sur tiu kosmero — tero.

Kaj mi konceptis la misteron kaj la veran dion de la homaro.

Grandioza estas mia dio, memstara; kaj ne estas super li kreinto aŭ reganto; ĉar ĝi mem estas sia kreanto kaj portas en sino sia la vivon de la estinteco, estanteco kaj estonteco.

Mi nuda kliniĝas antaŭ la trono de vera dio — la *universo.*

Ne estas io malpermesata al mi en la palacoj ĝiaj, ĉar mi estas nur ekflamo ĝia momenta, — ido de la *universo.*

Ne dia providenco, la idolo ĉiela, kreis la tutan harmonion kaj la tutan belecon de la mondo.

*Hazardo* estas la plenumanto de eterne kreanta *universo.* Hazardo — la potenca detruanto kaj konstruanto, en sia blindeco kreas malviglan monstron kaj mirindan harmonion de formoj.

Ĉio sensenca, kruda, nemovebla pereas en la fluon de la neesto. Restas vivaj harmoniaj formoj, kaj ili trinkas akvon de vivo en la eterna fluo de estado.

La blinda hazardo naskas estaĵojn, superŝarĝitaj je organoj, kaj kun nesufiĉo da ili.

Naskas blinda hazardo homon surdan kaj homon sen racio.

Sed ĉio malharmonia kaj monstra estas nelongviva.

Kaj restas en la vivo ĉio bela, harmonia en siaj formoj kaj manifestoj.

Same la blinda hazardo dum sia petoladο naskis el la mezo de simioj la unuan homon, estaĵon pli perfektan ol liaj antaŭuloj.

Kaj iĝis homo reĝo de la tero, ĉar li estas bela aperaĵo de la blinda hazardo; potenca per sia prudento, brila en sia cerbo.

Kiel fajro mortas sub la malsekeco de akvo, tiel antaŭ la fortulo la malfortulo malaperas, la monstraĵo — antaŭ la harmonio.

La vivo elpelas el si ĉion malbelan kaj tiel la *universo* iras sian vojon al beleco.

*

La homo havis, havas kaj havos dion — la *universon,* kiu ekzistas ekster li kaj en li.

Mi — unu el ĉeneroj de tiu senfina ĉeno vivanta.

Ĝia ekstera evoluo estas kuniĝo de familioj en triboj, triboj en klanoj, klanoj en regno, kaj fine, regnoj en unu homa familio.

Lia interna evoluo estas kresko de lia homa spirito, transira el adorado de muskola kaj glava potenco al adorado de saĝeco kaj kreemo.

*

La reptiloj elkreskis el si mem kaj alprenis aspekton de homoj.

Kaj estis tiuj homoj malaltaj estaĵoj; — estaĵoj, kiuj trinkis la ŝviton de la laboro; — estaĵoj, kiu dismetadis ĉie aranereton; ŝtelantaj estaĵoj, rabantoj, verŝantaj sangon; — estaĵoj estingantaj lumon, avaraj al oro, sangsoifaj; — estaĵoj kun mielo sur iliaj lipoj kaj okuloj rigardantaj en la ĉielon, stultaj estaĵoj kaj ruzaj, silentaj kaj rabemaj, — homoj abomenaj.

Kaj manĝegis ili unu la alian, kaj rikoltis tie kie ili ne semis, kaj posedis tion kion ili ne kreis; kaj la tri kreemaj impulsoj de la homaro: emo al forto, emo al belo kaj emo al vero estis tenataj de ili en mallibereco sur oraj ĉenoj.

Ilia leĝo estis — perforto, ilia vivmotivo — ruzo.

Pereon al vi, vi homaj ventrorampantoj.

Pereon al vi, suĉantoj el homoj la sangon laŭ beno de viaj dioj kaj viaj diabloj.

Mi — kondamnanto de la lasta tago de tia kaduka homaro.

Mi — profeto de la unua tago de la nov-naskiĝanta homaro.

Vi kiel sklavoj finos vian vivon, kaj la volo de la saĝulo triumfos.

*

Kaj vidis mi: falis la landlimoj de regnoj potencaj kaj malfortaj, de venkintoj kaj de venkitoj, de aĉetantoj en sklavecon kaj de venditoj.

Ne plu estas regnoj de fortuloj nek de malfortuloj, ne plu regnoj de trompantoj nek de trompitoj.

Kaj jen vidas mi nov-naskiĝantan komunumon de saĝuloj, — el la sino de la tuta homaro eliranta: naskiĝas regno de lumo, de bono kaj feliĉo.

*

Eĉ minuton el sia vivo ne donas la nuda homo al ĥimeroj de posttomba vivo, al mondo de ne ekzistantaj ombroj.

Kaj diras mi al tiuj, kiuj en luktado ĝemas kaj perdas siajn fortojn en senfrukta batalo:

— Vi sufokiĝas en la povo de neekzistantaj fantomoj. Kaj ju pli vi falas antaŭ ili surgenue, des pli altaj ŝajnas al vi viaj sinjoroj.

Malŝparas vi la momentojn de via tera vivo kiel gastoj, ne kiel estroj aŭ kreantoj."

Aŭdu mian klarionan vokon:

Leviĝu, kiu havas forton,
Sentu, kiu havas koron,
Komprenu, kiu havas prudenton.

## Pasko

Paskaj festoj apartenas al ciklo de printempaj festoj. La vekiĝanta naturo post vintraj mallumo kaj suferoj elvokis kaj elvokas en homaj koroj ĝojon, kiun homo esprimas per specialaj solenoj.

Praulo donis homajn trajtojn al ĉio okazanta en la naturo. Ŝajnis al li, ke ĉirkaŭe okazas bataloj de bono kontraŭ malbono, luktoj de du malamikaj potencoj, el kiuj unu estis suno, tago, printempo, lumo, vivo kaj aliaj — nokto, malĝojo, vintro, mallumo, morto. En diversaj tempoj malsame nomiĝis ĉi potencoj, sed celo de ilia interbatalo estas ĉiam la sama. Se bona potenco nomiĝis Ormuzdo, tiam la malbona nomiĝis Arimano, se la bona nomiĝis Jahve — tiam la malbona estis tentanta serpento, kaj kiam la bona estis Jesuo, tiam la malbonan oni nomis satano ktp. Printempo estas grando venko de la bono. Vintra malbono cedas, ĉio vekiĝas al vivo, floretoj elrigardas el sub la neĝo, birdoj alflugas kaj ĉirpas ĝojege. Homo aranĝas gajajn solenojn printempajn kaj ligas ilin al legendoj pri eterna batalo de malbono kontraŭ bono, lumo kontraŭ mallumo, vivo kontraŭ morto.

Printempaj legendoj kaj solenoj tiom similas unu al alia ĉe diversaj popoloj — kristanaj kaj barbaraj; kristanaj solenoj estas preskaŭ laŭvorta ripetado de tiuj de antikvaj idolanoj, ke ni povas paroli ne pri diversaj religioj, sed pri unu, kiu daŭre iras tra ĉiuj popoloj kaj landoj, ŝanĝante nur nomojn de dioj. Ekzemple ĉie la simbolo de printempo estas Ovo. Ĉio vivanta naskiĝas el ovo, kaj pro tio ovo ĉiam simbolis vivon, multobliĝon, vekiĝon de naturo post vintra dormo.

Ofte vivdonantaj dioj estas prezentataj en ovala aŭreolo, rememoriganta pri ovo. Estas multaj bildoj de Jesuo ĉirkaŭata aŭ per nebulo ovforma, aŭ per luma aŭreolo samforma. Tiel estis pentrita hinda Budho sidanta kvazaŭ en mezo de lumiganta ovo. Cetere la tutan universon oni prezentis kiel ovon kaj parolis pri ovo de la universo. Do, Budho aŭ Jesuo, pentritaj en centro de lumiganta ovo, estas ĉefa estaĵo vivanta en ovo de la universo.

La legendo pri reviviĝo de Jesuo estis malnova eterna legendo pri bona dio — venkita de siaj malamikoj, kiu tamen ĉiun printempon reviviĝas. Tiaj reviviĝantaj dioj estis greke Adoniso, frigia Attiso kaj egipta Oziriso — kulto de tiuj ĉi dioj estis tre disvastigata tra tuta romimperio.

Precipe interesa estas kulto de Attiso. Tiuj ĉi solenoj estis organizitaj en fino de marto. Kulto de Attiso kuniĝis kun kulto de lia patrino — Cibelio, kiu priploradis morton de sia filo. Aranĝoj de ĉi soleno estis jenaj: la 22. marto oni en bosko dehakis abion dediĉotan al patrino de Attiso; ĉi detranĉitan arbon oni ĉirkaŭvolvis per blankaj rubandoj kaj kronoj el violoj, poste estis alkroĉita al ĝi skulptaĵo, kiu prezentis junan viron. Ĉion ĉi oni procesie portis al templo. Sekvanta tago estis tago de sanktigo de hostioj kaj nomiĝis tulilustrium. La 24. marto estis nomita la tago de sango, ĝi estis tago de komuna funebro kaj fanatikuloj pli ol unufoje vundis sin ĝis fluo de sango. Fine la 25. marto estis tago de ĝojo. Pastroj solene anoncis, ke dio reviviĝis. Oni dancis kaj kantis tiam. En ĉi tago liberigataj estas kelkaj krimuloj. Fine la 26. marto estis tago de ripozo post solenoj. Al tiuj ĉi ritoj estis iufoje aldonita solena enterigo de mortinta Attiso (lia figuro). Post tuttaga plorado pro morto de dio oni reiris kaj malfermis tombon por eltiri dion, kiu jam reviviĝis. Tiam pastroj al ĉiuj ĉeestantoj murmure ripetadis: "Ĝoju fiduloj, ĉar jen dio estas savita kaj li savos vin de suferoj."

Ne estas necese multon diri pri tio, ke poste kristanoj akceptis ĉi ritojn anstataŭante nur la nomon de dio Attiso per Jesuo.

En Romo estis disvastigita ankaŭ kulto de dio Mitro.

Ĉi kulto tre similis tiun de Attiso. Ĉefpastro de Mitro, same kiel de Attiso, nomis sin Papa (patro) aŭ pater patrum (patro de patroj). Lia emblemo estis alta frigia ĉapo ĉirkaŭita per triobla krono, aŭ tiel nomata Tiaro — ĝuste tia, kian portas nuntempe roma papo. Fine en la sama loko, kie nun staras kupolo de preĝejo de S-ta Petro en Romo iam staris sanktejo de frigia de Attiso.

Ni vidas do, ke ritoj kaj religiaj simboloj estas ja pli malnovaj ol dioj.

*Jan. Hempel*, lib. trad. *H. Halpern*, Lublin.

## Potpurio en la regno de dio

Al enketo en iu ĉekoslovaka gazeto "Kiun el kvin personoj vi metus en la Arkeon hodiaŭ, se okazus diluvio, kaj vi estus Noa?" Bernard Shaw respondis: "Mi dronigus la tutan malbenitan homaron, kaj atendus, ke dio elpensu ion pli bonan. La homa raso estas senespera malsukceso."

Ni pensas, ke estus pli bone, se dio lasus la kreon de nova raso al iu alia. Prenu iun ajn agon, en kiu dio enmiksiĝis, ĝi estis fuŝado. Laŭ lia propra kroniko — la biblio, li fuŝis la kreon. Li mem raportas, ke homoj pace laboris en konstruo de la turo de Babelo, kaj la afero bone prosperis; li enmiksiĝis, senordigis iliajn lingvojn, kaj de post tiam la homoj murdas unu la alian, ne komprenante sin. La metodo de kuracado, kiun li mem enkondukis, estis tute senvalora; kaj kiam $^2/_3$ de li mem venis sur la tero, li mem krucumis ĝin por kontentigi la restintan $^1/_3$. Post tio la aferoj iras de malbono al pli malbono.

Ni ne konsentas, ke oni neniigu la homan rason. Sed meti en la manojn de dio la kreon de pli kontentiga raso, estus ekstrema neprudento.

*

Verkisto E. Cammaerts en sia artikolo Jeane d' Arc (Ĵan d' Ark) skribas: "Ni ne miru, ke paŝtistino 13 jara povas diskuti problemojn ĝis nun turmentantaj la konscion de filozofoj kaj teologoj. Sanktuloj estas senescepte antaŭ tempo maturaj." Tio klarigas kial la fama 14 jara ateistino Queen Silver jam de sia 8. jaro en publikaj paroladoj pruvas sian ateistan pravecon. Ŝi estas la sanktulino, sendita de dio por pruvi la mensogon de la biblio. Legu ŝiajn gazetojn por 2 ŝilingoj aŭ du markoj germ. aŭ samvaloro, sendataj por tralego. Entute 8 numeroj. Adreso s-ro R. Wood, 1300, Elthorne Road, London, N. 19.

*

Niajn manojn trafis propagandiloj, eldonitaj ne de liberpensuloj, ne, sed de la Protestanta Pres-Oficejo. Tie ili denuncas siajn fratojn en kristo la katolikojn. Ili presas tie la opiniojn de famaj homoj. S-ro Walter Scott (Valter Skot) skribis, ke tiu branĉo de kristana eklezio "estas malalta degradiga superstiĉo". Dickens: "La plej abomena ilo de politika kaj socia degradigo, restinta en la mondo." Gladstone denuncas katolikojn tiel: "Eterna militanto kontraŭ progreso kaj evoluo de homa menso". Lordo Acton (ĉefa profesoro de moderna historio ĉe kembriĝa universitato) diras: "La papeco gvidis murdojn kaj masakrojn en la plej granda skalo, kruelo kaj plej malhumane. Ĝi estis ne nur pogranda murdisto, sed ĝi faris ankaŭ murdon la principo kaj leĝo de kristana eklezio kaj kondiĉo por savo." Dean Alford diras: "Romo estas esence pagana urbo ...... Ĉio estas tiel malbona, kiel tio povas esti: ne estas publika fido, ne estas deziro por bono al la popolo, la ŝtataj oficistoj malbone pagataj, kaj, post longaj jaroj de oficado, senhelpe fordungataj; dum, subaĉeto estas senhonte praktikata en altaj lokoj." Ankaŭ multaj aliaj opinioj.

*Per tio ĉiuj sciu, ke vi estas fratoj.*
Evangelio.

Al sia ŝafaro la pastroj diras, ke nuna ateisto estas "en plena senespero". Ni enketis ĉe kelkaj ateistoj ĉu tio estas vera. Ni, certe, scias pli pri niaj ateistoj ol ili, kaj neniam ni renkontis "senesperan ateiston". Ili ankaŭ diras, ke estis pli facile konvinki pli fruajn ateistojn ol nuntempajn, Kompreneble, ĉiam estas pli facile havi aferon kun jam mortintaj ateistoj ol nun vivantaj. Nenio nova en tio. Nuntempa ateisto tuj demandas "Kial dio ne faras ion?".

Tute ĝusta demando. Se vere ekzistas dio, li devus fari ion. Milionoj da homoj

faras sufiĉe por li, por ke li ekzistu. Kaj li almenaŭ devus per iu faro repagi por sia subteno.

*

Lastatempe la atento de la mondo estis altirita al eksedziĝa proceso en Usono. Juna aristokrato Leonardo Rhinelander postulis eksedziĝon, ĉar lia edzino ne estas dirinta al li antaŭe, ke ŝi estas nigrulino. La universitate edukita aristokrato tute ne kapablis distingi, ke la fianĉino, kaj ŝia kirla nigra patro, ĉe kiu li petis manon de lia filino, estas nigruloj.

La juna Rhinelander estas ankaŭ kristano. Li kredas, ke dio estas patro de ĉiuj. Sed li pensas, ke dio estas blankulo. Kiel kristano li kredas ankaŭ, ke ni ĉiuj estas fratoj. Sed li ne povas vidi, ke la nigra Alico estas lia fratino.

Oni devas nur miri kion la kristana edukado faras el filoj de riĉuloj.

La 11 milionoj da nigruloj en Usono siaflanke pensas, ke dio estas nigrulo, kio estas plej verŝajna. En siaj preĝejoj ili pentras Jesuon-nigrulo kaj Marion-nigrulino. Kiom longe restos la nigruloj en la sama religio kun sia frato Rhinelander?

*

En decembro 1925 mortis pastro Fielding en Devonŝiro, Britlando, postlasinte £ 67,691 kaj pastro Ch. Ward en Essex postlasis £ 23,626.

Ili lasis ĉion ĉi-tie, por sekvi Lin.

Dum sia vivo ili prelegis al sia ŝafaro: "Benataj estas la malriĉuloj", kaj "Ne preparu riĉaĵojn sur la tero . . .", kaj ion pri la kamelo kaj la kudriltruo, kaj pri la riĉulo kaj paradizo.

La ŝafoj aŭskultis kaj palpebrumis.

*

Misiisto raportis, ke en lia distrikto ĉinoj soifas nun por "la Vorto de dio". Ili forportas bibliojn en granda kvanto. Lia seniluziiĝo estas granda, kiam li eltrovis, ke ne por savo de siaj animoj la ĉinoj tiel soifis la bibliojn, sed por savo de siaj ŝuoj. Ĉinoj eltrovis, ke biblioj, miksitaj kun certa speco de herbo, formas bonegajn sandalojn por iliaj piedoj. Ne gravas, tio ne malhelpas al misiistoj daŭrigi la raportojn pri la sukceso de la Sankta Libro.

*

"La Internacia Asocio de Studantoj de Biblio" dissendas propagandajn libretojn al ĉiuj, kaj al liberpensuloj. En ili estas deklarite, ke la katolikoj kaj la protestantoj iras la malpravan vojon. Ni ĉiam tion diris, sed oni ne kredis al ni. En la sama libreto oni anoncas, ke "Jesuo Kristo la Glora Reĝo kaj ekzekutiva oficisto de Jehovo-Dio jam fariĝis la laŭleĝa reganto de la mondo". Kie? — En Ameriko? Tutan jaron ni atendis aŭdi tion, ĉar en sia propagando kaj la broŝuro "Milionoj, kiuj nun vivas, neniam mortos" la juĝisto Rutheford kun la biblio en la mano pruvadis al ĉiuj, ke se ni alvivos ĝis la fino de 1925, ni neniam mortos. Ne iu junulo aŭ maljunulo plu mortos, nek la novnaskitoj, ĉiuj vivos eterne. Jesuo estas tiam marŝanta sur la tero. Nia espero estas iom vualigita per ĉagreno, ĉar ĉerkoj tute same pasas niajn stratojn. Tre bone, ke ilia Kristo venis ne senordiginte la iron de la vivo. Ni estis iom maltrankvilaj. Ĉar en biblio ĉe Johano XV. ĉ. estas dirite, ke, kiam Kristo revenos, li estos sur la nuboj, kaj ĉiuj povas lin vidi, t. e. samtempe en la du kontraŭaj hemisferoj, ankaŭ, ke la suno, la luno kaj la steloj falas sur la teron, la mortintoj leviĝos el siaj ĉerkoj. Vi povas kompreni nian maltrankvilon pri la falo de la tuta ĉielo sur nian etan teron. Ĉiu stelo estas bolanta fajra globo, kaj ĉiu el ili estas kelkmilionoble pli granda ol nia kompatinda planedo. Do, se ili ĉiuj falos sur nian teron samtempe, kaj la suno kaj la luno, ni timis, ke ne restos eĉ unu kristano por renkonti Jesuon. Ankaŭ, ŝajne, neniu el kristanoj vidis Jesuon sur la nuboj, kiam li alvenis; almenaŭ, la raportistoj silentis. Tamen ĉio estas bona, kio bone finiĝas.

*

Kiam Jesuo Kristo aperis ĉe mormonoj sub la nomo Josef Smith ankaŭ la steloj, feliĉe, ne falis sur nin. La kristanoj devas ĝoji, ĉar alia kristo estas en Palestino ĉe la monto Karmel sub la nomo Baha' Alla. Ankaŭ alia Kristo en Ajabe, Japanio, sub la nomo onisabo Deguĉi. Annie Besant proklamis, ke Kriŝnamurti en Hindio estas la Kristo. Kvin kristoj marŝas nuntempe sur la surfaco de la tero; ĉiuj pursangaj veraj kristoj, neniu mensogisto. Nu, se nun la kristanoj ne pliboniĝos kun 5 kristoj, estas tempo, ke ĉiuj steloj falu sur ilin kaj englutu ilin.

*

Du katolikoj debatis pri tertremo en Mesina. "Kia terura afero estus Pat, se ni havus tertremon ĉi tie en nia malriĉa kara Irlando".

"Ni, certe, neniam havos tertremon en Irlando. Irlandanoj estas tia preĝema popolo."

"Sed la italoj estas ankaŭ preĝema popolo. Ĉu lia Sankta Moŝto la Papo mem ne vivas inter ili. La italoj ĉiam preĝas."

"Jes, vere, sed kiu povas kompreni ilin? Kiam ili komencas kartavi en itala lingvo, kiel la benitaj sanktuloj povas kompreni kion ili bezonas. Oni ne povas kompreni ili preĝas kontraŭ tertremo aŭ petas ĝin."

Jen denove bezono por Esperanto.

Ĉi tiun vivan kreeman laboron mi vidas en sensklavigo de homaj masoj el religiaj superstiĉoj, en kiuj tenis ilin la ekspluatantoj en sia kaptitejo, promesante feliĉan vivon post la morto. Vere benitan mondon, por estontaj generacioj, mi vidas en konstruo de paradizo ĉi tie sur la tero kaj ne en imagebla ĉielo.

Por partopreni en tiu kultura laboro mi devas multe studi. Mi petas, ke vi enskribu min, kiel studanton en la Centra Antireligia Seminario, Leningrad.

Estinta episkopo *Eŭgenio Belkov*.
Nun studanto de Ateista Seminario. Tiu estas lia konfeso dum publika debato.

---

En Samaro (Sovetlando) dum antireligia debato je temo "Ĉu kredo je dio estas necesa", vorto estis donita ankaŭ al malnova-eklezia episkopo Miĥaelo. Tute trankvile, taksante ĉiun eldiritan vorton, li faris jenan konfeson antaŭ kelkmila publiko: "Dum 30 jaroj mi servis kun vero kaj sincere al eklezio kaj dio. Dum 30 jaroj mi trompadis kune kun aliaj pastroj la homojn. *Tre bone mi scias la vivon de monaĥoj ĉefpastroj kaj pastraro, — ne ĉe unu inter ili estas trovebla, kiu kredas al dio.*

Mia konscio diras al mi, ke mi ne rajtas pli longe trompadi min mem, nek aliajn. Tial publike mi eksiĝas el eklezio, el la sankta rango, kaj deprenas mian robon, kiun senskrupule mi portis dum 30 jaroj.

Post li leviĝis altranga pastro Uvarov. "Ĉion mi pripensis, prirezonis kaj konvinkiĝis, ke la vivo prenas nun alian vojon, ne tian, kiel mi pensis. Mi ne volas mensogi antaŭ vi. Ne estas ie dio. Li estas bezonata al ekspluatantoj. De nun mi komencas novan vivon. Publike mi eksiĝas el mia rango kaj deprenas la pastran robon."

Tiam leviĝis tria pastro Duĥovnickij, publike deprenante de si la robon kaj la rangajn distingojn, dirante:

"Mi turnas min al vi, pastro, kiu sidas en la unua vico, kaj mi diras: se vi havas eron da intelekta honesteco, se via skrupulo ne forlasis vin tute, deprenu vian robon kaj venu kun ni. Mi sentas, ke homon kiu laboras, mi ne plu rajtas trompi. De nun mi iras helpi al lia revekiĝo. Mi eksiĝas kaj deprenas la robon."

La glacio ekmoviĝas. Eŭropaj pastroj sekvu kuraĝe viajn pli honestajn fratojn de Ruslando.

## El Ruslando

### Novaj Konvertitoj

Mi forlasis la eklezion en januaro de ĉi tiu jaro. Mi vidas, ke neniu nova grupiĝo de eklezioj povas esti vivanta. Ĉiuj, egale, estas mortintaj. Krom tio, mi vidas klare, kiu ajn estu eklezio, ĝi malhelpas konstrui novan mondon sur ruinoj de burĝa ekspluatanta kulturo. Mi forlasas eklezion por doni mian servon al vere vivanta kreema laboro, kiu celas veran bonon al estontaj generacioj.

## Liberpensa movado en Belgio

Estas internacia fakto, ke post la milito en pli multaj landoj la liberpensa movado malprogresis, tio ankaŭ okazis en Belgio. Tamen la preĝejoj ne pleniĝis pro tio. Tute ne. Sed estas bedaŭrinde, ke la liberala kaj la socialista partioj, kiuj konsideras sin antiklerikalulaj — kunfratiĝis kun la katolikoj; la unua kun la reakciemaj kaj la dua kun la demokrataj elementoj.

Malgraŭ la postmilita plimulto (sekve de la egala rajto voĉdoni) de socialistoj kaj liberaloj, la nereligia ĵuro kiel ankaŭ la kremaciigo ankoraŭ ne estas permesata. Pri la grava punkto en ambaŭ programoj, tio estas la apartigo de la eklezio de la ŝtato, ili jam ne klopodas.

Precipe en lernejaj aferoj, J. Destree, socialista ministro, kaj Kamiel Huysmans, antverpena socialista skabeno de publika instruado kaj deputito, estas respondaj pri la malprogresa marŝado de la neŭtrala publika lernejo. Ankaŭ la du partioj estas respondaj, ke la paroĥaj lernejoj jare ricevas milionojn da frankoj el ŝtataj, urbaj kaj provincaj kasoj malprofite al la neŭtrala instruado. Pli bedaŭrinde estas, ke la nuna nereligia plimulto faras tion, kion la plimulto da klerikaluloj en ĉambro de deputito kaj senato ne kuraĝis fari antaŭ la milito.

Post longa dormo kaj pro la ludema rolo de la du progresemaj? partioj, estas plaĉe rimarki, ke en diversaj urboj kaj vilaĝoj la liberpensuloj jam ne estas indiferentaj, kaj koncentrigas la fortojn por altiri la atenton de la popolo al la danĝero kiun prezentas la klerikaluloj kaj la kredoj, por la libereco de la spirito.

Lastatempe k-do Ernest, socialista deputito, prezentis en la ĉambro de deputitoj du leĝprojektojn pri la nereligia ĵuro kaj la kremacio.

K-do Fons. Engels, malnova liberpensulo, prezidanto de societo "De Solidairen", Antverpeno, kaj socialista urbkonsilanto ludas aktivan rolon kontraŭ ĉiaj preĝejaj kaj ekleziaj projektoj.

En "De Solidairen" kaj la Esperanta rondo "La rekta vojo" niaj du antverpenaj liganoj s-ro Frans Schoofs kaj Jan Jacobs estas tre aktivaj, farante paroladojn.

Krom tio ankaŭ en "De Solidairen" s-ro D-ro Speyers, socialista skabeno, tre lerte paroladis pri evolucio, kaj ĉiam la parolintoj havis grandan sukceson. Ankaŭ en Bruxelles s-ro Douanton paroladis en societo de liberpensuloj "La Libre Pensée" pri religiaj mensogoj. Lia parolado estis lerta kaj trafa.

En Mechelen (Malines) Namur, Wilryck, Seraing, Meenen, Chaleroi, Vilvoorde, la propaganda laboro aktiviĝis.

*Rik* (Antverpeno).

## Pri niaj Antaŭuloj

Por ni, nova generacio, estos granda surprizo scii, ke antaŭ la milito ekzistis tre agema Internacia Esperantista Societo Libera Penso. Ĉi tion ni eltrovis el dokumentoj transdonitaj al ni de S-ro A. Dauphin, kiu gardis ilin ĝis kiam ni vizitis lin en Parizo lastan Aŭguston okaze de la Kongreso de Fédération Internationale Sociétes de Libre Pensée.

La Societo Libera Penso estis fondita en la jaro 1907 per senlaca laboro de ĝia sekretario S-ro R. Deshays. Por havi pli da influo ĝi alfederis al la Fédération Internacionale des Sociétés de Libre Pensée kaj kunvenis dum liberpensulaj kongresoj en Bruselo, Munĥeno kaj Lisbono. Ĝi publikigis en Esperanto la verkon de batalema Niemojewski, kies originalo estis konfiskita de la cenzuristo en lia lando, kaj la lastan defendparolon de Francisko Ferrer, membro de Libera Penso, antaŭ la militista tribunalo. La societo metode propagandis nian lingvon inter la liberpensula gazetaro de ĉiuj nacioj. Ĝi ankaŭ dissendis belege presitajn flugfoliojn kaj invitojn al diversaj naciaj kaj internaciaj liberpensulaj kongresoj kaj kongresanoj, petante ke ili ĉeestu festenon de Libera Penso. Leteroj pruvas, ke la societo estis priatentata de famuloj en la liberpensa movado.

El bele presita cirkulero en franca lingvo dissendita al la famuloj de la lasta (antaŭ milita) internacia kongreso de la Fédération Internationale des Sociétés de Libre Pensée ni eltrovas, ke "amantoj de novaj lingvaj projektoj" ludis tiam, kiel hodiaŭ sian malpuran trukon (ruzo, artifiko); inter ili *aŭtoro* mem de la projekto diskutis kaj debatis pri la teoria perfekteco de sia lingvo (kiu lingvo jam ne plaĉas al liaj adeptoj), kaj fortiris la atenton pri la bezono havi vivantan lingvon jam uzata praktike.

El aliaj dokumentoj estas interesa letero manskribita de D-ro L. L. Zamenhof en kiu li promesas ĉeesti la kulturan festenon de Libera penso, se li venos al la X. kongreso en Parizo.

La Societo eldonadis monatan gazeton Libera Penso, vidu n-ro 1 de Liberpensulo por ilustraĵo de unu el ĝiaj frontaj paĝoj.

Por la X. kongreso en Pariso en 1914 ĝi aranĝis belegan programon kaj estis preta prezenti al la kongresanoj teatraĵon "La sorĉistino". Cirkulero estis dissendita al diversaj liberpensaj societoj, artistoj el diversaj landoj estis invititaj al la solena festeno. Multe da laboro farita. Ĉio pro milito rompita.

Tiutempe, kiel nun, estis tre malfacile al la sekretario havigi al si kotizojn. Antaŭ la kongreso en Praha, la sekretario-kasisto S-ro Rene Deshays raportas: "Kiel kasisto mi ne plendas; ni ĝuste povas porti la ŝarĝon de ĉi tiu kongreso dank' al sindonemuloj, kiuj estas ja ankaŭ mondonuloj . . . mankas al ni nombro. La societo sufiĉe bone fartus, se oni povus esti sana sen karno. Estas tempo, ke ĝi perdu sian nemoderan maldikecon."

Venis la granda milito en 1914, kiu interrompis la tutan agadon kaj la societo devis ĉesi sian ekziston.

En la jaro 1919 la sekretario, S-ro Rene Deshays, transdonis ĉiujn dokumentojn kaj monon Frankoj 393 al S-ro A. Daŭphin de la Centra Librejo Esperantista. Tiu tenis ĉion fidele en espero iam transdoni ĉion al la eble naskiĝonta liberpensa societo. Inter la dokumentoj estas la korespondado, membrokartoj kun adresoj kaj kotizoj, oficiala skribpapero, adresitaj kovertoj kaj kontlibro, ĉion en bonega ordo.

Vidante, ke nia Internacia Ligo de Liberpensuloj, naskiĝinta je la fino de 1923 staras nun sur solida "butero" S-ro A. Dauphin transdonis al nia Ligo la tutan tre utilan materialon, kaj al nia sekretario transsendis la Frankojn 393.

Ni heredis en kriza momento tion, kion niaj gloraj antaŭuloj noble postlasis al ni. Nenia pli granda rekompenco povas esti al niaj unuaj batalandoj por nia afero ol ke ni marŝu en la vojo montrita de ili. Ili bonege metode laboris kaj ni povas esti fieraj pri niaj antaŭuloj. Nia posteularo rikoltos tion, kion ni semos; do, ni vokas al ĉiuj sampensuloj-semadu. Kiu havas semon uzu ĝin, elirante en la apudan kampon kaj disjetante kion vi havas.

Vi, niaj bravaj antaŭuloj, lacaj pro batalo, kie vi estas ankoraŭ vivantaj en la mondo? La laboro ankoraŭ ne estas finita. Venu, ni vokas vin, ni bezonas vian kunlaboradon, kaj ni akceptos vin kun ĝojo en la kora kaj amike malfermitaj brakoj.

*T. Sujadinova-Yelland.*

## El la organizaĵoj

**Aŭstrio.** La *Landesverein der Freidenker Salzburg (Unuiĝo de la Liberpensuloj en Salzburg)* aliĝis al nia *"Internacia Ligo de Liberpensuloj"*.

**Ĉekoslovakio.** La unuiĝo de la ĉekasocialdemokrataj senkonfesiuloj (sidejo en M.-Ostraŭ) kun 7000 membroj. propra sekretariejo kaj gazeto estas likvidita per la influo de la ĉeka socialdemokrata partio. Laŭ ĉi partio liberpensula societo estas superflua kaj danĝera por la partio.

**Germanio.** Kvankam la krizo inter la membroj de la *"Komunumo de la proletariaj Liberpensuloj"* estas forigita, eksiĝis kelkaj gvidantoj kaj fondis *"Ligo de socialistaj Liberpensuloj"*.

La gazeto *"Monista Revuo"* enhavis kiel aldonon por ĝia liberpensa junularo, la memstaran gazeton *"Freier Kamerad" (Libera Kamarado)*. En ĉi gazeto oni publikigis Esperanto-kurson; sed post kiam estis aperintaj du lecionoj la kurso ĉesis. La idistoj kiuj malamike rigardis la aferon agitis ĉe la estraro de *"Monista Ligo"* por forigo de ĉi kurso. Nun la estraro postulis de la redakcio de *"Libera Kamarado"* la forigon de la Esperantokurso. Estas kompreneble, ke ĝi sukcesis, ĉar aliaflanke oni rezignus je *"Libera Kamarado"* kiel aldonon por la *"Monista Revuo"*. Tio signifus komercan malprofiton por *"Libera Kamarado"* ĉar tiamaniere oni perdis ĉirkaŭ 6000 da abonantoj. La esperantistoj, kiuj estas ankaŭ en la *"Monista Ligo"* la plejmulto, protestis kontraŭ tia agado. Sukceso: la estraro decidis la daŭrigon de la esp-a kurso.

**Holando.** La kongreso de la holanda liberpensa societo *"De Dageraad (La Aŭroro)"* kongresos pentekoston en Zeist.

Kotizo 1926 pagita.

## Landreprezentantoj

Anglio: S-ino Sujadinova-Yelland, 3 Fonthill Road London N 4.
Aŭstrio: E. Hübner, p. Adr. "Freie Weltanschauung" (Max Tonner), Salzburg, Fürstenweg 24.
Belgio: Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, Antwerpen.
Blankrusio: Dim. Snejko, poŝtkesto 33, Minsk.
Ĉeĥoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Ĉinio: Pandiŝo, N.Y.M.S., Lunghwa, Shanghai.
Francio: Emil Gasse, 15 place Gambetta, Le Havre
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Nederlando: vidu Estraro. (unua paĝo)
Polio: Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2, Lublin.
Rusio: Dunajev, Leningrad Gubkom Esperantistov, Smolnijprospekt 15, kv. 11.
Skotlando: Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, Glasgow.
Svedio: Einar Adamson, Göteborg, Box 73.
Usono: S-ro Karl Fröding, 419, 7 th. st., Rockford, Ill.

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.


# NOVAJ TEMPOJ

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de TAGE

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Specimeno kostas 0.25 mk. g.

Mendu ĉe:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**



## GAZETO "QUEEN SILVER"

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 15 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.

Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:

**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**

Germanoj mendu ĉe:

**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**


## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

*Herbert Hoppe,* Berlin-Britz, Germania Promenado 20 (Germ.), 19 jara, dez. koresp. pri liberpensa movado, vivreformo, vegetarismo.

*M. Jagoda,* Ostrolenka, Skrzynka poczt. 3 (Polio) deziras korespondadi per leteraj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

*Aleksandro Korovkin,* Str. de Lenin 59, Ufa (Sovet-Unio), deziras koresp. per leteroj, poŝtkartoj il. kun ĉiuj landoj. Nepre resp.

*Popov,* Gercenovskaja 54, Tomsk (Siberio). Mi korespondas pri liuto- kaj gitarludo, interŝanĝas muziknotojn.

*V. V. Kalaŝnikov,* Gruzinskij per 6, kv. 6, Nijnij-Novgorod (Sovet-Unio) deziras korespondi kun ĉiuj landoj per pk. il. Interŝanĝas esperantaĵojn.

"Ateista rondeto" en nia klubo deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ateista movado inter gelaboristoj — precipe inter laboristinoj. — Ĉiam respondos pere de kluba esp-a rondeto. Adreso: *Leningrad, Klub im. Zinovjeva, Tambovskaja ul. No. 63, Krujok Esperanto, Sovet-Unio.*

*S. B. Libermann,* Odessa (Sovet-Unio), ul. Kukovskaja 29, deziras korespondi kun sendiuloj de ĉiuj landoj.


**Mendu la kolekton de liberpensaj gazetoj**

(ĉirkaŭ 35 diversaj gazetoj).

Havebla ĉe la Ligo. Prezo: Por Germanio kaj Aŭstrio gm. 4.—, aliaj landoj gm. 5.— Poŝtelspezoj ne estas kalkulataj


## Forigu nian debeton

**ĉe la presisto per tuja alsendo de via kotizo. Germanoj uzu la enmetitan poŝtĉekan formularon.**

**Membroj pagintaj la kotizon por 1926 trovas ĉi tie glumarkon kiel kvitancon. Gluu ĝin en la membrokarton.**

## FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE OUVRIÈRE

**177, Rue de Bagnolet — PARIS (20)**

La VIa Kongreso de la "Fédération Esperantiste Ouvrière" okazos en Paris, dum Pentekosto (23.—24. majo). Tiuokaze la Laborista Grupo de la Pariza regiono organizos, la 22. majo je 20 h. 30, propagandan feston, en la ĉambrego de la Kooperativo "La Bellevilloise", 23, rue Boyer, Paris XX. La labor-kunvenoj lokiĝos ankaŭ tie.

### NEKROLOGO

En Romo de papoj kaj tiranoj la respublikanino

**K-dino M. A. CAMURRI**

mortis. La blinda fatalo turmentis ŝin per malrapida malsano. Ju pli ŝia korpo kadukiĝis, despli ŝia spirito fortiĝis kaj energiiĝis. Ŝi forlasis sian infanecan kredon de Vatikano por adori la diinon de Libereco.

La lumo de Vero kaj la tuta poezio de altaj ideoj, elirantaj el cerboj de grandulaj mensoj, trovis alfluon en la mirindan animon de nia "Romanino" Camurri.

Ploru por ĝi Ateismo, Liberpenso, Esperanto. Pri pli hela estonto la mondo ne malesperu, se inter ni vivas tiaj virinoj kiel k-dino Camurri.


# MONISTISCHE MONATSHEFTE

## Monatsschrift für wissenschaftliche Weltanschauung und Lebensgestaltung

Herausgegeben vom Deutschen Monistenbund.
Schriftleitung: Hamburg 36, Klein Fontenay 1

Aus dem Kreise der Mitarbeiter:

Dr. h. c. Graf von Arco / Berlin; Prof. Dr. M. H. Baege / Nürnberg; Prof. Dr. Paul Beck / Leipzig; Dr K. Bornstein / Berlin; Dr. Max Deri / Berlin; Landgerichtsrat E. Dosenheimer / Frankenthal; Pastor Emil Felden / Bremen; Professor Dr. A. Forel / Yvorne; Dr. Adolf Franck / Briesen; Rudolf Goldscheid / Wien; Prof. Dr. Th. Hartwig / Brünn; Dr. A. Heilbronn / Berlin; Prof. Dr. J. Herrmann / Stuttgart; Prof. Dr. E. Hertlein / Heilbronn; Rektor G. Höft / Hamburg; Otto Jenssen / Gera; Dr. A. Kammerer / Wien; Dr. Paul Krische / Berlin; Dr. John Mez / New-York; Prof. Dr. J. Petzold / Berlin; Dr. Richard Rahner / Gaggenau; Prof. Dr. Robert Riemann / Leipzig; Louis Satow / Hamburg; Prof. Dr. Heinrich Schmidt / Jena; Dr. Max Seber / Dresden; Dr. Helene Stöcker / Berlin; Prof. Dr. P. G. Unna / Hamburg.

Die Monistischen Monatshefte sind die führende wissenschaftliche Zeitschrift der freigeistigen Bewegung der Deutschen Republik

Vierteljährlich 1.50 M. Einzelnummer 0.50 M. Probenummer kostenfrei.

## Monistische Bibliothek

Die bisher erschienenen 41 Hefte dieser Schriftenfolge geben ein ausgezeichnetes Bild von Zweck und Ziel der monistischen Bewegung. Sie bilden ein vorzügliches Rüstzeug für den Weltanschauungskampf der Gegenwart.

**Hamburger Verlag G. m. b. H., Hamburg 36, ABC-Strasse 57**


Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

2a-Jaro, Numero 3 Dumonata Majo—Junio 1926

# Liberpensulo

Oficiala Gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj

Estraro de Internacia Ligo de Liberpensuloj: Prezidanto: *C. F. Everts*, Alb. Cuyp-Str. 169, *Amsterdam* (Holando). Vicprezidanto: *Gustav Weigel, Bodenbach-Peiperz 14* (Ĉekoslovakio). Sekretario: *Kurt Hubricht* (Adreso: vidu apude). Kunsidanto: *M. Bartzsch*, Lochmannstrasse 4, *Leipzig-Stötteritz* (Germanio). Landreprezentantoj: Adresojn vidu sur lasta paĝo.

Sekretariejo: Kurt Hubricht
Mariannenstrasse 22, I.
Leipzig-Neustadt (Germ.)
Poŝtĉeka
numero: 43808 Leipzig

Por membroj senpage. La kotizo por la Ligo estas laŭ plaĉo, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro. Manuskriptojn bonvolu sendi al la sekretario.
Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## Prof. Th. Hartwig

Prezidanto de la Internacio de Proletariaj Liberpensuloj.

Prof. Th. Hartwig estis naskita la 29. Novembro 1872. Estante la sesa infano en proletaria familio, li frue spertis la postan flankon de la vivo. Ĉar la patro ne povis daŭrigi lian studadon pro manko de rimedoj, Hartwig devis algajni per instruado. Li instruis en meza lernejo en Vieno kaj ankaŭ helpis studi al unu lernanto multe pli aĝa ol li.

Kiel 18-jarulo li jam servas en la socialista movado kaj faras paroladojn en laboristaj organizaĵoj. Kun 19 jaroj li faris paroladojn en scienca klubo de Vieno, metante antaŭ ĝi monismon kiel platonan ideon de la universo. Li dediĉis sin al parolado publika, ĉar li sciis, ke eduko en scienco estas la sola vojo al libera penso. En tiu direkto li laboris ĉe Viena Unuiĝo de Popolklerigado. Li vigle kunlaboris ĉe la, de Moritz Szeps eldonita, gazeto "Das Wissen für alle" (Scio por ĉiuj). Kiel suplemento al tiu gazeto li verkis "Lernejo de la matematiko"; la sama verko, en tri volumoj, estis eldonita de M. Perles, Vieno. Al lia plumo apartenas ankaŭ: "Enkonduko en la praktika fiziko", "La stereoskopo kaj ĝia uzado", "Konstrua stereometrio". Kiel helpilon por la instruado Hartwig elpensis aparaton: La kristalaj formoj de la mineraloj en stereoskopaj bildoj.



Prof. Hartwig
Prezidanto de la Internacio de Proletariaj Liberpensuloj

Vidante erarojn de tiamaj burĝaj mezlernejoj, li komencis en 1908 sian batalon por reformoj. Li presigis artikolojn en multaj gazetoj; kiel redaktoro de "Pedagogia Tempo" (aldono al Viena jurnalo "La Tempo"), li verkis kontraŭ la malnova metodo de instruado. Samtempe li publikigis broŝuron "La unueca mezlernejo", en kiu li propagandis por la transformo de la burĝa lernejo en kvarklasan elementan lernejon. La tuta instruistaro de la meza lernejo en Vieno estis kontraŭ Hartwig, kaj, kvazaŭ por puno, li estis sendita el Vieno al Brünn (Ĉekoslovakio). En Ĉekoslovakio Hartwig trovis la liberpensan movadon, jam starigitan de Lebenhart, kaj aliĝis al ĝi. De tiam li estas konstanta kunlaboranto en la asocia organo "Freier Gedanke" (Libera Penso), kiu estas malofte sen artikolo de nia amiko. Hartwig estas ankaŭ kunlaboranto de "Monistische Monatshefte" (Monista Revuo) de la tempo, kiam la Germana Monista Ligo alprenis en sian programon la sciencan socialismon. La monista literaturo riĉiĝis per la negranda, sed valora, broŝuro verkita de li "Historia monismo", Senco kaj signifo de la materialista historia percepto.

Dum la fondo de la Internacio de Proletariaj Liberpensuloj oni unuanime elektis Hartwig-on kiel prezidanton.

Hartwig ne estas nur teoriulo, sed ankaŭ praktikulo de la liberpensa movado. Prof. Riemann nomas lin en lastatempa recenzo 'la naskita popola oratoro".

Lia stilo ne havas tiun akademian tuŝon, en kiu estas vidata eduka supereco. Unu el liaj ĉefaj kapabloj estas, ke li ĉiam senvualigas la politikan karakteron de ĉiuj ideoj kaj montras, ke religio favorata de registaro estas ne nura afero de kredo, sed estas anima korupto de la popolo en intereso de la reganta klaso. Tio ankaŭ estas montrata en la programo de la Internacio de Proletariaj Liberpensuloj, kiun Hartwig verkis. Per tio la proletaria liberpensa movado estas metita en la servo de socialismo.

Hartwig interesiĝas ne nur pri la socia, sed ankaŭ pri la psika flanko de liberpensa movado; li scias, ke krom la sociaj ankaŭ la animaj malbonaĵoj devas esti kontraŭbatalataj, se oni volas eduki la proletojn klaskonscie.

Iam jezuita patro polemikis kontraŭ li kaj diris: "Se ne ekzistus Dio, tiam mi dissirus mian vestaĵon, ĉar la vivo ne havus sencon". Hartwig respondis: "Sinjoro patro! Dissiru trankvile vian veston kaj la neceson de via vivo mi ankaŭ ne komprenas." Hartwig scias, ke spritaĵo estas

trafa kaj akra batalilo kontraŭ la kontraŭuloj kies komercajo estas timigo kaj sentimentaleco. Ĉefe Hartwig kontraŭbatalas la hipokritulojn pro misuzado de religio inter proletario. Li detruas la malnovajn kaj konstruas neekleziajn solenojn por proletario. Li propagandas inter proletariaj virinoj, kaj estas agema ĉe la naturamikoj. Multaj agitbroŝuroj en tre simpla lingvaĵo devenas de lia plumo. Niaj liberpensaj esperantistoj sciu, ke la senlaca laboranto por homa kulturo estas subtenanto de Esperanto kaj kelk-foje li fervore propagandas nian internacian lingvon. *K. H.*

# Luter Burbank

Antaŭ nelonge ankoraŭ la pastroj instruis al homoj, ke akvo, fajro kaj fulmo estas malbonaj dioj, kiuj alportas ruinon al homaro, ĉar homoj ne sufiĉe preĝas. Nun kiam sciencistoj, laŭ sia homa volo, igas tiujn diojn movi turbinojn, ŝipojn, doni elektran lumon, tiri tramveturilojn, varmigi kaj hejti niajn domojn, movi nian potencan maŝinaron, la pastroj ĉesis nomi ilin dioj.

En la batalo por ekzisto homo komencis ĉirkaŭrigardi, observi la naturon. Lia serĉanta cerbo volis scii. Li penegis, li persistis penetri kaj eltrovi. Rezulte de tiu mensa streĉo, homo faris mirindaĵojn, pri kiuj la fantaziemaj cerboj de verkintoj de "sankta" skribo eĉ songi ne kuraĝis.

La lasta el tiuj mirindaj homoj — kreantoj — estis la ĵus mortinta ateisto Luter Burbank. Li fidis nur al penso kaj homa peno. En sia agrikultura laboro, al kiu li sin dediĉis, li iris por inspiro ne al dio, sed al Darwin. De li Burbank eksciis, ke la plantoj kaj animaloj sur la tero estas rezulto de natura elekto kaj de adoptiĝo dum daŭro de longaj milionoj da jaroj. Armita per tiu sola vero, li eliris krei novajn specojn de plantoj por la profito de la homaro. Li elektadis kaj hibridigis tute malsimilajn specojn de plantoj en sia malgranda ĝardeno en Kalifornio. Post 4 jaroj de eksperimentado tiu ĝardeno enspezis al Burbank 10 000 da dolaroj. Tio igis lin sufiĉe riĉa por havigi al si pli da tero kaj eksperimenti pli grand-skale.

La brila sukceso de lia eksperimento donis al Burbank famon de "miraklokreanto". Unue, li sukcesis krei specon de grandaj tuberoj, tre bongustaj kaj nutrigaj, similaj al terpomoj. Sur unu el ili li rimarkis specon de frukto aŭ veziko kaj ke en ĝi semoj estis. El tiuj semoj li havigis al si tutan vicon de diversaj tuberoj terpom-similaj. Unu el tiuj semoj donis specimenon, konata sub la nomo de Burbanka terpomo. Tiu unua rezulto instigis lin eksperimenti kun aliaj tre variaj specoj de kreskaĵoj. Rezulte de tiuj eksperimentoj ateisto Burbank kreis kaj postlasis por la homaro ĉirkaŭ 3000 da novaj specoj de fruktoj, legomoj, beroj kaj floroj kaj montris vojon kiel krei. Li kreis 65 specojn de prunoj, unu speco sen kerno. La bongusta bero logano, vendata ĉie en stanaj skatoloj, estas lia kreitaĵo, kiun li atingis per hibridigo de la frambo kun rubuso. Lia lasta laboro estis kreo de fruktodona kaktuso. Kaktuso kreskas nur en varmaj landoj, planto tute senutila. Burbank aperigis el ĝi specon de kaktuso, kiu estas kovrita abunde per oranĝsimilaj fruktoj. Tiu frukto iras kiel furaĝo por brutaro. Speco, kiu antaŭe donis 4000 kilogramojn da furaĝo por la brutaro, donas nun 72 000 da kilogramoj de kaktus-frukto. Bulbon, kiu antaŭe produktis nur florojn, Burbank igis doni novan specon de legomo, kiun li nomas "kamasio", konkuranta nun kun terpomo. Lia ordinara kuir-bulbo pezas 3—4 funtojn. De tiu bulbo li forigis la malagrablan odoron de bulbo kaj donis al ĝi aromon de floro.

La "prunkoto", kiu estas hibridigo de pruno kaj abrikoto, estas tre agrabla kaj dolĉa frukto.

Per hibridigo de amerika fi-herbo kun venena afrika planto, li kreis bongustan "sunfrukton".

En daŭro de 10—15 jaroj Burbank sukcesis kreskigi arbojn altajn 7—8 klaftojn, kies ligno estas firma, kiel tiu de 100-jara arbo.

Laŭ geologiaj eltrovoj oni scias, ke praavoj de niaj arboj estis gigantoj. Pro iu kaŭzo niaj arboj degeneris. Burbank trovis rimedon redoni al kreskaĵoj ilian heredan forton kaj kreskpovon.

Kontraŭe, al kaŝtanaj arboj li donis malgrandan kreskon, kaj liaj kaŝtanarboj estas nur 1—2 metroj de alteco. Laŭ li estas pli facile protekti la malgrandajn fruktarbojn kontraŭ insektoj, kaj la rikolto de fruktoj estas pli facila kaj pli ekonomia.

Amo al afero, eksperimento, scio, persisto kun pacienco ebligis al Burbank krei ĝis nun neniam konataĵn al la mondo kreskaĵojn.

En granda honoro leviĝis kontraŭ Burbank la kristana pastraro de Ameriko. Burbank pruvis en praktiko, ke, por krei diversaĵn specojn kaj formojn en la naturo, tute ne estas necesa dio. Tio ja subminas la aŭtoritaton de dio kaj dum miloj da jaroj sekuran pozicion de pastraro. El predikejoj ĉiudirekte estis sendataj anatemoj kontraŭ la ateisto Burbank.

Homa intelekto, eksperimento, serĉado, persisto tute submetigas la naturon sub sia volo. Baldaŭ ne restos iu laboro al biblia dio. Li fariĝas pli kaj pli senutila pro la ateista laboro de scienculoj. Restos al li aliĝi al la aro de aliaj mortintaj dioj kaj ripozi en la muzejoj.

Sed el ĉiuj la pastroj estas la plej kompatindaj. Plenigos ili la vicojn de niaj senlaboruloj en Eŭropo . . .

*T. Sujadinova-Yelland.*

# Letero de Parley Parker Christensen

ekskandidato por Prezidanteco por Usono en 1920 kaj nun ĉefo de la Farmista Labora Partio. Usono.

Mi estas tre malĝoja hodiaŭ. Mia tre bona amiko Luter Burbank mortis. Tion mi legis en mia usona ĵurnalo, kiu alvenis hodiaŭ matene kaj en kiu estis nur noto pri tiu granda homo kaj klerulo. Se li estus futbalisto aŭ boksisto, aŭ politikisto, ĉiu ĵurnalo havus grandan artikolon sur sia unua paĝo pri li.

Luter Burbank "La plant-sorĉisto" estis granda sciencisto. El vidpunkto de servo al homaro la plej granda de sia tempo.

Mi vizitis lin en jaro 1923 en lia hejmo Santa Rosa, Kalifornio, Usono, tre modesta konstruaĵo sur la limo de la urbo. Ĉirkaŭe kelkaj akroj da tero kovritaj per fruktoj kaj belaj floroj. Promenante tra tiu florriĉa kaj fruktriĉa paradizo, plejparte lia kreitaĵo, mi aŭdis la, tiutempe, 75-jaran maljunulon diri en tre ĝentila maniero: "La silenta potenco entenata en la vivo de plantoj estas destinita ludi estonte en la regenero de la homaro rolon, kiu igos sensignifaj la servojn faritajn de vaporo kaj elektro."

Li ankaŭ diris: "Kiu povas sufiĉe kompreni la altigan kaj nobligan influon sur moralo, kiun faras floroj? . . . Kun pli bonaj kaj pli boniĝantaj fruktoj, nuksoj, greno kaj floroj, la tero transformiĝos. La penso de homo forturnos sin de malaltaj detruaj fortoj al noblaj produktaj pensoj, kiuj levos lin sur altajn ebenojn por agado en la direkto al tiu feliĉa tago, kiam homo oferos al sia kunulo-homo ne kuglojn aŭ bajonetojn, sed pli riĉan grenon, pli bonajn fruktojn kaj pli kolorajn fruktojn."

Li tiam jam komencis enspezi sufiĉe por kovri siajn elspezojn. Kiel aliajn famajn homojn oni superŝutis lin per pli da honoro ol da mono. Multaj asocioj honoris lin per membreco. La Regna Agrikultura Societo en Svedlando, la Itala Regna Agrikultura Societo kaj la Scienca Akademio de Parizo faris lin sia Membro de Honoro. Dum honorigo en Parizo, kiam lia nomo estis menciita, ĉiuj ĉeestantaj akademianoj stariĝis kaj klinigis siajn kapojn en silento por kelke da momentoj. Dum scienculoj de la mondo staris en honoro antaŭ la nomo de Burbank, niaj Usonanoj moke ridindigis lin en ĵurnaloj pri lia insisto, ke estas vira kaj virina sekso en plantoj. Post kiam mi estis ĉe Burbank, mi vidas, ke estas ankoraŭ longa vojo marŝi ĝis perfekteco. Kiam li parolis al mi pri senkernaj fruktoj, pli bona fibro, kafo, teo, sukero, spicoj, ligno kaj aliaj kreskaĵoj por pli granda utilo al la homaro, mi pensis, kia bela kaj bona estus la mondo, se estus pli da Burbankoj.

Liaj amikoj kondukis la funebran ceremonion konforme al lia deziro, kviete, private, sen iu religia rito, kaj ĉe la en-

terigo citis liajn proprajn vortojn pri la atingo de la vivfino: "Se tiu ĉi vivo estis bona, tio sufiĉas. Ne estas bezono por iu alia. Estinte ĉi tie kaj malaperinte, per tio la vivo plenumis sian celon."

La laboro de Luter Burbank estis helpi al naturo kaj servi al homaro.

London, 27. Aprilo 1926.

Parley P. Christensen.

*Noto de Red.* Bedaŭrinde ni ne povis havigi al ni foton aŭ kliŝon de la mortinta liberpensulo sciencisto L. Burbank por nuna numero.

## Racio anstataŭ religia emocio

La 6. Oktobro s-ro J. M. Robertson*) prelegis la supran temon ĉe la kunvenejo de la Racionalista Pres-Asocio en Londono. Sekvis vigla debato. Jen la resumo de la prelego:

Oni povas dividi kristanismon en tri partojn: 1. fundamentismo aŭ absoluta kredo en skribita vorto de la biblio; 2. instituciismo; 3. eksperimentismo aŭ la alpreno de novaj pozicioj por defendi religion. La moderna kristano ne klopodas ĉu vera aŭ justa estas lia religio. Li pravigas kristanismon pro religia sperto. Li spertas sanktan emocion, kaj tio sufiĉas. Li diras: "Oni sekvu sian senton kaj kredu al dio, se tio kaŭzas senton de feliĉo".

Kristanismo estas riĉa je emocio, ekzemple: la sento de komuneco kun Dio, la doktrinoj de savo kaj patreco de dio. Ankaŭ estas la grandioza ritaro de la roma eklezio. Ĉio ĉi tio valoras multe en la opinio de la kristana apologisto.

Oni ne forgesu, ke emocio estas afero grava ĉe la prareligioj. La adorantoj de Baĥuso kaj de Kriŝna ja freneziĝas. Kaj, sendube, la hommanĝanto sentas ravegan religian emocion ĉe sia festeno. Kvankam kristana misiisto insistas pri la graveco de emocio en sia propra religio, li tamen diras al sovaĝulo: "Via emocio estas malprava; vi ne povas pravigi ĝin pro ĝia intenseco."

Kelkaj personoj argumentis, ke emocio estas la antitezo de rezono, kaj sekve racionalisto ne povas esti emociema. Jen falsa ideo. Racionalismo ne estas rezono nur, sed la vivmaniero ankaŭ. Racionalisto estas homo, kies vivo estas regata aŭ gvidata de rezono. Verdire, inteligenta homa vivo sen emocio estas neebla. Eĉ solvo de matematika problemo naskas senton de kontentigo.

Religio ofte limigas la amplekson de homa emocio; kaj homo, post liberiĝo el malvasta puritanismo, povas pli plene plezuriĝi en arto, dramo ktp. Liberpensulo ne timas faktojn, kiujn al li prezentas la scienco, kaj li povas pleniĝi je intensa emocio, kiam li konstatas la mirindan vastecon de la universo. Neniu povas aserti, ke la du anglaj poetoj *Shelley* kaj Swinburne, kvankam ateistoj, estis sen emocio. Oni povas ja diri, ke ilia emocio estis tute ne regata de rezono. Tio ne estas racionalisma maniero.

*Mark Emberson.*

*) S-ro Robertson estas konata humanisto, verkisto kaj prelegisto. Membro de Brita parlamento 1906—18, kaj membro de ministraro 1911—15.

## Paŝo el Pasinteco

Iomete antaŭ la jaro 1000 la tuta socio estis sub la kontrolo de la eklezio. Papo provis regi la tutan mondon.

La naciaj reĝoj ne volis cedi sen batalo siajn privilegiojn. Okazis multaj bataloj inter la katolika papo kaj kontraŭantaj reĝoj. Elstarantaj personoj de tiu epoko estis Hildebrando, tiam estanta papo Gregorio VII. (1073—1087), kaj Frederiko Barbaroso II., imperiestro de la, tiel nomata, Sankta Imperio, samtempe imperiestro de Germanio kaj Aŭstrio.

Hildebrando celis regi super la tuta tero nek nur spirite, sed ankaŭ teritorie. Lia logiko estis: "Ĉio apartenas al Dio, do, ĝi devas ankaŭ aparteni al Liaj teraj reprezentantoj, la katolika eklezio".

Krom militoj kontraŭ feŭdalaj potenculoj, papoj organizis Sanktajn Krucmilitrojn. Ilin gvidis kristanoj el Okcidento kontraŭ la sadukeoj en Oriento, ĉe Jerusalemo.

En tiu tempo la teroj ĉirkaŭ la Ruĝa Maro estis konkiritaj de la sultano Saledimo. Li tributis la komercaĵojn, trapasantajn lian landon per imposto. Tiu ĉi tributo ŝajnis peza al la komercistoj de Italio. Ili influis papon, kaj li starigis krucmiliton kontraŭ la sultano. Estis 8 militiroj en periodo de 1095—1270 (du centjaroj).

En 1212 estis Sankta Militiro de infanoj, dum kiu miloj da infanoj-knaboj marŝis tra Centra Eŭropo al Konstantinoplo. Tie la plejmulto da ili mortis pro malsato. Iliaj suferoj estis teruraj; mankis al ili ĉefaj necesaĵoj, manĝaĵoj ktp.

La lastaj militiroj estis skeletoj sen ardo. Por gajni favoron de militistaj nobeloj, papo promesis al ili la rajton dividi inter si la konkiritajn rabaĵojn. Al la honoro partopreni en krucmilitiro estis, tiamaniere, aldonita allogaĵo ĉi tie sur la tero, Al la falontoj en milito la eklezio promesis feliĉon en la ĉielo. Do, ĉio favoris al la nobeloj por partopreni krucmilitiron. Ili iris por preni oron sur la tero kaj oron en la ĉielo.

Kun teruro oni tiam atendis la alvenon de la jaro 1000. En la profetaĵoj de biblio la eklezio legis, ke la fino de la mondo okazos en la jaro 1000. Pro tio pastraro insiste postulis, ke oni preĝu multe por forviŝo de la pekoj; ankaŭ pastroj urĝis la nobelojn fordoni iliajn terojn al la eklezio. Kiam la jaro 1000 pasis, kaj nenio okazis, ĉio restis kiel antaŭe, la antaŭaj terposedantoj postulis, ke la eklezio redonu al ili iliajn terojn. Komprenebla, la eklezio rifuzis tion al ili. Kontraŭe, la sanktaj pastroj ĵetadis malbenojn sur ilin. Oni eĉ supozas, ke la lastaj krucmilitoj estis organizitaj kun la celo, fortiri la baronojn de iliaj posedaĵoj, kaj ke ili pereu kiom eble grandnombre en militiroj, por tiamaniere posedi iliajn terojn.

Papo Hildebrando, Gregorio VII., proklamis dekreton, kiu malpermesis edziĝon al eklezianoj. La edzinojn de la pastroj li fordonis al la nobeloj. La celo de tiu dekreto estis, ke la tero post la morto de eklezianoj restu propraĵo de la eklezio katolika kaj ne estu dividita inter la idoj de la edzigita ekleziaro (1450).

Ĉirkaŭ tiu tempo la anglaj fabrikistoj komencis bredi ŝafojn por lana industrio. Ili simple forpelis la kamparanojn el iliaj teroj kaj lasis ilin nutriĝi per preĝo al dio. En tiu tempo homoj faladis kiel muŝoj pro malsato. La monaĥejoj, kiuj kutime zorgis pri la malriĉuloj, estis tiam plejparte fermitaj, kaj tio pliakrigis la situacion de la malsatuloj.

En tiu tempo (1453) Venecio, la plej floranta komerca urbo de Italio, falis en la manojn de turkoj, kiuj jam atakis la centron de tiama kulturo, Konstantinoplon. La komerca centro translokiĝis en la centron de Eŭropo. Sude estis ĉiam minaco al la komerco de turkoj. Tiu estis la tempo de serĉado de novaj vojoj. Kristoforo Kolumbo pruvis, ke la tero estas ronda, ne plata, kiel la eklezio instruis. Turkoj pli kaj pli surmetadis impostojn sur la komercaĵoj, trairantaj ilian aurbon. Ĉie okazis tia granda ekonomia ŝanĝo, ke la cerboj de homoj ne povis resti netuŝitaj. Pensmaniero de la homoj komencis ŝanĝiĝi. Iliaj kredoj skuiĝis. La riĉuloj profitis de la momento, komprenebla, je perdo kaj sufero de la popolo, kaj vastigis kiom eble la necertecon.

En favora momento la teroj de la monaĥoj estis ŝtelitaj de la nobeloj kaj la reĝo angla, kiu fortiriĝis de la tiama oficiala internacia kredo sub la katolika papo.

La reĝoj de diversaj landoj deklaris sian rajton regi en siaj landoj sendepende kaj aŭtokrate. Por tion efektivigi, ili ŝanĝis katolikismon en eklezion, nomata protestantismo.

Establiĝis religio nacia anstataŭ internacia.

*I. Floro.*

## Potpurio en la regno de dio

150 blankuloj atakis la nigrulan kvartalon en New Jersey (Usono) la 26.an de Aprilo de nuna jaro. Ili bruligis la Negran Baptistan Preĝejon, ĉirkaŭis domojn de negroj, perforte elĵetis ilin grandamase sur la stratojn. La armitaj policanoj ĉe la stratanguloj tute aprobe rigardis la kristanan agadon de blankuloj kaj intervenis, por savi la vivon de tri negroj, kiujn oni intencis linĉi. Vi vidu, la tuta afero komencis ĉe Armour Company Fertilizer Works (Fekundigila fabrikejo Armour Kompanio) ekster la urbo, pro la malaltaj salajroj, kiujn la negroj estas devigataj akcepti. La

blankaj fratoj en Kristo ne longe filozofiis, kiam ili bezonis sangon de siaj nigraj fratoj en Kristo. Ili simple pretekstis, ke iu pugnobatalanto blanka estis mortigita, kaj kompreneble devas esti nigrulo kiu faris ĝin, kaj ĉiuj nigruloj, kiuj akceptis pli malaltajn salajrojn, tiamaniere estas venĝataj kaj... la netaŭga Kristo en sia preĝejo.

*

Dum Esperantista Kongreso en Edinburgo kristanoj diservos en la katedralo St. Giles. Pastro Grahame Bailey el Londono dankos al Dio, ke homoj faris la tradukon de la tuta biblio. — Ne estas bone, ke kreduloj preĝu en Esperanto kaj devigu sian dion je liaj maljunaj tagoj lerni novan lingvon. Malbonŝance ili povas kolerigi per Esperantaj preĝoj Dion. Ni atentigas la kristanojn al precedento dum la konstruado de la turo de Babelo. Traduko de la tuta biblio estas sendube grandega laboro; des pli, se oni konsideras la korektojn, faritaj de kristanoj en la originala traduko de Zamenhof.

*

En la preĝejo de Hampstead (antaŭurbo de Londono) oni senvualigis monumenton al ĉevaloj falintaj en la mondmilito. Ne estas ŝerco, sed fakto. Kial ne fari tutan menaĝerion de hundoj, kolomboj ktp.? Ili ankaŭ falis en la milito.

*

En unu vilaĝo de Turingio (Germanio) okazis, ke la pastro kaj la instruisto (ambaŭ drinkemuloj) eltrinkis la provizon de vino destinota por la Sankta Vespermanĝo. Kiam venis la tago de eŭkaristio, oni konstatis, ke ne estas vino por la soleno. Ne sufiĉis tempo por alporti vinon el la plej proksima urbo. Oni diskutis en la pastra domo, ĉu preni sukeran akvon aŭ kafon; fine estis decidite uzi bieron ĉe la soleno. Post mallonga prokrasto komenciĝis la soleno. La kamparanoj rimarkis la trompon, kaj estis multe da babilado en la vilaĝo. Se ĉiufoje ĉe la Sankta Vespermanĝo Dio transformas ordinaran vinon en veran sangon de Kristo, kial li ne ŝanĝu bieron en vinon? Por li tiu ludo estas facila afero, kial ne?

*

La plej malfacila afero nuntempe estas diri pri episkopoj, ne ke ili ne kredas en kristanismo, sed ke ili kredas. Estas granda diferenco inter episkopoj kaj ilia ŝafaro. Sincereco en interpretado de kredoj de primitivaj sovaĝuloj enpoŝigas al ili ĉiujare de kvin ĝis dekkvin milojn da anglaj funtoj, kaj donas al ili unu aŭ du palacojn. Sed sincereco, kritiki kristanismon, povas konduki en malliberejon, kaj kristanoj dirus: Tiu ricevis, kion li meritis.

*

Estas multaj diversspecaj problemoj por solvi: kontrolo de naskiĝoj edziĝoj, edukoj, sociaj, politikaj ktp. por igi la homaron pli feliĉa. Kristanoj iras al biblio, por tie trovi, kion pensis duonbarbara homo antaŭ kelkaj miljaroj, aŭ kiel rigardis la seksproblemon la "pastroj" en Malluma Epoko. Ni vivas en 20a jarcento kaj jam ne taŭgas leĝoj verkitaj por sovaĝuloj, niaj leĝoj devas esti konformaj al nia scio kaj civilizo.

*

Kristanoj estas ĝuste tiuj, kiuj tute ne komprenas la lingvon de sia Dio. La Sava Armeo konstruigis novan halon por sia Festo de Rikolto. Dio sendis fajron, kiu forbrulis la orgenon kaj donacojn, destinitaj por danki lin. Li montras al ili per fajro, ke li ne volas akcepti iliajn oferojn, kaj, eble, ke li tute malaprobas la Savan Armeon.

*

Ĉu estas limo de absurdaĵoj al kiuj religiuloj estas kapablaj? En Usono iu religia gvidanto kuracas ĉiajn malsanojn per "benitaj naztukoj" kaj publikigas atestojn de ĉiarangaj homoj kiujn la naztukoj kuracis. En Anglio iu s-ino R. J. Fox ludas similan ludon. Ŝi estas ĉefo de "Panaceo-Movado" kaj, ŝi reklamas, ke ŝi kuracas astmon, venenigon de sango, bronkiton, reŭmatismon, ftizon, kanceron, surdecon, blindecon, financajn malfacilaĵojn ktp. de homaro. Estas necese nur skribi leteron al ŝi, klarigante vian specialan malsanon, kaj por tre negranda rekompenco s-ino Fox sendos al vi poŝtkarton. Ĉi tiun karton oni metas en akvon kaj, poste aŭ trinku la akvon aŭ lavu vin en ĝi. La kurackapablo de la poŝtkartoj venas pro ilia kontakto kun la Nova Testamento. Ŝi publikigis leterojn de kristanoj, kiuj atestas pri sia resaniĝo. Kaj ĉiuj ĉi homoj havas rajton voĉdoni. Kie estas nia kuracistaro kaj alienistaro?

*

En Londono ĉe Walworth Road, la fratoj Jeffreys ankaŭ havas kompanion de kuracado. Ili reklamas, ke ili povas igi la bindulojn vidi, mutulojn paroli, surdulojn... ktp. Bedaŭrinde ili ne povas igi ĉiujn vidkapablajn homojn vidi, nek stultajn homojn havi sencon.

*

Kiel kristanoj povas esti aliaj, kiam oni de infaneco plenigas iliajn kapojn per mitoj, legendoj, ferakontoj, stimulas iliajn emociojn kaj pretigas ilin kredi al iu religia aŭ politika ĉarlatano. La scienculoj kaj liberpensuloj estas kontentaj, ke ili persone liberiĝis el religiaj ĉenoj, retiriĝas de la gvidado de homara cerbo kaj lasas la ĉarlatanojn grade ekkapti sentojn de la loĝantaro, eniri en la lernejojn, ministrejojn, gazetojn, ĉien, por denove regi la homaron kiel dum la malluma epoko. Estontaj generacioj, kiam ili estos bruligataj vivantaj, kulpigos nin, ke ni sen batalo fordonis nian rajton al Regno Intelekta kaj lasis la tutan danĝeran laboron al ili.

Kristanoj, speciale oficialaj kaj neoficialaj pastroj, estas kontraŭ kontrolado de naskiĝoj. Ni estas multe pli intelektaj en mekanikaj aferoj ol en aferoj fundamentaj. Se ni havus kranon, kiun ni ne povus fermi kaj la akvo fluadas, ni tuj sendus por plumbisto. Sed, se hejmoj estas inunditaj per tro da infanoj laŭ la enspezo de la familio aŭ la sano de la patrino, komenciĝas senfina diskutado, ĉu estas ĝuste turni la kranon kaj fermi ĝin. Iru en la stratojn de riĉuloj, tie vi vidos nur unu aŭ du infanojn, sed en la stratoj de malriĉuloj vi troviĝas en bredejoj kaj mizerejoj.

*

En romkatolika gazeto, eldonata de episkopo de Auckland, Nov-Zelando, estas artikolo por katolikoj. Tie oni sciigas, ke kvankam katolikoj en tiu lando estas nur dudekono de la loĝantaro, kaj en Ameriko dekono kun simila proporcio en aliaj landoj, "la katolikaro ne estas sekto aŭ opinio, sed estas la atestanto de vero. Kaj estas anomalio kaj komikaĵo, ke la katolikaro Roma, posedanto de vero, kunligita kun la realeco, komprenante la universon kaj ĝian naturon ktp.... estu submetata al leĝoj faritaj de aliaj homoj."

Laŭ katolikoj estas ili kiuj devas fari leĝojn por si kaj aliaj. Nun vi scias, kiaj estas idealo de katolikaj kristanoj, nome, ke la tuta mondo estu sub kontrolo de Roma Eklezio. La supra estis presita en katolika gazeto, kun la scio, ke aliaj ne aŭdos pri ĝi. Kial ili ne skribas tion malkaŝe al ĝenerala publiko, ne estas necese, al ili kaŝi la veron, estante la reprezentantoj de vero. Sed la kristana eklezio kaj speciale la roma estas ĉiam "la granda mensoganta eklezio".

*

"Polska Zrbojna", legata precipe de militistoj, enhavis jenan raporton el Aleksandrow-Kujawski:

Eksterordinara ĉielfenomeno.

La 26.an de Januaro de nuna jaro je la 20. h. oni rimarkis sur la ĉielo ruĝan strio moviĝantan de Okcidento al Oriento. La fenomeno kaŭzis diversajn komentojn: oni profetis pri fino de la mondo, milito kaj aliaj malfeliĉoj; sed unu el observantoj asertis, ke sur la strio li legis per lorno vortojn: "Ave Maria".

Belega floreto por bukedo el azenherbejo, sur kiu sin paŝtas specimenoj, ankoraŭ vivantaj en mezepoko.

Aleksandrowanoj forgesis raporti, ke sur la ĉielo estis ankaŭ skribite: "Neelĉerpeblaj estas la profundoj de homa stulteco".

*

Iu pastro, en sutano aŭ sen sutano, petas nin Liberpensuloj, en la gazeto Libero, ke ni ne miksu eklezion kun religio. Nu, el historio ni scias, kaj nun pere de Oomoto ni vidas, ke eklezio estas tiu, kiu elpensas religiojn kaj ilin propagandas. Religion ne laŭmodan oni nomas

superstiĉo; superstiĉon laŭmodan oni nomas religio. Ĉu hieraŭa ĉu laŭmoda superstiĉo, ni nomas ĝin superstiĉo.

*

El Vatikano venis sciigo pri akra konflikto inter papo kaj unu el kardinaloj. Papo intencis proklami novan dogmon, nome, ke Dipatrino troviĝas en homa korpo sur la ĉielo kaj estas tiel same grava kiel Dio.

Estas bedaŭrinde, ke ĉe kristanoj estas nur „sankta triunuo". Se estus iom pli, ni diru almenaŭ „centunuo", kara papo, post mallonga tempo la ĉielo similus al Olimpo. Tiam ni havus plej diversspecajn gediojn, inter ili, certe, kontraŭliberpensan, kiu speciale kontraŭbatalus abonenajn liberpensulojn, kiuj volas antaŭ ĉio forigi inter Dio kaj homo ĉiajn perantojn, pastrojn kaj ankaŭ nia kara papon. Oni povas ankaŭ tion atendi de la elpensema anstataŭanto de Kristo...

## Liberpenso en Aŭstrio

La plej fama kaj forta bastiono de romkatolika pastraro antaŭ la mondmilito estis Aŭstrio. Kaj nun en la respublika kaj etigita Aŭstrio la samaj reakciaj faktoroj regas la politikan situacion. La NERA (katolika partio), kiel iam, ludas la ĉefan rolon. Ĉi tiu lando meritas sian ironian nomon "Regno de Monakejoj".

Mi transiru al batalo pro kulturo en nia respubliko, kiun la liberpensuloj havis kaj havas. Antaŭ la milito la unuaj liberpensuloj en Aŭstrio estis plejparte membroj de burĝaj liberalaj partioj. Sed pro politikaj kaŭzoj de jaro al jaro, la nombro de tiuj liberpensuloj velkis. Kaj hodiaŭ en Aŭstrio ne ekzistas plu unuigitaj burĝaj liberpensuloj. Dum la milito liberpensula movado tute ne ekzistis.

Post la milito, el restaĵo de malnovaj grupoj, kaj parte de nove-fonditaj grupoj, naskiĝis proletaria liberpensa movado en Vieno kaj aliaj ĉefurboj, kiel Graz, Linz, Salzburg, Innsbruk ktp., kiuj formas pli malpli grandajn grupojn.

En la granda movado de Vieno mi devas mencii nomon de Angelo Carraro, la maljuna kaj plej eminenta liberpensulo de Aŭstrio. Multaj aliaj famaj homoj oferis siajn fortojn al Liberpenso.

Sed estis, precipe, en la provincoj, kie la malegoistaj batalantoj, nelacigeblaj, agis por la bela idealo. Kaj fakte, pli malfacila, sed pli grava por nia libera estonto, estas konstanta agado kaj instruado en la provinco kaj vilaĝo. Tie, kie estas la grandaj fortikaĵoj de niaj malamikoj, tie libere pensanta homo devas havi feran opinion, fajran kuraĝon kaj paciencon, paciencon... Pri tiuj vilaĝaj pioniroj oni malmulte aŭ nenion aŭdas hodiaŭ en la grandaj liberpensaj gazetoj. Tie oni mencias nur la grandajn nomojn.

Jen miaj spertoj pri la malfacilaĵoj de liberpensa laboro en etaj lokoj. Mi estas liberpensulo depost kiam mi komencis pensi. Mi estas preskaŭ 42-jara. Dudek jarojn mi estas en la servo de la ŝtato. El ili mi vivis 15 jarojn en la montaraj vilaĝoj de nia bela alplando Salzburg. Jen faktoj de nia vivo: 1. Ŝtatoficisto, kiu ne iras dimanĉe en la preĝejon por aŭskulti al la sensenca pieca, miksita kun politiko, parolado de la pastro, estas pli malestimata ol mortigisto; 2. Estas ruĝaj vilaĝestroj kaj aliaj komunumaj reprezentantoj (anoj de la aŭstria laborista partio), kiuj iras en la preĝejojn kaj partoprenas en ekleziaj procesioj kun manoj falditaj, vizaĝoj funebraj, lipoj murmurantaj preĝojn. Kompreneble, tio ne estas malpermesate laŭ la programo de la aŭstria laborista partio, sed, certe, tio ne helpos iel atingi liberecon; 3. Ni havas socialistojn, kiuj asertas, ke la liberpensa movado malhelpas propagandon de socialismo. Eĉ la gvidantoj de la nacia ruĝa partio tion diris lastan jaron dum politika agrara debato de la socialdemokrata partio en Vieno.

Laŭ mi, oni ne povas servi al du kontraŭaj ideoj; oni ne povas esti prolaboristaj kaj samtempe proeklezio, kiu estas malamika al laboristoj. Oni ne rajtas nomi sin "Socialisto" kaj samtempe nei la devizon de la granduloj de socialismo. Bebel diris: "Kristanismo kaj socialismo estas movadoj antagonistaj, kiel fajro kaj akvo."

Nia tasko estas nun, per liberpensa movado konservi la purecon de la socialista internacia ideo. *Felix Richter.*

## Alvoko!

Ni — homoj de Religio de Saĝeco, religio sen dio.

Ni — serĉantoj de kosma vero.

Ni — sopirantoj por homa feliĉo.

En ni tri impulsoj — soifo por Forto, soifo por Belo kaj soifo por Vero.

Nian alvokon ni elsendas al ĉiuj, kiuj ne droniĝis en la ondo de malamo kaj kolero; — al ĉiuj, kiuj forturniĝis de la mensogo kaj malkuraĝo; — al ĉiuj lumon amantaj kaj veramaj homoj; ni alvokas al la nuda homaro.

Ĉar ni multe suferis meze de besta hurlado.

Ĉar ni longe atendis homan voĉon.

Ni homoj de saĝeco dediĉas nian vivon por servo al la granda homaro.

Ni — infanoj de la Universo, ni — kosmopolitoj, ni — individualistoj. La forton de nia intelekto, sento kaj volo, la penson, amon kaj agojn niajn, nian konstruan filozofion, arton, ĉion grandan kaj belan, kio vivas en ni, ni metas sur la altaron de nia servo.

Ni atendas niajn fratojn laŭ spirito, vin filoj de la homaro, venu kun ni.

Adreso: A n a t o l i j. Poĉt. od. S a m o p o m o ŝ ĉ, Leningrad, USSR.

Esperanto estas oficiala lingvo de la Religio de Saĝeco.

## Subtena kaso

Karaj sampensuloj!

Leginte kun plezuro numeron de nia gazeto ĉiu senpacience atendas la sekvontan numeron. Ni legas, sed neniam pensas kiel la gazeto estas preparata, nek kiu pagas la presiston; tiajn zorgojn, kiel legantoj, ni ne havas. La gazeto aperas, kaj ni estas kontentaj.

Nia sekretario kun la helpo de kelkaj sindonemuloj faras ĉian laboron tute senpage, kelkaj helpantoj eĉ pagas siajn administrajn poŝtelspezojn. Ili faras tion plezure. Por ne havi monajn zorgojn estas necese, ke niaj membroj akiru por la ligo pli da novaj membroj. Ĉu vi, leganto de ĉi tiuj linioj, iam varbis alian Esperantiston al nia ligo? Se ne, ni insiste petas vin esti varbanto, ĉar ni ne havas oficistojn varbistojn.

Nia Ligo estas vi, kaj antaŭ vi ni metas nian pozicion. Nia sekretario prenis sur sin ĉian financan zorgon. Ĉar li ne estas riĉulo, sed nur laboristo, li trovas sin en financa embaraso pro kosto de presado de nia gazeto; la presisto ĉiam postulas monon. Jen bilanco por jaro 1925:

| | | Enspez. Markoj | Elspez. Markoj |
|---|---|---|---|
| Kotizoj 1925 | | 693.— | |
| Liberpensulo n-o 1 (Komposto, preso, papero kaj kliŝo) | | | 209.— |
| Liberpensulo n-o 2 | | | 147.50 |
| „ „ 3 | | | 178.— |
| „ „ 4 | | | 164.— |
| „ „ 5 | | | 206.— |
| Aliĝiloj | | | 12.— |
| Membrokartoj | | | 5.— |
| Leterpaperoj | | | 16.50 |
| Kion vualas la biblio? (Papero kaj Preso) | | | 48.— |
| Poŝtelspezoj | | | 124.40 |
| Diversaĵoj | | | 60.— |
| | | 693.— | 1170.40 |
| | Deficito | 477.40 | |
| | Markoj | 1170.40 | 1170.40 |
| 1926 Debeto | Markoj | 477.40 | |

En la kotizoj estas ankaŭ enkalkulata la sumo de fr. fr. 393.— el Parizo. "Diversaĵoj" reprezentas elspezojn: Propagando, multobligo de leteroj, admonoj ktp.

Do vi vidas, ke lastan jaron nia sekretario devis pagi 477.40 germanajn markojn. Laŭ mi, ne estus bone niaparte, se ni ne helpus al li. Mi do proponas, ke ni malfermu s u b t e n a n k a s o n, en kiu helpemaj liganoj kontribuu por forviŝo de la deficito.

Via en batalo por libera penso.

E. E. Yelland.

## Listo de subtenantoj

| | |
|---|---|
| S-ro Grout | 10.50 mk. |
| E. E. Yelland | 20.— mk. |
| T. Sujadinova Yelland | 20.— mk. |
| Kurt Hubricht | 20.— mk. |
| J. Huysmans | 24.— mk. |

## El organizajoj

**Ĉekoslovakio.** "Ligo de la Proletariaj Liberpensuloj" decidis konstrui kremaciejon.

Preskaŭ ĉiuj liberpensaj organizajoj, — ĉekaj kaj germanlingvaj, ankaŭ socialdemokrataj kaj komunistaj, — decidis en siaj kongresoj formi kune unu asocion. Tiamaniere estos kreita unuigita fronto kontraŭ reakcio kaj pastraro.

**Germanio.** "Proletaria Liberpensula Junularo" kaj la "Unuiĝo de la Liberpensuloj por Kremacio" (400 000 membroj) filiiĝis al la "Internacio de Proletariaj Liberpensuloj".

La 6. Junio okazis en Essen (Ruhr) la "I. Proletara Liberpensula Mitingo" por distrikto Rejnlando-Vestfalio.

Jam frumatene alvenis aroj da liberpensuloj kun muzikistaroj, flagoj, standardoj kaj propagandafiŝoj al Nordparko. 9—10 000 da samcelanoj kunvenis sub devizo "Libereco". Ne estis sufiĉe da spaco en la grandega Nordparksalono por ĉiuj ĉeestantoj. Antaŭtagmeze okazis impresplena procesio en grandurbo Essen. Interalie ankaŭ ni prolet. Esp.-istoj partoprenis multnombre sub 4 ruĝaj Esp.-Flagoj.

Antaŭ ĉio, ĝojinde estis unueca fronto de la geliberpensularo, kiu pruvis al niaj kontraŭuloj, ke ni nuntempe ne plu estas sensignifa malplimulto.

Posttagmeze diversaj orkestroj, kantunuiĝoj, sportuloj k. t. pl. prezentiĝis: krom alparoladoj de ĉi-distriktaj parolantoj, parolis entusiasmige prezidanto de "Proletara Liberpensula Internacio", profesoro Hartviĥ el Brno (Ĉekoslovakio). La parolintoj bonege scipovis plifortigi la volon al batalo por nia ideo inter la ĉeestantaro.

## Prokreda teroro en Polio

En Polio ekzistas tre liberala konstitucio kun sekvanta paragrafo (n-o 111): "Al ĉiuj socianoj oni garantias liberecon de konscienco kaj de kredo. Neniu sociano pro sia kredo kaj pro siaj religiaj opinioj povas esti limigita en rajtoj" . . .

Tia estas la konstitucio, sed realo estas alia. Pro konservativemo de la pola socio kaj pro privilegioj, donitaj al la pastraro per antaŭa rusa, aŭstra kaj germana imperiestraj registaroj, la supre citata paragrafo de la konstitucio estas nur ĥimero, nur espero.

En realeco en Polio regas kreda teroro, ĉar forestas reguloj, kiuj devus funkciigi ĉi tiun parton de la konstitucio, kaj ĉar oni lasis la plenumon de leĝoj en manoj de la pastraro. Tiuj perfortas kredon sur la civitanoj.

La rusa cara punkodo estas nun deviga. Tiu ĉi kodo en paragrafo 73a severe punas blasfemon kontraŭ dio, sanktuloj, sakramentoj, biblio kaj religiaj dogmoj.

Per ĉi tiu punkodo kristana dogmatismo estas gardata kaj ĉiu kritiko de religio kaj esprimoj de libera penso estas punataj per ŝtataj tribunaloj.

Jen nur du ekzemploj de la kreda teroro en Polio:

1. 11. Marto 1926 distrikta juĝo en Radom (vojevodeco de Kielce) kondamnis s-ron Zygmunt Pakonia al ses monatoj en citadelo pro aserto, ke Kristo ne estis dio, sed homo-reformisto kaj, ke sanktulo Stanislaw Szczepanowski* estis ŝtelisto.

(Proceso n-o 2. K. 27/26.)

2. 13. Aprilo 1926 kasacia juĝo en Varsovio konfirmis la juĝdecidon de apelacia juĝo en Lublin kondamni s-ron Wincenty Macios al 2½ jaroj da punlaboro en malliberejo pro aserto, ke komunio ne estas sankta faro kaj, ke oni ne devas adori Dipatrinon.

(Proceso n-o 2. K. 567/26.)

*) Stanislaw Szczepanowski estis episkopo de Krakovo. Pro perfido kontraŭ la regno li estis ekzekutita laŭ ordono de reĝo Bolestaw Smiaty kaj poste kanonizita de papo. A. Z.

## *Forgesu dion*

*"Preĝejoj novaj estas konstruindaj!"*
*Silentu, fratoj! Ne plu estu blindaj!*
*Al milionoj mankas pan' kaj domo,*
*Kaj VI malŝparas monon por fantomo*
*De dio nevidita, nevidebla?*
*Malprudentaĵo estas nekredebla!*

*En fremdajn landojn iras la misio,*
*Sed Eŭropo dubas jam pri dio!*
*Popoloj saĝaj pastrojn silentigas*
*Kaj cerbojn el la dogmoj liberigas.*
*Nur la dormemaj restas la viktimoj*
*De malraciaj, vantaj penskutimoj!*

*Ĉu ankaŭ VI ankoraŭ dormi volas?*
*Ĉu ankaŭ VIN la dua mond' konsolas,*
*Pri kiu pastroj ĉiam rakontadas? —*
*La vojon de l' progres' vi barikadas,*
*Se vi subtenas tian eklezion! —*
*Vekiĝu, fratoj, kaj forgesu dion!*

*Alfred Rehtz*, Hamburg

## El gazeto "Queen Silver"

Ĉu vi estas persono, kiu timas permesi aliajn scii kiel vi pensas? Se jes, vi estas sklavo. Ĉu vi estas unu el tiuj, kiuj kaŝas siajn opiniojn pro timo kion aliaj eble pensos aŭ diros? Se jes, vi estas malkuraĝulo. Ĉu vi estas persono, kiu publike konfesas kredon al io, kion vi sekrete malkonfesas? Se jes, vi estas hipokritulo.

*

La kristanismo havis preskaŭ mil naŭcent jarojn por provi sian "filozofion". Kian rezulton ni havas? La plej multajn atendantojn ekster pan-butikoj, la plej potencajn militŝipojn, la plej grandajn militojn kaj la plej grandan nombron da politikaj trompuloj iam konataj. Ni provu ion alian.

Se via menso estas libera je superstiĉo, estas via devo liberigi la cerbon de iu alia de la katenoj de nescio. Estu propagandanto.

*

Tiu, kiu venenas la cerbojn de infanoj faras pli malbone ol tiu, kiu venenas iliajn korpojn.

*

Gvidantoj de sufraĝedoj diradis, "Viroj fuŝis la regadon de la mondo; donu al la virinoj okazon".

Mi diras, ke kaj viroj kaj virinoj fuŝis la regadon, edukadon, kaj religion, donu okazon al la infanoj.

*

Unu klaso de homoj uzas siajn cerbojn por sia persona gajno, la alia klaso uzas sian inteligenton por la bono de la homaro. Unu klaso penas sklavigi la homan rason; la alia penas liberigi la korpojn kaj mensojn de homoj el ĉia formo de sklaveco.

*

Virino iam diris, aŭdinte mian mallongan paroladon pri la eduko de infanoj: "Mi pensas ke estas granda insulto, ke infano venas tien ĉi kaj diras al ni plenkreskuloj kiel eduki niajn infanojn."

Ŝi devus esti dankema, ke mi ne parolis pri "Kiel eduki la gepatrojn".

*

La frazo "Religio de Naturo" estas fakte senhonta falsdiro. Religio rilatas al fido; specife al fido bazata sur revelacio. Naturo neniel rilatas al fido, sed traktas ekskluzive faktojn. Ankaŭ ĝi ne koncernas iun revelacion.

*

Sciu:—

Por postvivi ,ĉiu vivanta speco devas konformiĝi al sia ĉirkaŭaĵo. Kiam la ĉirkaŭaĵo ŝanĝiĝas, ĝi ankaŭ devas ŝanĝi siajn kutimojn tiamaniere, por ke ĝi profitu je la ŝanĝitaj kondiĉoj de sia vivo. Malsukceso en tio kaŭzas malaperon de la speco.

La homo renkontas multajn novajn kondiĉojn en la vivo nuntempe. Faktoroj nekonataj antaŭ cent jaroj nun ludas gravan rolon en lia vivo. Aŭ la homo devas utiligi por si ĉiujn ĉi tiujn novajn faktorojn de ĉirkaŭaĵo, aŭ cedi lokon al iu alia formo de vivo.

*

Ĉiu civilizacio, kiu estis bazita sur sklavigo de korpoj kaj mensoj de la homoj, pereis. Nur liberaj homoj povas postvivi, ĉar nur ili havas sufiĉe da inteligento por progresigi la interesojn de la homaro. Evoluado detruas la malsuperajn tipojn, korpe kaj mense netaŭgaj.

*

Se vi nenion faras por helpi plibonigi la mondon, vi helpas plimalbonigi ĝin.

Se vi nenion faras por renversi tiranecon, vi helpas subteni ĝin.

Se vi ne batalas por liberigo, vi helpas sklavigi viajn amikojn.

Se vi ne estas propagandanto por la vero, vi subtenas malveron.

Almenaŭ miliono da jaroj pasis inter Simio kaj Bryan. Nuntempaj pruvoj estas, ke unu generacio sufiĉas por renversi la proceDon.

*

Korpa forto estis grava por la homoj kiuj loĝis en kavernoj; ni nun vivas en epoko de cerba forto. La pensuloj regos la mondon.

*

Per scienco, ne per kredo, la homa raso atingos ĝian plej altan disvolviĝon. Per helpo de scienco homo liberigos sian korpon de pena laboro kaj sian cerbon de superstiĉo.

*

Kiam iu preĝas, li vetas kun dio. Aŭ li ricevas kion li petas aŭ li ne ricevas. Kiam li malsanas, kaj preĝas al dio ke li kuracu lin kaj lasu lin for de la ĉielo, li aŭ resaniĝas aŭ li mortas. Se li resaniĝas li diras al ĉiu, ke dio lin kuracis. Se li mortas, li diras tute nenion.

*

Pro sia heredita kapablo, geniulo povas fariĝi mastro de sia ĉirkaŭajo. La plejmulto da homoj ĉiam estos sklavoj de sia ĉirkaŭajo.

*

Neniu povas manĝi por vi vian nutraĵon; ankaŭ neniu alia povas fari por vi vian pensadon.

*

Pripensu nur kion faras la formiko kun siaj etaj cerboĉeloj; nun klarigu kiel estas ke la homo kun sia granda cerbo faris tiom malmulte.

*

Nacio el pensuloj ne povus esti ekspluatata de pastroj aŭ politikistoj. Pro tio, ĉiu rimedo estas uzata por malebligi, ke homoj pensu.

*

Milionoj nun vivantaj ne scias ke ili jam estas mortaj.

*

Iuj laboras ;aliaj laborigas la laboremulojn.

*

Estas amuze vidi politikiston voĉdoni por leĝo celanta malpermesi azianojn eniri Usonon. La sama politikisto klinas sian kapon en adoro antaŭ hebrea aziano, kiu estus barita el Usono, laŭ la nunaj leĝoj pri enmigro. Kristanoj forgesas ke ilia religio estas tiom azia importaĵo kiom estas japanaj laboristoj.

*

Vi ne povas argumenti kun homo kies cerbo rustiĝis.

*

Infano sen cerbo naskiĝis antaŭ nelonge en Nov-Jorko. Ĉu fine, la perfekta kristana tipo evoluis! William Jennings Bryan, kiu neas, ke li eble devenis de inteligenta simio, salutos tiun sencerban infanon kiel fraton, kreitan laŭ la portreto de dio.

## Bibliografio de internacia liberpensula gazetaro

(Daŭrigo. Vidu ankaŭ n-ojn 1, 3, 5, [1925], 1 [1926]

### Aŭstrio

Korrespondenzblatt der "*Internationale Proletarischer Freidenker*" (Korespondadogazeto de la Internacio de proletariaj liberpensuloj"). Dumonata. Germanlingva. Fondita 1926. Adreso: Wien I, Wipplingerstrasse 8 III, Tür 330.

### Germanio

*Freies Denken* (Libera Pensado), Gazeto de la proletaria liberpensula junularo Monata. Germanlingva. Fondita 1926 Adreso: Proletarische Freidenkerjugend Kanzlerstrasse 27, Leipzig-Lindenau.

*Sonne* (Suno), Monista Junularmovado. Fondita 1921. Monata. Germanlingva. Eldonejo: Max Seligmann, Hamburg 3, Hütten 92.

*Der Sozialistische Freidenker* (La Socialista Liberpensulo). Gazeto de la Ligo de Socialistaj Liberpensuloj. Fondita 1926. Germanlingva. Monata. Adreso: Rudolf Beyer, Leipzig S 3, Elisenstrasse 85.

### Holando

*Het Veldvioltje. Blad voor de Jeugd.* Fondita 1926. Monata. Holandlingva. Adreso: H. N. Luigies & Zonen, Lange Torenstraat 22-26, Rotterdam.

## Libroj ricevitaj

Prof. D-ro Beran, *Giordano Bruno*. 1926. 24 paĝoj. Germanlingve. 15,5×23 cm. Prezo 50 groŝoj. Eldonejo: Freidenkerverlag, Wien I, Wipplingerstrasse 8.

"*Leerboekje voor Esperanto*" (Lernolibreto) verkita de nia antverpena ligano s-ro Frans Schoofs, Kleine Hondstr. 11 Antwerpen. Enhavas gramatikon, naŭ lecionojn kaj vortareton. Estas bona libreto kaj trafa por flandroj kaj holandanoj. Prezo malkara b. fr. 0.50.

*Kantaro esperanta* kompilita de Montague C. Butler, London. La plej ampleksa kantlibro en Esperanto. Enhavas 358 kantojn. Jen Esperantistaj, anglaj irlandaj, kimraj, skotaj, modernaj solkantoj, humoraj, operaj kaj aliaj. Sen muziknotoj. Eldonis British Esperanto Association, 17 Hart Street, London W. C. 1. Prezo 1 ŝilingo kaj 6 pencoj (1 1/2 germ. markoj).

*Kun aŭ sen Dio?* Prediko en socialista lumado. Polemiko inter kapucena patro Columban kaj prof. Hartwig. Germanlingva. 96 paĝoj Oktavo. Prezo gm. 1.—. Eldonejo: Rudolf Cerny, Wien XVI/2, Liebhardtgasse 46.

Antaŭ la milito la pastraro el taktikaj kaŭzoj sendis liberalajn pastrojn en la liberpensajn publikajn kunvenojn. Post la revolucio oni neniam vidas reprezentanton de la eklezio en liberpensaj kunvenoj; ili ne kuraĝis defendi la kredon. Pro tio ni devas ŝati la kapucenan pastron Columban ke li sekvis al la voko de la Ligo de la Proletariaj Liberpensuloj en Rejnlando kaj Vestfalio diskuti en kelkaj tagoj kun la prezidanto de la Internacio de Proletarioj Liberpensuloj. La libro enhavas la paroladojn de ambaŭ oratoroj. La respondoj de Hartwig je la babilado de Columban estas tre interesaj. Kiu iam aŭdis Hartwig certe estas entuziasmigita de la trafa oratoro kaj havigos sin la libro. Germanlingvanoj enviciĝu la libron en via biblioteko; per tio vi havigas vin grandan ĝuon. La libro estas ankaŭ havebla ĉe nia sekretario.

## Nova gazeto

*Internacio Radio-Revuo.* Organo de la Internacia Radio-Asocio. N-o 1—2. 1. jaro. Jan.—Febr. 1926. 32 paĝoj. Prezo: Franciq fr. 1.—, aliaj landoj: dol. —.05. Eldonejo: Etienne Chiron, 40 rue de Seine, Paris. Laŭ enhavo kaj ilustraĵoj ĉi gazeto nur estas rekomendinda. La unua kajero enhavas i. a. la komencon de interesa artikolo "Paŝo post paŝo" en kiu la verkisto skizas la ĝeneralajn principojn de Radio.

## Internacia bibliografio de liberpensa literaturo

La ĉefa celo de nia ligo estas fari praktikajn servojn al la Libera Penso. Nia bibliografio de liberpensaj gazetoj trovis grandan intereson inter liberpensaj rondoj; kelkaj gazetoj publikigis ĝin kun bildo el n-o 1 de "Liberpensulo". El tio ni vidas, ke ni estas sur la ĝusta vojo. Post kiam mi zorgeme registris la liberpensan gazetaron mi intencas eldoni "*Internacian Bibliografion de Liberpensa Literaturo*", ĉar ĝis nun mankis tia grava verko. La bibliografio aperos ordigata sisteme laŭ enhavo. En la bibliografiaj notoj estu: nomo de la verkisto, titolo (en nacia lingvo kaj germane, angle, france kaj en Esperanto), jaro de la apero, nombro de la paĝoj, formato en cm, prezo kaj preciza adreso de la eldonejo. La bibliografio aperu plejeble kompleta; pro tio mi ankaŭ publikigos verkojn cenzuritajn kaj elĉerpitajn.

Al ĉiuj sekretarioj, redaktoroj, oratoroj kaj bibliotekistoj en la liberpensaj grupoj estos donata per kreo de ĉi-bibliografio grava informiga verko.

El ĉiu lando mi serĉas unu kunlaboranton. Kiu estas preta kunlabori? Skribu tuj al la sekretario. *K. H.*

## Redakta korespondado

*R. Leliva.* Via artikolo "Idealo de Libereco", tre interesa bonstila, pro malgrandeco de nia gazeto ne povas esti presota.

*A. Korovkin.* La kolekto de liberpensulaj gazetoj enhavas ĉirkaŭ 35 gazetojn en diversaj lingvoj. Esperantlingve nur ekzistas nia "Liberpensulo".

*F. H. Aerts.* Via artikolo ne neas, sed konfirmas la dirojn de Rik; vi nur polemikas pri socialismo, ne liberpenso. Nia loko estas limigita.

## Landreprezentantoj

Anglio: R. Wood, 130, Elthorne Road, London N 19.
Aŭstrio: E. Hübner, p. Adr. "Freie Weltanschauung" (Max Tonner), Salzburg, Fürstenweg 24.
Belgio: Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, Antwerpen.
Blankrusio: Dim. Snejko, poŝtkesto 33, Minsk.
Ĉekoslovakio: S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, Dolni Kounice.
Ĉinio: Pandiŝo, N.Y.M.S., Lunghwa, Shanghai.
Francio: Emil Gasse, 15 place Gambetta, Le Havre
Germanio: vidu Estraro (unua paĝo)
Hungario: S-ro Hugai Ferenc, Gyöngyös.
Japanio: Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, Tokio.
Jugoslavio: S-ro Paskal Bogdanoviĉ, Komixa-Vis.
Nederlando: vidu Estraro (unua paĝo).
Polio: Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2, Lublin.
Rusio: Dunajev, Leningrad, Gubkom Esperantistov, Smolnijprospekt 15, kv. 11.
Skotlando: Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, Glasgow.
Svedio: Einar Adamson, Göteborg, Box 73.
Ukrainio: V. Kolĉinski, Kremenĉug.
Usono: S-ro Karl Fröding, 221, 7 th. st., Rockford, Ill.

La landreprezentantoj prizorgos la aferojn en sia lando. Ili estas ankaŭ rajtigataj alpreni kotizojn.


## NOVAJ TEMPOJ

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de TAGE

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Specimeno kostas 0.25 mk. g.

Mendu ĉe:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig - Connewitz (Germanio).**



## GAZETO "QUEEN SILVER"

Kiu scias anglan lingvon devas vidi specimenon de supra gazeto, eldonata de 15 jara knabino, unu el plej interesaj kaj instruaj liberpensaj gazetoj.

Sendu 1/4 Dolaro por specimeno al:

**QUEEN SILVER, R 4, BOX 567, INGLEWOOD, KALIFORNIO.**

Germanoj mendu ĉe:

**KURT HUBRICHT, MARIANNENSTRASSE 22, LEIPZIG-NEUSTADT.**


## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

*Dr. Erich Tschirn*, Friedrich-Karl-Str. 10, Stettin, serĉas en Julio migrad-akompananton por franclanda vojaĝo. Mi parolas germane, france kaj esperante.

*Il. Savvin*, Goszavody im. Iljiĉa, *Sartana* (Donbass), Sovet-Unio, deziras korespondi.

*Grupo de Esperantistoj* de gubernia komitato deziras korespondi kun kamaradoj de ĉiu lando. Adreso: Sovet-Unio, Penza, Gubkom Esperantistov.

*Antoni Zbikowski*, poŝtkesto 152, Lublin (Polio), deziras koresp. k. ĉ. landoj pri leĝdonaĵo koncernanta al libereco de la konscienco kaj de la konfesio.

*August Grieger*, Gladbeck i. W. (Germanio), Horsterstrasse 196, deziras korespondi letere aŭ bildkarte kun ĉiuj landoj. Mi certe respondos.

*J. H. Aerts*, Werbrouckstr. 39, Antwerpen (Belgio), deziras koresp. kun anglaj, usonaj, francaj ktp. samideanoj.

## AVIZO

Provizore sendu *manuskriptojn* al nia sekretario en Leipzig. S-ino T. Sujadinova por tempo estos for el Anglio.

Ni esperas, ke ĉe la

## VI. SAT-KONGRESO

estos faka kunveno por liberpensaj Espistoj. K-do *E. E. Yelland* reprezentos nian Internacion de la Liberpensuloj.

Ĉiu liberpensula organizaĵo kaj ĉiu liberpensulo, uzu la servojn de nia "Internacia Ligo de Liberpensuloj".

Ĉiujn liberpensajn gazetojn mendu ĉe ni. Tiamaniere vi ŝparas monon por poŝtelspezoj kaj vi subtenas nian movadon.


**Mendu la "Kolekton de liberpensaj gazetoj",**

ĉirkaŭ 35 diversaj gazetoj.

Havebla ĉe la Ligo. Prezo: Por Germanio kaj Aŭstrio gm. 4.—, aliaj landoj gm. 5.— Poŝtelspezoj ne estas kalkulataj


## Forigu nian debeton

**ĉe la presisto per tuja alsendo de via kotizo. Germanoj uzu la enmetitan poŝtĉekan formularon.**

**Membroj pagintaj la kotizon por 1926 trovas ĉi tie glumarkon kiel kvitancon. Gluu ĝin en la membrokarton.**

## XVIII. Universala Kongreso

*en Edinburgo*

Ni aranĝis kun kongresa komitato fakan kunvenon de liberpensuloj kiu okazos merkredon, 4. Aŭgusto je 4[30] posttagmeze. Ĉiu liberpensulo estas petata ĉeesti.


Kiu volas esti rapide kaj objektive informata pri la esperantista movado ĝenerale kaj aparte pri la movado en laboristaj rondoj, tiu abonu la semajnan ĵurnalon

## "SENNACIULO"

Oficiala organo de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Provekzemplero estas sendota senpage. Detalajn informojn pri SAT oni povas ricevi skribante al la Asocia Sidejo

**23, rue Boyer, Paris XX,**

aŭ al la Administrejo

**Colmstr. 1 III, Leipzig O 27.**


## LEGINDAJ GAZETOJ!

**Aŭstrio**

**"Freie Weltanschauung"**, Monatsschrift zur Förderung der proletarischen Kulturbewegung, Organ des Landesvereins der Freidenker in Salzburg. Redakteur: Max Tonner, Fürstenweg 24, Salzburg. Jahresbezugspreis für Österreich: 1 S 60 g, für Deutschland Mk. 1.20. Bestellungen nimmt entgegen: A. Hörr, Schallmoser Hauptstrasse 31, Salzburg, Österreich.

**Ĉekoslovakio**

**"Freier Gedanke"**, Organ des Bundes proletarischer Freidenker in der Tschechoslovakischen Republik, Bodenbach, Lessingstrasse 931. Verantwortlicher Redakteur: Rudolf Lebenhart. Erscheint vierzehntägig. Auflage 6300. Beilagen: "Die freie Frau", "Zum Licht" und "Kulturwille". Jahresbezugspreis Mk. 3.50.

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig-Neustadt (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

3-a Jaro, N-o 1 Januaro—Februaro 1927

# Liberpensulo

OFICIALA GAZETO DE LA INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ

CELOJ de la "Internacia Ligo de Liberpensuloj": Disvastigi esperanton inter liberpensaj rondoj, disvastigi liberan penson, krei kaj presigi liberpensan literaturon en esperanto, aranĝi fakkunvenojn ĉe kongresoj. — La KOTIZO por la Ligo estas laŭplaĉe, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro.

Sekretario: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, I, Leipzig O 30 (Germanio)
Poŝtĉeka n-o 43808 Leipzig

La gazeto estas por membroj senpage.

Manuskriptojn bonvolu sendi al la sekretario.

Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## AL LIBERPENSULOJ

Pro senlaboreco en multaj landoj granda nombro da membroj ne povis pagi sian kotizon, kaj lastaj numeroj de "Liberpensulo" en la pasinta jaro, bedaŭrinde, ne povis aperi.

Tio kaŭzis ankaŭ malviglecon de propagando en liberpensaj rondoj. La malavaraj donacoj de kelkaj fervoruloj ne estis sufiĉaj por stabiligi la pozicion de nia Ligo. Tio estas bedaŭrinda fakto, des pli, se oni prikonsiderus la progreson de Esperanto inter kreduloj. La anoj de Oomoto, Teozofio, Bibliostudentoj, Bahianoj, Katolikoj Romaj ktp. daŭre eldonas siajn gazetojn kaj pliriĉigas la superstiĉan literaturon en Esperanto. La tuta Biblio estas presita en Esperanto. Oni parolas nun pri traduko de Korano. Ĉu ni liberpensuloj malaperu el Esperantista koncerto? Ni petas niajn membrojn kaj simpatiantojn garantii eldonon almenaŭ de la sola liberpensa internacia gazeto "Liberpensulo", tiom nepre necese por propagando de Esperanto en liberpensaj rondoj kaj por havi objektan pruvon, ke Esperanto estas taŭga ankaŭ por Libera Penso. Kaj ĝi ja estas utila.

Estas ĝojiga fakto, ke en kelkaj landoj oni komencis sin interesi pri laboro de nia Ligo. Antaŭ ni kuŝas kelke da atestoj de ŝato por nia gazeto kaj esprimo de bedaŭro pro ĝia neapero lastatempe. Ni streĉas ankoraŭ foje nian kuraĝon kaj eldonas "Liberpensulo"-n en espero, ke ĉiu vera Esperantista-Liberpensulo subtenos nin per sia persona laboro en iu konkreta formo. Esperantisto-Liberpensulo devas esti propagandisto por sia movado, alie tiu ne estas vera ano de ambaŭ movadoj.

Per nia agado, kvankam materie tre limigita, ni instigis la liberpensan mondon pripensi la problemon de internacia lingvo. Rezulte sekvantaj movadoj subtenos nian Ligon: Vrijdenkers Vereeniging, Holando (Unuiĝo de Liberpensuloj). Landesverein der Freidenker, Salzburg, Aŭstrio. (Landa Unuiĝo de Liberpensuloj.) Bund proletarischer Freidenker, Ĉeĥoslovakio. (Unuiĝo de Proletaj Liberpensuloj.) Bund proletarischer Freidenker, Rejnlando-Vestfalio.

Kelkaj naciaj liberpensaj gazetoj represis artikolojn el nia presorgano kaj aranĝis Esperanto-lecionojn sur iliaj paĝoj.

Dum la Esperanto Kongresoj estis aranĝitaj fakaj kunvenoj de Liberpensuloj. Ĉe Leningrada Kongresa kunveno ĉeestis reprezentanto, ne Esperantisto, de Sovetia Ateista movado, gazeto "Bezbojnik".

La germana delegitaro de Liberpensuloj, kiu vizitis Sovetion en septembro 1926, havis inter si du Esperantistojn. En Jalta, Krimeo (USSR) ili renkontis niajn fervorajn liganojn geedzoj Yelland el Londono. Estis organizita propaganda kunveno ĉe delegitaro germana, kiu tre favore rilatis al Esperanto.

Dum siaj kongresoj en Eŭropo, Liberpensuloj tuŝis la problemon de internacia lingvo; inter ili la Internacio de Proletaj Liberpensuloj, kunvenintaj en Praha en novembro 1926.

Amikoj! Ĉi tiu jaro estas por ni, laborantaj por la venko de internacia lingvo, jubilea jaro. Antaŭ 40 jaroj la tiam juna D-ro Zamenhof metis antaŭ publiko sian unuan lernolibron, fordonis al la homaro, sen iu materia rekompenco por si, la laboron de sia tuta juneco. La mondo jam profitis de lia granda verko kaj ankoraŭ pli profitos estonte.

Ĉi tiun jaron samideanoj tra la tuta mondo faros donacon al tiu geniulo. Ankaŭ ni liberpensuloj devas havi presorganon en kiu ni esprimos nian honoron al D-ro Zamenhof. Kvankam kredulo, li estis larĝanima homo, kaj inter la dokumentaro de estinta "Libera Penso" troviĝas persona letero de la majstro, en kiu li konsentas ĉeesti la liberpensulan propagandan koncerton de Esperantistoj, organizitan por la 10. aŭgusto 1914 en Parizo. La plej bela formo de honorigo estos pli vigla propagando de Esperanto dum ĉi tiu jubilea jaro. Do, helpu al ni regule presigi nian ŝatatan "Liberpensulo". Por ke tio estu ebla, ni bezonas aliĝojn de kelke da centoj (miloj ne estos rifuzataj) de membroj. "Liberpensulo" flugu al anoj tra la mondo kaj diru al ĉiu pri niaj bezonoj. Sampensuloj helpu tuj, sendante kotizojn kaj donacojn. La kotizo estas laŭplaĉa, sed minimume 2 germanaj markoj.

## Ili preĝas ankoraŭ

Dum la lastaj monatoj en 1926 estis eble al mi, pro mia restado en Sovetlando, studi la rusojn rilate al religio. Mi vizitis preĝejojn, kaj en grandaj urboj kiaj Leningrado, Moskvo, Saratovo kaj en vilaĝoj. Pro tio ke mi estas anglo, mi rimarkas aferojn eble komunaj al aliaj landoj, sed ne ĝenerale vidataj en Anglujo. Promenante sur strato mi rimarkas maljunulinon, kiu preterpasante min faris per mano signon de kruco ĉe kapo kaj brusto. Mi demandis al mi kial ŝi tiel salutas min, pro kio mi meritas tian honoron aŭ respekton, kaj konkludis ke ŝi estas speco de sorĉistino. Sed tre baldaŭ mi komprenis kial ŝi tion faris. Post du minutoj alia virino faris signon de kruco, ŝajne al mia edzino kiu paŝis apud mi. "Ah", diris la edzino, "ŝi pensas, ke mi estas la Dipatrino, do salutas min." Mi konsterniĝis kaj ne povis kredi ke iu virino tiel salutus iun aŭ ion. Pli poste mi vidas mezaĝan virinon, kiu krucosignas sin kaj mi rimarkas, ke ŝi tion ne faras al mi aŭ al edzino, sed pro tio, ke ŝi preterpasas oficejon de pastro. Mi serĉas kion ili salutas kaj fine rimarkis en ĉirkaŭmuro de tiu oficejo bildon de iu viro, do estis la bildo kiu estis honorata.

Ofte frue matene sonoriloj de preĝejoj ne permesas al mi dormi, la sonorado daŭras ĉirkaŭ dek minutoj. Maljunuloj iras por kisi bildojn. Jen priskribo de rusaj preĝejoj. Konstruaĵo granda kies muroj estas blankaj, tegmentoj verdaj kaj kupoloj kun krucoj sur ili el vera oro, kiuj briletadas en la suno. Grandega riĉaĵo el oro kuŝas dormanta sur tiuj kupoloj. La preĝejoj jam estas en bona stato; la eklezianoj trovas monon por ripari kaj kolorigi ilin. Ĉe la pordo oni vidas, kiel en tagoj de caro, almozulojn, kiuj almozpetas de la kreduloj. Ili uzas ĉiujn rimedojn por elvoki simpation al ilia mizera stato: jen virino malpura, nekombita, en ĉifonoj, kun infano sur la brakoj kaj du aŭ tri geknabetoj ĉe la flanko ĝeme petas monon. Por atingi la

**Helpu antaŭenigi la movadon per tuja alsendo de via kotizo!**

pordon oni devas preterpasi almenaŭ dekon da tiaj almozuloj. Kiel ili faris antaŭ milito tiel ili nun faras. Enirinte la preĝejon vi vidas homojn, kiuj faras diversajn aferojn — malriĉuloj iras al la vendistoj de kandeloj kaj aĉetas almenaŭ unu kandelon, kiun ili fiksas en kandelingon antaŭ sia favorata bildo aŭ statuo. Mi atente rigardas ĉiun ĉeestanton kaj eniranton. Jen virino tre malriĉa — ŝi alproksimiĝas al bildo, klinas la kapon antaŭ ĝi, surgenuiĝas, tri foje fleksas la korpon ĝis la kapo tuŝas la tegolan plankon, leviĝas kaj aliris al la bildo, kisas ĝin, kaj foriras al alia bildo aŭ statuo por denove daŭrigi tiun gimnastikon. Jen viro, laŭ aspekto inteligentulo, eniras — ni observu lin. Li, kiel la malriĉa virino, aĉetas kandelon (kia granda komerco ĉe la pastroj kaj fonto de enspezo), alpaŝas al iu bildo, kiun li, kredeble, milfoje vidis antaŭe, rigardas al ĝi atente kaj komencas arlekeni. Li, dekon da fojoj, suriras siajn genuojn, tuŝas la plankon frunte, ĉiu foje stariĝas kaj rigardas al la bildo, poste kisas ĝin kaj foriras al apuda bildo aŭ statuo por denove antaŭ ĝi kliniĝadi kaj fini per kiso. Tion li faras al la bildaro en la publika parto de la preĝejo. Vidante tiajn homojn kaj iliajn farojn oni tuj kompatas ilin. Ili estas homoj, kiuj ne kritikas kion ili faras kaj la pastroj ĝis la plej malalta grado ilin stultigas. Ĉion ili faras kiel aŭtomatoj. Interne, la preĝejoj ne estas tre grandaj — neniaj seĝoj, la ĉeestantaro staras; viroj ĉe la dekstra flanko, virinoj maldekstre. Antaŭ vi estas alta muro kun pentraĵoj, montrantaj diversajn sanktulojn—antaŭaj caroj kaj pastroj, vestitaj en multkoloraj roboj.

Antaŭ tiu muro, kun interspaco de eble du aŭ tri metroj, staras barilo, kiu rezervas tiun lokon al la pastroj kaj iliaj helpantoj-kantistoj. Tiuj kantistoj ne estas sinceraj eklezianoj, ili nur kantas por salajro, kelkaj mem tion diris al mi. Baldaŭ pordo malfermiĝas en la muro de pentraĵoj, vi vidas altaron lukse ornamitan per objektoj el oro kaj arĝento, kaj antaŭenpaŝas pastro. Tiu viro portas elegantan multekostan robon kaj stolon el drapo kun oraj fadenoj kaj ĉapelon bele ornamitan. Li estas granda — ĉiu pastro senescepte estas granda dika homo kaj la kontrasto inter li kaj liaj klientoj estas treege frapanta. Li posedas fortan profundan voĉon, kiu ŝajne estas lia sola, krom la ĉarlatanismo mem, kapableco. Li aŭtomate diras aŭ kantas la kantiklojn. Li staras kiel reĝo el luksa kortego. La flamantaj kandeloj en oraj aŭ arĝentaj kandelabroj lumigas la preĝejon, kies oraĵoj briladas tra la tuta konstruaĵo. La ceremonio estas farata kiel en tagoj antaŭ pli ol dek jaroj. La ĉeestantaro estas la malnovaj kaj maljunulaj klientoj — malmulte da la nova junula generacio partoprenas en tiuj Diservoj. — La junularo estas okupata en aliaj pli seriozaj aferoj, ili troviĝas en laboristaj kluboj kie ili lernas ion utilan por la homaro. Por montri la senton de junuloj al la pastraro mi citu kion mi vidis en Saratov. Antaŭ mi promenis du knabinoj, ĉirkaŭ 16 jaraj — subite ambaŭ kraĉis sur la trotuaron kaj turniĝis en flankan straton. Momente mi miris kial ili tion faris, sed rigardante sur la alian flankon de la vojo, mi rimarkas, ke pastro alproksimiĝas. Do, ŝajne por eviti malbonsorton ili kraĉis (simila kutimo ekzistas inter geknaboj en Anglujo por eviti malbonsorton pro iu homo aŭ besto) sur la trotuaron kaj nevolis pasi la pastron. Kiam la pastro pasis la turniĝon de la flanka strato, la knabinoj revenis sur la ĉefan vojon kaj antaŭeniris. La pastraro ne estas estimata de la juna generacio. Almozuloj sur stratoj krucosignas sin preĝante, dum homoj ilin preterpasas, kvazaŭ la dirado de preĝoj kaj krucosignado iel helpas ilin. — Tio ne helpas, nur helpas la homoj, kiuj havas monon kaj bonajn korojn. Kelkfoje estas renkontataj kvar aŭ kvin preĝejoj, ĉiuj de la sama ortodoksa eklezio, preskaŭ unu apud la alia, kompreneble, tute ne necesaj por la loĝantoj, sed simple oficejoj por enkasigi monon por la subteno de la parazitaj pastroj. Mi vizitis tombejojn kaj tie troviĝas pastroj, kiuj por havigi al si monon atendas la funebrajn procesiojn. Estas tiom da pastroj, ke ekzistas inter ili konkuro por diri la ritojn super la ĉerko. Jen unu proponas siajn servojn pro tio, ke li scias la plej bonajn preĝojn, jen alia pro tio, ke li postulas malpli da mono por la ceremonio ol aliaj, kaj aliaj pro diversaj kapablecoj siaj. La tuta afero estas unu granda ĉarlatanaĵo. La religio dekadencas en Sovetlando. Gejunuloj jam ne interesiĝas en la sensencaĵoj de iluziaj mondoj kaj vivadoj estontaj kaj ne kredas en la blufoj de nehonestaj homoj, kiuj nomas sin pastroj.

*E. E. J.*

★

## DIO — RACIO

Vi liberpensuloj estas kontraŭ la religiuloj pro ilia mistikemo kaj fantaziemo, revo pri dio, kaj neatentemo pri la tero kaj vivo. Ĉu ĉiun dion liberpensuloj devvas nei? Definitive ne, ne ĉiun. Nome unu, kaj la solan dion ili devas rekogni, ŝati kaj estimi. Tiu dio estas Racio. Kelkaj diras, ke liberpensuloj devas ne akcepti iun dion, sub iu ajn saŭco. Tia kontraŭdiro estas tute ne ĝusta. Oni nomas sin ateistoj aŭ liberpensuloj, ne ĉar oni plezuriĝas en tiu nomo, aŭ sensence koleriĝas kontraŭ personoj religiemaj, sed ĉar scienco kaj historio montras al ni devenon de religioj kaj Racio pruvas al ni, ke religia mistikismo estas absurda. Do, ekster Racio aŭ sen Racio ni povas ne kompreni, ke ateismo estas prava aŭ ke mistikismo estas malprava, aŭ batali por ateismo, aŭ refuti mistikismon de religiuloj. Forjetante Racion, ni per tio forjetas nian solan batalilon el manoj kontraŭ religiismo kaj ni perdas grundon kaj sencon de tuta nia idea laboro kaj ekzisto.

Pro tio vere kaj ĝuste estus deklari: ni liberpensuloj konfesas unu dion, nome Racion, kaj se iu permesos ĝin nei, anstataŭi aŭ forpreni de ni sub iu ajn alia nomo, ĉu liberpenso, ateismo, naturo aŭ io alia, ni defendas tiun dion kaj batalos por ĝi per ĉiuj rimedoj intelektaj. Unu el plej famaj apostoloj de socialismo en Ruslando kaj batalanto kontraŭ carismo Pleĥanov diradis dum siaj paroladoj sprite: "Nenie estas necesa caro krom en la sola loko — en kapo", (rusa proverbo: "Homo sen caro en kapo", — malsaĝulo). Do, "caro en kapo" aŭ Racio estu ĉiam plejforte ŝatata de ni, kiel nia sola dio, pri kiu ni ĉiam malkaŝe kaj solene deklaru: estu por ni neniaj aliaj dioj krom ĝi. Eble la legantoj konfuzite pensas, ke aŭtoro vane frapas malfermitan perdon, neniu ja liberpensulo neas Racion. Ankaŭ la religiuloj neniam laŭte neas Racion, sed en fakto ambaŭ neas ĝin.

Al tiuj, kiuj nomas sin "liberpensuloj" Libera Penso estas en si mem sufera kulto — kaj, efektive, ilia dio. Dum mi opinias, ke por saĝa homo vera dio devas esti ne Libera Penso aŭ io ajn alia, sed sole Racio. La disputo estas esence al kiu dio oni devas fari preferon.

Por ilustri mian penson, ni prenu ekzemplon el tekniko. Por ke maŝino estu perfekta ĉu libereco aŭ mallibereco estas necesa al ĝi? Inĝeniero diros, ke nek tro granda libereco nek tro granda mallibereco estas necesa por ĝia bona funkciado. Estas necesa nur racia ĝusteco. Sama regulo devas regi ĉiun alian regionon. Oni devas serĉi nek liberecon, nek malliberecon, sed sole racian ĝustecon. Tiun povas liveri al ni nur la sola dio — Racio, kaj nur ĝi. Estu, do, al ĝi ĉiam plej granda gloro!

*R. Leliva, Leningrad.*

*Rim. de Red.* K-do R. Leliva ne estas liberpensulo, li estas religiulo.

Libera penso esploras libere historion de la homaro, socian vivon, materion, naturon. Pensante pri tio liberpensulo deduktas sian agadon. Racio gvidas lian penson. Dioj figuras nur en religioj.

Libera Penso ne estas religio.

## AVERTO

Lastatempe librejo de Fischbacher en Parizo eldonis verkon de E. Sauvage (Sovaj) sub titolo "Vade-mecum du libre-penseur. La pensée libre et la religion" (Gvidlibro de liberpensulo. Libera penso kaj religio).

Supre citita titolo estas malvera kaj malhonesta. La aŭtoro ne estas liberpensulo, sed kristana mistikulo.

Tiu ĉi verko estas troplena de similaj frazoj: "La plej alta Estaĵo", "Nia Dio", "Grandeco senfina", "Sinjoro nia Jesuo-Kristo"...

Oni devas mallaŭdi donon de falsa titolo kaj intencitan erarigon de legantoj.

*A. Z.*

## Decido de Tutpola Katolika Kongreso

Kiel ĉiuj scias, meze de majo en 1926 okazis en Varsovio efektiva tri taga politika revolucio, laŭ instigo de Pilsudski, la ĉefo de la militista potenco en Polio. Tiu revolucio sukcesis renversi la reakcian, preskaŭ faŝistan kaj tre koruptan, registaron kaj starigis registaron pli demokratan, kun Moscicki kiel prezidanto de la Respubliko kaj Bartel kiel ĉefministro.

Ĉi nova registaro, kvankam tute ne proleta, sen io espero al profundaj reformoj sociaj, montris sin preta forigi la plej grandan hontajon de nuna tempo, t. e. forigi religiajn persekutojn kaj doni liberecon de konscienco, ankaŭ permesi civilan edziĝon en la estinta rusa parto de Polio. La antaŭaj aŭstria kaj germana partoj ĉi tiun rajton heredis de la konstitucia monarĥio, sed en la antaŭa rusa parto estis daŭrigataj la malsaĝaj leĝoj de la cara monarĥio.

Ŝtata komisiono por konkordigo de land-leĝoj en la tri iamaj partoj de Polio preparis projekton de civila edziĝrajto por meti ĝin antaŭ parlamento. Sed la klerikalaro (pastraro) estas tre potenca ĉe ni. Por efike batali kontraŭ ĉi tiu en la tuta civilizita mondo akceptata formo de edziĝo, ili kunvokis la 28.—30. de aŭgusto pasintan jaron, grandan kongreson — Manifestacion — en Varsovio. Al tiu pure politika antikonstitucia reakcia manifestacio ili donis religian karakteron: ili festis pompe 200 jaran jubileon de kanonizo de sankta Stanislav Kostka kaj transporton de liaj relikvoj el urbo Plock al Varsovio. Kunvenis ĉiuj kardinaloj, episkopoj, kaj paroĥestroj de Polio kun kelkaj dekoj da miloj de kredemuloj por protesti kontraŭ la eŭropigo de Polio.

Iom progresinta homo juĝu la rezoluciojn, kiujn faris tiu kongreso.

1. "Bazante sin sur Dia kaj natura leĝo ankaŭ sur la decidoj de la konstitucio (!) la nuna Tutpola Katolika Kongreso postulas enkondukon de egala edziĝ-leĝo por ĉiuj katolikoj konforme al kanonika (eklezia) leĝo."

Kia impertinenteco! Ĉar la eklezia leĝo *NE* permesas civilan edziĝon, do oni malpermesu ĝin ankaŭ en la iama aŭstria kaj germana partoj de Polio, tie regu ankaŭ leĝo taŭga laŭ la caro.

Kie ĉerpis ĉi tiu eklezio rajton rompi konstitucion kaj eliri kun siaj leĝoj?

Paragrafo 126a de pola konstitucio ja diras, ke ĉiuj antikonstituciaj leĝoj en 1922 devas esti forigitaj, kaj paragrafo 111a diras: Al ĉiuj civitanoj Libereco de Konscienco kaj konfesio (kredo) estas garantiata.

Sed ni legu rezolucion:

2. "La nuna Katolika Kongreso *protestas insiste kontraŭ la ĉi-provo enkonduki civilan edziĝ-leĝon* kaj eksedziĝon ĉu devigan ĉu fakultativan."

(Aŭdu, aŭdu, — Eŭropo.)

Jen la "konkordiga" rezolucio:

3. "La ŝtato havas rajton kaj devon determini leĝe pure civilajn konsekvencojn de edzeco, en harmonio kun justeco kaj natura leĝo."

Laŭ tio "natura leĝo kaj justeco" permesas liberecon de konscienco, sekve de civila edziĝo, do la 111-a paragrafo de pola konstitucio devas funkcii,

aŭ se

la "natura leĝo kaj justeco" tion ne permesas, tiam la ŝtata konstitucio devas esti forigata kaj restos nur la eklezia leĝo, alivorte — ni reiru al la mallumа mezepoko. Bedaŭrinde atmosfero de Meza Epoko ankoraŭ regas en preskaŭ tuta patrujo nia:

la "masona" prezidanto de respubliko estis devigata iri al la kongreso kun siaj ministroj, kaj la nova registaro donis al ĉi reakcia, antikonstitucia entrepreno la grandajn salonojn de la varsovia Politekniko! Protesti kontraŭ rompo de konstitucio estas konsiderata kiel ago antikonstitucia.

Ni vidos baldaŭ ĉu la nova registaro submetiĝos ankaŭ sub la piedo de la klerikala reakcio, aŭ ĉu ĝi havos kuraĝon — eŭropigi Polion *Pola Liberpensulo.*

★

## La dua vivo

La sata pastro staras.
Ĉielon montras li:
"Pli bona vivo venos
Post tia vivo-ĉi.
Ne evitebla estas
Ĉagreno kaj mizer'.
Ĉielo rekompencos
Pro malfeliĉ' sur ter'.

Mi estas la agento
De nevidebla Di'.
Per preĝoj al la estro
Vin rekomendos mi.
Ĉielon mi malfermos
Por iom da salajr'.
La nekredemaj brulos
En la infera fajr'."

Ne kredu, kion diras!
Ne plu subtenu lin!
Ne pagu al la pastro,
Ĉar li friponas vin!
Ne pagu plu impostojn
Al netrovebla Di'!
Kaj serĉu la feliĉon
En tiu vivo-ĉi! *A. Rehtz.*

★

## Potpurio en la regno de Dio

S-ro *Niŝimura* vojaĝas tra Eŭropo laŭ invito de certa Esperantista grupo kaj reklamadas la intelekte malsanan Onisabura Deguĉi, kiu proklamis sin la enkarnigita kaj reveninta Kristo. Tiu Mesio en stato "kvazaŭ deliro" de tempo al tempo eliras el sia korpo kaj vagas en infero. Ni tute konsentas, ke estas deliro. La rezulto estas, ke li "benas" la mondon per 66 (el 120) volumojn da plej sensencaj inkubaj rakontoj. Kaj estas en Eŭropo Esperantistoj, kiuj opinias, ke tia lia deliro estas kion la mondo bezonas.

Samtempe en la sama Eŭropo S-ino Annie Besant ĉie reklamadas iun strangan junulon, kiun ŝi ĉirkaŭkondukas kaj ekspozicias kiel la kriston reenkarnigitan. Tiu jam pli inda Mesio de tempo al tempo forlasas sian korpon kaj vagas en ĉielaj landoj. Kiam oni demandas kiel tio estas farata, ŝi klarigas, ke tio estas "io simila al sonĝo". Jes tute simila al sonĝo, ni konsentas. Kaj tio estas de S-ino Besant. Kiam religio kaptas la cerbon, neniu sensencaĵo ŝajne estas tro absurda por ĝi. Kaj tiaj homoj ne trovas malfacilecon esti priparolataj en nia bone informita preso.

Ĉe konferenco de la Asocio de Muzeoj paroladanto diris, ke en Britlando estas proksimume kvar cent muzeoj. Tiu diro, komprenebl, nur rilatis al domoj en kiuj estas konservataj antikvaj objektoj. Sed ekzistas miloj da aliaj domoj ĉie, kiuj ankaŭ povas esti nomataj muzeoj, kie estas troveblaj aliaj specoj de antikvaĵoj — eluzitaj ideoj. Homoj nomas ilin "Domoj de Dio".

*

Ameriko estas lando, kie la ministroj de dio konstruis al si komfortan neston sub la varma flugilo de amerikaj riĉuloj. Ilia amo estas reciproka. La pastroj blindigas la konscion de popolo por la riĉuloj kaj la riĉuloj siaparte ne avaras monsumojn por pastroj. Milionoj da doloroj rabitaj for de la popolo iras por ĝia blindigo al Sav-armeo, al Biblia Societo, al Kristana Asocio de Junuloj kaj aliaj. Sed nun dio eliris sur komerca vojo. Sur la strato Brodŭej en Nov-Jorko oni povas legi jenan anoncon: "Aĉetu obligaciojn de la templo Brodŭej!

Dio malsupreniru sur Brodŭej! kaj por savo de viaj animoj enmetu vian monon en tiun dian entreprenon po 5 %.

Via mono estas garantiata de konataj industriistoj kaj grandaj bankistoj.

Aĉetu la obligaciojn kaj helpu ilin vendi! Vi faros aferon profitan."

Tiu mono estas intencita por konstrui templon "nubgratulon". Necesas 4 milionoj da doloroj en obligacioj. Ankaŭ sufiĉe da blinduloj oni preparis por havigi de ili tiun monon. Dio nun komercas kiel nia legombutikisto, nur grandskale. Homoj volas esti trompataj, diras Romo.

*

La sanktaj libroj verkitaj de kristanaj dioj hodiaŭ tute ne taŭgas por racia vivo. Tie kaj ĉi tie aperas protektantoj de diaj sensencajoj. Tiuj por savi dian vizaĝon retradukas la Biblion en lingvo kun stilo kultura. Tiel D-ro Muffat, Anglio, tradukis Biblion en nuntempa lingvo. La frazon "Donu al ni hodiaŭ nian ĉiutagan panon" li tradukis "Donu al ni hodiaŭ nian panon por morgaŭ". Tiel li korektas la eraran ordonon al kristanoj, ke ili ne pensu pri morgaŭa tago. Samtempe la aserton de vegetaranoj, ke hodiaŭa pano taŭgas por manĝo nur morgaŭ, li enŝovas en la preĝon kaj la gloron pri vegetarana eltrovo fordonas al dio, kion li ne meritas. Por kaŝi, ke la Nova Testamento sankcias la sklavecon, la vorto "sklavoj" estas tradukita per vorto "servantoj"; kaj la erotikaj kaj malmoralaj frazoj en la Malnova Testamento estas zorge kaŝitaj por doni bonan impreson. En siajn tradukojn la tradukintoj enmetas kion ili ŝatas ke la legantoj komprenu. La veron ili neniam diras al kredantoj. Por vero ili ne ricevos monon.

### U. S. S. R.

Hazarde ni renkontis en Jalta, Krimeo, la 21 delegitojn de Tutgermania Unuiĝo de Proletariaj Liberpensuloj, kiuj veturis por ĉeesti Internacian Kongreson de Proletariaj Liberpensuloj en Moskvo, kiu devis okazi la 9-an de septembro. De ili ni eksciis, ke landoj kie regas katolikaj faŝistoj ne donis permesojn al delegitoj de siaj landoj viziti USSR, kaj pro tio oni prokrastis la kongreson ĝis 25 oktobro en Praha. Inter la delegitoj estas du Esperantistoj. La prezidanto de la delegacio ĝentile invitis nin en ilian hotelon kaj donis al ni parolon transdoni saluton de nia Ligo kaj fari paroladon pri Esperanto kaj Liberpenso, kiu estis afable tradukita de nia ligano K-do A. Barthel el Saksio. Prezidanto de la partio en respondo favore parolis pri Esperanto kaj promesis fari sian eblon por nia internacia lingvo. *T. Yelland.*

## Landreprezentantoj

*Anglio:* F-ino D. White, 166 Church Rd. Upper Norwood, *London SE 19.*

*Aŭstrio:* E. Hübner, p. Adr. „Freie Weltanschauung" (Max Tonner), *Salzburg*, Fürstenweg 24.

*Belgio:* Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, *Antwerpen.*

*Blankrusio:* Dim. Snejko, poŝtkesto 33, *Minsk.*

*Ĉekoslovakio:* S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, *Dolni Kounice.*

*Ĉinio:* Pandiŝo, N.Y.M.S., Lunghwa, *Shanghai.*

*Francio:* Emil Gasse, 15 place Gambetta, *Le Havre.*

*Germanio:* vidu Sekretario (unua paĝo).

*Hispanio:* R. Wood, Calle Molas, 32, 3o, 3a, *Barcelona.*

*Hungario:* S-ro Hugai Ferenc, *Gyöngyös.*

*Japanio:* Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, *Tokio.*

*Jugoslavio:* S-ro Paskal Bogdanoviĉ, *Komiza-Vis.*

*Nederlando:* C. F. Everts, Vespuccistraat 124, *Amsterdam.*

*Polio:* Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2, *Lublin.*

*Rusio:* Dunajev, *Leningrad*, Gubkom Esperantistov, Smolnijprospekt 15, kv. 11.

*Skotlando:* Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, *Glasgow.*

*Svedio:* Einar Adamson, *Göteborg*, Box 73.

*Turkio:* S-ino. T. Yelland 25/37 rue Kerestedje, Pera, *Konstantinople.*

*Ukrainio:* V. Kolĉinski, *Kremenĉug.*

*Usono:* S-ro Karl Fröding, 221, 7th st., *Rockford, Ill.*


# SENNACIULO

Internacia, semajna, 8-paĝa lab. esp-a organo de Sennacieca Asocio Tutmonda. Raportas pri laborista vivo kaj laborista movado en ĉiuj landoj, pri laborista esperanto-movado ktp. Diskutas pri sociaj problemoj. Informas pri radio, scienco kaj tekniko ktp., ktp. Aktuala — Interesa — Malmultekosta.

Abonprezo: 2 germ. Markoj en 3 monatoj.

**Adm.: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig, O 27**


## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

*Georg Buna*, Gerresheimer Str. 20/I, Düsseldorf (Germanio) serĉas koresp. kun usonaj, anglaj ktp. gesamideanoj.

*Kurt Hartmann*, Hechtstraße 42/IV, Dresden-N. 6 (Germanio) deziras interŝanĝi fotojn kaj esperantaĵojn kun ĉiuj landoj.

*Franz Riedel*, Rothenbach No. 6 Kr. Landeshut i. Schles. (Germanio) deziras koresp. kun ĉiuj landaj samideanoj pri temoj liberpensaj. (Ilustr. poŝtkartoj preferataj.)

*E. Spiridoviĉ*, jurnalisto, ul. Liebknechta 45/12, Ĥarkov (Ukrainio Sovetio) ĉiuj demandoj pri antireligia kaj liberpensa movado. Nepre tuj resp.

*A. Stahurski*, ul. R. Luksemburg 117, Ludinovo (Brjansk gub.) USSR. dez. koresp. pri kontraŭdia movado.

*Redakcio de "Bezvirnik"* (senkredulo), ukrainlingva monata revuo, favore akceptas interesajn sciigajojn pri la kontraŭ-religia movado en ĉiuj landoj. La peranto estas: "Labesko — SAT" V. Kolĉinski, Kremenĉug, USSR.

*Centra Klubo je la nomo Karl Marx, Rondeto "Ateist"*, USSR., Voronej, petas ĉiujn laboristajn kaj lernejajn klubojn ĉe kiuj ekzistas rondetoj de "ateistoj" doni informojn pri sperto de la laboro. Kian programon vi havas? (sendu specimenon). Kia literaturo estas eldonita en via lando pri ateismo? (listo de aŭtoroj kaj mallonga enhavo). Sendu ateistajn jurnalojn.


# Mit oder ohne Gott

Polemik zwischen Kapuzinerpater Columban, Ehrenbreitstein und dem Präsidenten der IPF Prof. Hartwig, Brünn.

Die Broschüre, 96 Seiten stark, enthält den stenographischen Bericht der sechs öffentlichen Freidenkerversammlungen vom 7. bis 11. Januar 1926 in Essen und Umgebung.

Inhalt: Gott und Gottesleugner / Jesus oder Karl Marx / Das Elend des Lebens und der Glaube an Gott / Kirche und Freiheit.

Preis M. —.80.

Zu beziehen:

**Bund proletarischer Freidenker Rheinland-Westfalen, Essen a. d. Ruhr, Steeler Str. 17**



# NOVAJ TEMPOJ

Internacia pedagogia revuo por la nova lernejo

Oficiala organo de T A G E Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj

Specimeno kostas 0.25 mk. g.

Mendu ĉe:

**M. Goldberg, Klemmstr. 14 p., Leipzig-Connewitz (Germanio)**


# LIBERPENSULARO

De la sukceso Esperanto dependas ankaŭ la sukceso de niaj celoj. Liberpensuloj-esperantistoj ĉiam celas pruvi kaj montri, ke nia lingvo efektive donacas la bonfruktojn al la kulturo. Do, sciante, ke nur per ago ni atingos nian altcelon — nepre kaj tuj helpu al la muzeo de fama Petro Kropotkin, per alsendo de libroj, jurnaloj, fotoj ktp. (diverslingve), alivorte ĉion rilatantan iemaniere la vivon kaj agadon de tiu majesta homo.

Krom tio, la komitato organizita por fondiĝi la muzeon de Mikaelo Bakunin — petas ĉiujn alsendi saman rilate M. Bakunin, ĉar oni intencas aranĝi la ekspozicion je memoro de M. Bakunin ĉe la muzeo de P. Kropotkin.

Ĉiujn sendaĵojn bonvolu direkti laŭ jena adreso:

**Muzeo de P. Kropotkin, Kropotkina per. 26, Moskvo, Sovet-Unio.**

Kamaradoj dezirantaj ricevi ion rekompence estas petataj komuniki min:

*Alexandro Liljer, Brjanskaja, 15—2. Moskvo, Sovjetlando.*


# Germana Literaturo

**Liberpensa — Pacifista**
**Socialista — Komunista**
**Sindikata — Vivreforma**

Mi liveras laŭ originalprezoj de la eldonistoj. Poŝtelspezoj estas kalkulataj nur duone. Se vi interesas pri iu ajn literatura fako, vi regule senpage estas informata per prospektoj kaj katalogoj pri la novajoj en via fako.

**Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22, Poŝtĉekkonto 43 808**


Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig O 30 (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

Kotizo pagita.

3-a Jaro, N-o 2 Marto—Aprilo 1927

# Liberpensulo

OFICIALA GAZETO DE LA INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ

CELOJ de la "Internacia Ligo de Liberpensuloj": Disvastigi esperanton inter liberpensaj rondoj, disvastigi liberan penson, krei kaj presigi liberpensan literaturon en esperanto, aranĝi fakkunvenojn ĉe kongresoj. — La KOTIZO por la Ligo estas laŭplaĉe, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro.

Sekretario: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, I, Leipzig O 30 (Germanio)

Poŝtĉeka n-o 43808 Leipzig

La gazeto estas por membroj senpage.

Manuskriptojn bonvolu sendi al la sekretario.

Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## LA SALO DE LA VIVO

De *Vincent J. Hands*

En tia mondo kia nia, mondo "abunda de obstakloj" laŭ diro de Vauvenargues, kiel grandvalora estas la humoro. La vivo, vidata el kiu ajn starpunkto, ja ne lasas al ni multe da grundo por senĝena optimismo. Eĉ Kandide fine devas rememorigi al la klera D-ro Pangloss, ke kvankam ĉi tiu eble estas la plej bona el ĉiuj eblaj mondoj, tamen ni ankoraŭ devas kulturadi nian ĝardenon. Sed ĉio dirite kaj farite, la vere feliĉa homo estas tiu, kiu, malgraŭ la sagoj kaj kugloj de malica fortuno, ankoraŭ povas "ŝerci kontraŭ tio, kio faras samon kontraŭ li". Pro tio mi ĉiam sentas ardan feliĉon kiam mi rimarkas en la koboldaĵoj de mia infana knabo la fruajn flametojn de humoro, kaj mi mense alparolas al li jene: "Mia filo, doninte al ci ekziston, mi estis kulpa pri la nepardonebla peko, ĉar estas devo de ĉiu inteligenta homo zorgi, ke la homa tragedio finiĝu kun li. Sed erarinte, mi petas cin rememori, kiam la vivo forte premos sin sur cin, ke mi, kiu donis al ci vivon, ankaŭ dotis al ci la netakseble valoran talenton de bonhumoro kaj la kuraĝon travivi."

Kelkfoje mi pensas, ke nur tiu kun sento de humoro vere taksas la severan realecon de la vivo; la mizantropo kutime estas tro konscia pri sia propra mizero rimarki tion ĉe aliaj. Estas, fakte, ĝuste la kapableco rimarki komedion en la mezo de tragedio, kio karakterizas la veran humoriston. Iafoje mi aŭdis S-ron Ĉapman Kohen deklari, ke li neniam estas pli serioza ol kiam li ŝercas. Tio estas tiel vera rilate al ĉiu granda Liberpensulo, kiel al grandaj sprituloj. Tio estis vera pri Ingersoll kaj Foote, ankaŭ pri Voltaire kaj eĉ pli vere rilate al la plej granda Franco de nuna epoko — Anatole France.

Kio estas bonhumoro? D-ro Littleton priskribis ĝin jene: "sento de maltaŭgaj emocioj". Kaj li devenigas de tio refuton de determinismo — forgesante, ke, se determinismo estas vera, la maltaŭgeco estas per tio determinita. La difino estas, tamen, bonega, ĉar ne ekzistas ekzemplo de humoro en kiu ne estas ia elemento de maltaŭgeco. Estas diversaj specoj de humoro, kaj la plej bona estas ofte ne konscia, kiel ekzemple, la nejuna sinjorino kiu, demandita de la paroĥestro kial ŝia edzo ne akompanis ŝin al preĝejo, respondis, "Vi vidas, paroĥestro, li estas ano de alia abomenaĵo"[1]. Kaj estas malgajiga humoro de la maljuna avarulo, kiu venigis ĉe sia lito siajn gefilojn, esperplenaj ricevi heredaĵon, nur por sciigi al ili la malagrablaĵon, ke ĉar ilia patrino kaj li neniam geedziĝis, la infanoj estas aro da bastardoj!

Kaj tiel oni povus daŭrigi ĝis grado, ke la nuna numero de Liberpensulo fariĝos volumo da "spritaĵoj kaj ŝercaĵoj". Humoro estas rekognata faktoro en la homa vivo, ĝian valoron estus malfacile sufiĉe taksi. Ĝi ebligas al ni transiri obstaklojn, kiuj alie estus netransireblaj, per ĝia helpo ni povas renkonti malfeliĉon ridetante. Ĝi estas la solvaĵo de pesimismo; — la malamiko de hipokriteco, ĉarlataneco, kaj malindulgeco. Ĝi estas la salo, kiu donas la guston al la vivo.

Estas tamen sfero kie bonhumoro estas tabuo. Tiu sfero estas la loko, kie la plej sanaj, naturaj aferoj estas tabuataj. Tiu estas la mondo de religio. Dirante tion, mi ne volas diri, ke ĉe religiuloj ne estas sento de humoro, sed nur, ke ili tute ne kuraĝas apliki sian humorecon al aferoj sanktaj. Se ili tion farus, ili baldaŭ eltrovus, ke nenio estas sankta kontraŭ humoro. Tio estas treege multsignifa. Se movado estas vera kaj utila, ĝi tute ne timus la ridon de honesta homo. Jam estis dirite multe da ŝercoj kontraŭ geedziĝo (mi iafoje aŭdis fraŭlon aserti, ke edzino estas bona en sia ĝusta loko. Sed kiam ŝi estas en sia ĝusta loko, vi estas vidvo!) tamen ĝi daŭras esti populara institucio. Prenu bopatrinojn (ne gravas al mi kien vi prenas ilin, sed prenu ilin): rigardu la ŝercojn diritajn kontraŭ ili. Kaj, tamen, oni ne aŭdas, ke delegitaro da koleraj bopatrinoj aŭdiencas ĉe la ĉefministro. Estas nur religio, kiu bezonas Akton en Parlamento por ŝirmi ĝin kontraŭ mokado. Se mi estus religia, mi tute ne sentus min fiera pro tio.

Religio neniam estas tiel interesa ol kiam oni jam ĉesis kredi en ĝi, same ĝi neniam estis tiel amuza. Mi jam vidis maljunetan sinjorinon, de grandega amplekso, preskaŭ histeriiĝi en la urbdomo de Birmingham. Kaj la kaŭzo de ŝia kuntordado estis iu priskribo en ĉiutaga lingvo de S-ro Kohen pri la vagadoj de la Infanoj de Izraelo en la dezerto! Gardu vin kontraŭ iu tiel nomata Liberpensulo, kiu ankoraŭ ne atingis tian gradon de progreso, kie li povas ridi kontraŭ la fundamentoj de religio — li estas ema iam forfali. Gardu vin ankaŭ kontraŭ homo, kiu ne havas en si senton de humoro. Mi jam renkontis seriozajn ulojn, tiel okupataj pri tute ne realigeblaj ekonomiaj teorioj, ke oni pensus, ke ili opinias humoron esti inventaĵo de la kapitalista klaso por forlogi la atenton de la proletaro de la realaĵoj kaj la klasbarakto. Al tiaj estus tia granda sakrilegio ridi kontraŭ Lenin, kia estas ŝerci kontraŭ Jesuo. Tamen kial ne? Mi konstatas, ke estas iomete malfacile bildi Jesuon en humora situacio. Li ne taŭgas por tio. Penu bildi lin dancanta la Jerusaleman Jazon aŭ la Galilean Galopon kun Mario Magdaleno! Mi scias, ke se la modo de paĝia kapo tiam ekzistus, ne estus eble al ŝi sekigi la piedojn de Ĉiopovulo, — sed mi neniam opiniis tion esti higiena. La Kristano eble kontraŭstaros tiajn frivolajn konsiderojn per certigo pri la dieco de Kristo. Nu, humoro eĉ

[1]) Ŝi intencis diri "denominaĵo" (nekonformista sekto).

**Ĉiu novaliĝonto ricevas kvar malnovajn interesajn "Liberpensulo"jn senpage.**

en Dio estas savanta lin honoro. Ĝis nun mi neniam renkontis dion, kiu ne estus pli bona, se en li estus iom da humoro; la pli multo da dioj, konataj al mi, havas la petolecon de lerneja knabino kombinata kun la kolero de pensiita majoro (Hinda Armeo).

Ni ĉiamaniere kulturu la econ de humoro. Ĝi estas multvalora perlo. Ĝi parencigas la homojn tra la tuta mondo, kaj estas la tuŝŝtono de bona kamaradeco. Oni ne povas forigi la penson, ke la historio de la mondo eble estus malpli sanga, kaj enhavus pli da homa afableco, se honesta ridado estus permesata penetri la konferencojn de la potenculoj. Feliĉa estas tiu, kiu ne adoras falsajn valorojn, kiu ankoraŭ havas en si la kapablon ĝui la simplajn plezurojn de la vivo, kaj kiu povas diri — kun la ĝentila Ben Adhem — "Skribu pri mi kiel homo, kiu amas siajn kunulojn."

Tradukis el "*Freethinker*" (angla) *Torĉo*.

★

# Reakcio marŝas en Germanio

Parte la reakcio en Germanio atingis sian celon. La internaciaj jezuitoj de Romo kaj Vitenberg metas la potencon de regno al sia servo. De 1918, post la revolucio, per helpo de eksterlandaj agentoj kaj dank' al malkuraĝeco de la iam liberala burĝaro, la romkatolika eklezio vastigis sian potencon. Kiel kunulon en ĉi rabado ĝi havas la evangelian eklezion.

Antaŭ 1918 la eklezio ricevis nenian monhelpon de la regno. Sed nun milionoj fluas en ĝian poŝon. La ŝtata subvencio por eklezio en Prusio estas po 2.— g. m. por kapo; — en Bavario eĉ po 3,40 g. m. De la tuta regna loĝantaro tiel kolektita imposto atingas kelkajn centojn de milionoj da markoj. La propraĵo de la eklezio ne estas impostata. Krom tio la monaĥejoj kaj preĝejaj komunumoj prenas prunte monon por konstruo de novaj monaĥejoj kaj preĝejoj. Samtempe la popolo vivas malbone, loĝas en mizeraj loĝejoj; senlaboreco estas stato normala.

Grade la eklezio akaparis la edukadon kaj la klerigadon. Ĝi atingis, ke nun per leĝo oni povas malpermesi kontraŭ-religian, pacifistan aŭ iun kulturigan literaturon; oni cenzuras la filmojn; la akademioj por instruistoj estas sub religia gvidado; en kelkaj departementoj de la lando, la eklezio enpenetris en faklernejojn; en Bavario jam dum jaroj estas Konkordato. Nun la "nigraj fantomoj" celas atingi konkordaton por la tuta regno.

La ŝtatpotenco estas nun en la manoj de la monarĥistoj, industriistoj kaj jezuitoj; do, en la manoj de la malhela reakcio. Post naŭ jaroj de respubliko oni estas regataj per la imperiestra moto: "Religion por la popolo". Religion — kiel kontraŭ — venenon al la "naŭa novembro"; religio — por fortiri atenton de la popolo de la ekonomia mizero.

Pro politikaj kaj personaj diferencoj inter sekretario kaj estraro okazis krizo antaŭ *2* jaroj en la "Gemeinschaft Proletarischer Freidenker" (Asocio de Proletariaj Liberpensuloj). Ĝi povas esti paralelita al tiu de la romkatolika pozicio, kiam estis samtempe du papoj. Tiu Proletaria Asocio de Liberpensuloj havis dum la krizo du estrarojn kaj ĉiu aparte eldonis gazeton "Ateisto". La krizo jam ne ekzistas. Oni ĝoju, ke liberpensuloj fine komprenis kiom grave estas koncentrigi ĉiujn fortojn antaŭ aroga kontraŭulo. La du grandaj asocioj "Verein der Freidenker für Feuerbestattung" kaj "Gemeinschaft Proletarischer Freidenker" formas nun unu asocion "Verband für Freidenkertum und Feuerbestattung" ("Ligo de Libera Penso kaj Kremacio"). Ĝi havas 500 000 membrojn kaj gazeton "Der Freidenker" ("La Liberpensulo"), eliranta en 350 000 ekzempleroj.

Preskaŭ ĉiuj liberpensaj societoj en Germanio estas jam dum 5 jaroj unuigitaj en "Reichsarbeitsgemeinschaft Freigeistiger Verbände" (Kartelo de liberpensaj Organizaĵoj). Dum la semajno de 21.—27. de marto ĉi liberpensa kartelo aranĝis agitkunvenojn por eksiĝo el eklezio.

★

# Sonoriloj ankoraŭ klakadas . . .

Ĉu la soveta registaro permesus al vendistoj de semoj sunfloraj, kiujn rusoj tiom ŝatas maĉi, allogi klientojn per blovado de trumpetoj ladaj, al purigistoj de botoj kaj ŝuoj — per fajfiloj, al buĉistoj — per blekiloj mu-aj, al vendistoj de viando por katoj — per bloviloj miaŭaj, al aliaj metiistoj — per sirenoj, tintiloj, cimbaloj, gongoj ktp.? Se komercistoj uzus bruajn instrumentojn por vendi siajn varojn, la registaro dirus kaj tute juste, ke tia bruado ne estas tolerebla aŭ permesebla, pro rompo de paco, en orda lando. Ĉar sonorigado estas permesata al la pretendantaj pilotoj al ekstermonda regiono, tio pruvas ke eklezaj ĉarlatanoj estas favorataj de la Soveta registaro.

De la 6-a horo matene, ĉiu hore ĝis la 9-a vespere, vole nevole, oni devas toleri la laŭtegan klakadon kaj tintadon de preĝejaj sonoriloj, kvazaŭ diabla ridego super malamiko. Se oni estas malsana, ne gravas. La ĉarlatanoj eĉ pli forte kaj pli longe sonorigadus, se tio rapidigus ies morton, — ritoj enterigaj ja enspezigas monon.

Unu dimanĉon, antaŭ ne longe, mia edzino kaj mi laŭstratiris Sebastopolon kaj eniris en kelkajn oficejojn de animpilotoj, (kien ili iros ili ne scias). Tie dum la tuta tago ĉarlatanoj oficas laŭ permeso de la registaro; helpantoj iliaj vendas kandelojn diversampleksajn por la kandelaringoj, grandaj kaj malgrandaj. Kiam la kandeloj jam tri-kvarone forbruliĝis, aliaj helpantoj estingas ilin. La restaĵoj taŭgas por novaj kandeloj. Granda komerco kaj trompo por fari profiton. Je ĉiu horo tiuj domoj estas plenaj de kredemaj homoj, maljunaj mezaĝaj, junaj geknaboj kaj eĉ infanoj. La ceremonioj estas gvidataj de anoj de la eklezia trusto. Almenaŭ ses pastroj, anoj de tiu trusto, ĉiuj dikkorpaj, dikventraj, fortikaj viroj altkreskaj kun fortaj basaj voĉoj partoprenas. Tiuj domoj estas speco de teatro. La aktoroj — pastroj — en belegaj per oro broditaj roboj, la figuraktoroj — kantistoj kaj knaboj en blankaj surplicoj, la halo ornamita per pentraĵoj sanktulaj (?) kun glavo en mano en kadroj orkoloraj. La aktoroj lerte ludas sian rolon. Dum unu el ili impone kantas preĝon, alia staras en la amaso kaj jen rapide jen malrapide miŝtike levadas kaj mallevadas grandan folikovritan krucon laŭ la takto de la kantata ario. Tio, evidente, tre impresas simplulojn, ĉar ili falas sur la genuojn kiam la kruco estas apud ili. Alia pastro de tempo al tempo iras inter la amaso svingante incensujon, kredeble por anestetumi la cerbojn de kreduloj aŭ eble por desinfekti ilin. Ĉiutage oni povas vidi similajn scenojn en Sovetlando. Kamaradoj asertas, ke kun alveno de komunismo aŭ socialismo religio malaperos. Nenie en Sovetlando faktoj pravigas tiun diron[1]). Kiu regas do en Sovetlando, Partio aŭ eklezio? Se Partio regas, ĝi devus malpermesi apud si alian potencan organizaĵon de la plej grandaj ĉarlatanoj en la mondo — la pastroj. Aŭ ĉu la Partio faris konkordaton kiel faras kelkaj registaroj en Eŭropo? Se jes, tia konkordato, certe ne estas por la bono de la Laboristaro. Ŝajne, la Partio uzas la ekleziulojn por kloroformi neklerulojn kiel registaroj en aliaj landoj. Alie ĝi, certe, ne permesus tian grandan organizaĵon, samtempe sufokante ĉian alian movadon. La pastraro estas nun la pivoto ĉirkaŭ kiu ariĝas la restintaj blankuloj kaj reakciuloj en animo.

Ankoraŭ sonoriloj klakadas, vokante homojn pensi nur pri utopia vivo kaj utopia mondo. Anstataŭ laboradi por la Partio, multaj ĉiutage malŝparadas sian tempon en preĝejoj. Estus multe pli profite por Sovetlando, se civitanoj, anstataŭ kliniĝadi antaŭ bildoj, frapadi la parteron per la frunto, kaj kisadi statuojn ktp. en domoj de ĉarlatanoj, kune laborus por la bono de la Ŝtato. For parazitojn.

E. E. Y.

[1]) Ni ne forstrekis ĉi-frazojn por ne kripligi ĉi artikolon. Respondon el Rusio ni tre volonte publikigos. *Redakcio.*

# Religio kaj Ekonomio

Dum la tuta periodo de pastrara regado, kiu daŭris ĝis la Reformacio en la XVI. jarcento, la popoloj kredis ĉion, ĉar ili sciis nenion. Gravaj inventoj kaŭzis la Reformacion. Kaj ili ebligis, ke pensmaniero estu bazata sur scienco.

La tri ĉefaj inventoj de la XV. jarcento estis:

1. La presmaŝino de Caxton (Kakston) en Anglio 1476, per kiu estis eble presi librojn grandkvante; homoj povis tiam legi librojn, kiujn antaŭe pastroj legis al ili.
2. En 1492 Kolombo trovis la kontinenton Ameriko. Pro tio la komerca centro de la tiama mondo translokiĝis el la urboj de Mediteraneo al la marbordaj urboj laŭlonge la atlantika oceano en Hispanio, Francio, Anglio kaj Nederlando.

   La prosperaj urboj de Italio kaj Hansaj urboj de Germanio komencis perdi sian gravecon kaj potencon. La Hansa Ligo komencis velki kaj post nelonge jam ne ekzistis kiel komerca centro.
3. El Malproksima Oriento la eŭropaj potenculoj enkondukis pulvon per kiu la reĝoj povis detrui la kastelojn de nobeloj kaj fondi nacian regnon.

Ĉi tiuj eltrovaĵoj ankaŭ kaŭzis ŝanĝon en religia mondo: dubema protestantismo anstataŭis la superstiĉan kredemon de katolikismo. Scienca serĉado komencis okupi la lokon de superstiĉoj.

La grandaj diabloj de la mezepoko estis pestaj epidemioj kaj malrikoltoj; la lastaj kaŭzis malsatojn. Por venki tiujn naturajn fenomenojn, homoj nur preĝis; sed spite tio, ili mortadis.

Al scienco ni ŝuldas la venkon de tiuj naturaj malamikoj de la homaro.

La sanktaj krucmilitiroj, kiuj daŭris dum du cent jaroj estis ne la solaj militoj en tiu periodo. Ankaŭ okazis milito inter Anglio kaj Francio dum pli ol unu jarcento (1328—1453).

Tiutempe okazis skismo en la katolika mondo en du kaj eĉ tri partiojn. En la jaro 1305 okazis la granda skismo; du papoj regis samtempe, unu en Romo kaj alia en Avignon, Francio. Tiu skismo daŭris dum centjaro ĝis 1417, kiam papo Martin V. estis proklamita la sola papo.

Tiuj ŝanĝoj okazis nur pro tio, ke la ekonomio de tuta Eŭropo stariĝis sur nova bazo. En urboj komencis flori industrio, kiu bezonis multe da lano por la malgrandaj fabrikejoj. Multaj laboristoj estis maldungitaj ĉar ŝafbredado ne bezonis multe da zorgantoj; la prezo de tritiko malaltiĝis, sed kontraŭe lano ŝafa plivaloriĝis ĝis triobla prezo.

Sur tiu industria fundamento la scienco komencis venki la mallumon de religio, alinome, la superstiĉon. *I. Floro.*

Oni legu por pli da informo: "Historio de Revolucioj en Eŭropo" de C. W. Koch, ĉap. V, kaj "Komunista Manifesto", Karl Marx. (SAT-eldonejo.)

# Lazaro ŝanĝiĝis

(Pro manko de spaco mallongigita.)

Ofte mi ŝatus koni persone la lertan rakont-verkiston konatan sub la nomo Sankta Luko. Imagu mi preskaŭ vidas, ke li estas edukita greko sklavo, kiu okupis oficon de sekretario ĉe iu Roma bienulo, vivante jen en Romo, jen apud Iona maro en la vilao de sia mastro, jen ĉe Miletus en Anatolio. Lia evangelio (kiun li mem nomas Diegezo) montras, ke li konas manierojn de kulturita socio kaj ankaŭ montras lian profundan simpation al virinoj, sklavoj kaj ĝenerale al mizeruloj. De vojaĝantaj komercistoj (kiel ni supozas), maristoj kaj vagantaj predikistoj li aŭdis rakontojn pri Nazareta martiro, kiu, ili diris, estis mortigita antaŭ centjaro. De ili li ricevis, aŭ aĉetis, manuskriptojn kun legendoj, kiujn oni nomas nun "Mateo" kaj "Màrko". Li ŝanĝis ilin kaj aldonis al ili kun la imaga lerteco de Dante, aŭ Ŝekspir aŭ Defó. Unu el liaj rakontoj estas:

> Estis riĉa homo vestita en purpuro kaj delikata tolajo, kiu lukse vivis ĉiutage; estis ankaŭ almozulo, laŭ nomo Lazaro, kovrita per ulceroj, kiun oni metadis ĉe lia pordego, kaj kiu deziris, ke oni donu al li la panerojn falintajn de la tablo de la riĉulo; krome hundoj venadis kaj lekis liajn ulcerojn.

Estas rimarkinde, ke kiam la riĉulo kaj la almozulo mortis, kaj Lazaro kuŝis feliĉa sur kuŝejo en paradizo kaj la riĉulo tordiĝis en la fornego de la infero, nenio estas dirita pri virtoj, kiujn havis la iama almozulo. Li estis levita al la dia bankeda tablo en rekompenco por antaŭa hunda vivado en malriĉeco kaj malsano, kiun li suferis en Romo, aŭ Mileto, aŭ Jeriĥo, aŭ ie alie. Legante la rakontojn de Luko oni devas rimarki, ke Luko havis profundan simpation por la proletaria klaso. Tamen, ni ne povas krediti al Luko la talenton plani organizitan komunismon aŭ socialismon.

La scio pri socio ne povis havi tiajn konceptojn en la dua jarcento. Kaj Ramsey Mac Donald (Ramsej Mak Donald) kaj aliaj lideroj de la laboristoj strange eraras, kiam ili parolas pri la Utopio de "ĉiuj aferoj komune" inter unuaj kristanoj. Kvazaŭ la anekdotoj de Luko estis preparita de Dio kiel programo por la uzo de la Labora Partio en la 20-a jarcento.

Luko ne povis tiam antaŭvidi nacian aŭtoritatularon kiu prenos sub sia direktado la ekonomiajn kaj financajn fontojn kun la celo nacie produkti kaj distribui. La plej bona destino, kiun Luko povis koncepti por malriĉulo, estis ke dio fine egaligos la aferon movinte kaj la almozulojn kaj la sklavojn en la ĉielon.

. . . Lazaro daŭre vomis, ĝemis kaj malbenis dum ĉirkaŭ 16 jarcentoj ĝis la tagoj de John Bellers, Thomas Paine (Pejn), Thomas Spence, Francis Place kaj Robert Owen.

Tiam io okazis en la vivo de la vaganta almozulo kaj salajr-sklavo. Lazaro ŝanĝiĝis.

La greka sekretario Luko (se li estis sekretario) vidus nun grandan ŝanĝon. En la jaro 126 la sola espero por Lazaro estis postmorta transporto en Paradizon.

En la jaro 1926 la videbla intenco de Lazaro (mi pardonon petas ĉe membroj de 1924 Labora Partia kabineto pro uzo de tia vulgara nomo) estas konstrui novan mondon laŭ sia plano, baki sian propran panon kaj organizi sian propran komforton. Kaj mi ja suspektas ke, frue aŭ malfrue, la riĉulo vidos en kiun direkton la politika vento blovas kaj iom nevolonte subtenos la novan programon. Mi ĝojus, se tio okazos. Mi ne aprobas, ke oni ĵetu la riĉulon — tio estas la profitulo — en la inferon. Se dependus de mi, mi igus lin membro de la Nacia Fajra Brigado aŭ ano de la Gildo de Fajroestingistoj. La memfido de Lazaro, ke li devas dependi de si mem, faras grandan diferencon; jes, ja, grandan diferencon ankaŭ en la paradizo. Eĉ lumeto de la doktrino pri memdependeco ne ekzistas en Biblio komence de Genezo ĝis fino de Apokalipso.

Pro tio mi kontraŭas la pli malpli arogajn (aŭ zigzagajn) asertojn de Ramsey MacDonald kaj aliaj, ke la Laborista Emancipa Movado ĉerpas sian ekonomian programon el Biblio. Kiel politikisto, mi ofendiĝus, se oni petus min verki mian manifeston al elektantoj por la Parlamento en frazoj preparitaj de antikva Luko aŭ Paŭlo, same kiel mi sentus min ofendita, se mi estus ligata al civita kodo de la greko Aristotelo aŭ la Hinda leĝaro de Manu.

Estas klare, ke la laborista klaso de la ĉefaj civilizitaj nacioj ne atendas efektivigon de siaj celoj per preĝoj. Dum pli ol 100 jaroj la sento de memfido estas kulturata. La unuaj politikaj lideroj (gvidantoj) vokis ribele. Iliaj filoj jam parolis kvazaŭ sugestante modestan aliancon kun la regantoj. La laboristoj de hodiaŭ intencas efektive liberiĝi de sia mizero per sia propra mano.

Certe, ili diferenciĝas rilate al la taktiko kaj al la batalilo. La Lazaro de jaro 126 neniam sonĝis pri taktiko kaj neniam etendis sian manon al batalilo. Li simple kuŝis ĉe la pordo; plue, hundoj venadis kaj lekis liajn ulcerojn. La divido en opinio en 1926 pri metodoj necesaj por emancipo estas la signo, ke sukceso estas proksima. Ĉefoj, ne sklavoj, verkas batalplanojn; kaj eĉ elportas kun kuraĝo la nesukceson de tiu aŭ alia plano; kaj poste ili elpensas pli bonajn planojn.

Lazaro ŝanĝiĝis. Li almozpetis; nun li parolas kiel egalulo.

Li kuŝis putranta; nun li marŝas kiel civitano.

Li almozpetis ĉielon; nun li ellaboras teron.

Li kaptadis panerojn; nun li ellaboras rikoltojn.

Li ĝemis la elegiojn de nokto; nun li kantas la kanton de mateno.

Li estis servutulo de Dio; nun li estas Homo. *F. J. Gould.*

## Potpurio en la regno de Dio

En Germanio povas okazi ke personoj, kiuj jam de longe eksiĝis el eklezio ricevas imposton por eklezio. La urba sinodo de Berlino faris jenan kvazaŭ karnavalŝercon. Socialisto kaj ateisto Adolf Hoffmann, eksiĝinta el eklezio 1886 kaj fama ĉe eklezio kiel faranto de grandaj varbsemajnoj por eksiĝo el eklezio, en ĉi jaro ricevis kalkulon por imposto. Jam de 34 jaroj li neniam ricevis kalkulon por eklezia imposto. Antaŭ kelkaj jaroj konata redaktoro kaj verkisto ricevis ankaŭ postulon por eklezia imposto, malgraŭ tio ke li estis eksiĝinta el eklezio. Li iris kun la dokumento pri eksiĝo el eklezio al la kompetenta oficejo. La dejoranta oficisto diris al li: "Vi montras dokumenton pri via eksiĝo el evangelia eklezio, sed la impostoj rilatas al la juda komunumo". Redaktoro respondis, ke li neniam estis membro de juda komunumo. Tiu deklaro ne sufiĉis al oficisto, li postulis pruvon. Tiam redaktoro respondis al la konfuzita oficisto: "La solan pruvon mi volonte metus sur vian tablon, se min ne malhelpus la ĉeestantaj oficistinoj kaj bonaj moroj. — Ni rekomendu al la eklezio, ke ĝi prizorgu, ke ĝia librotenado estu senerara.

*

## OBSERVEJO

Kristano ne povas ne ridi pri la kredo de mahometano en sankta misio de Mahometo, aŭ pri negro, kiu preĝas al sia Mumbo-Jumbo, ke li sendu pluvon. Sed, se liberpensulo ridas pri dieco de Jesuo aŭ pri la preĝoj de kristano por pluvo aŭ suno, kristanoj tuj plendas pri tuŝo al "sanktaĵo" kaj serĉas la protekton de leĝo kontraŭ blasfemo.

*Chapman Cohen.*

* * *

Se mi sugestus al tiu kristana sinjorino, ke ŝi forjetu sian kutiman vestaĵon, surmetu zonon el plumoj, pentru sian vizaĝon per strioj ruĝaj kaj flavaj, kaj portu grandan ringon tra sia nazo, ŝi konsiderus min mense malsana. Sed, ŝajne ŝi tute ne vidas la absurdecon, promenante kun menso vestita en ornamaĵo de sovaĝulo; samtempe ŝi tute ne konsentas porti lian korpan ornamaĵon.

*Ch. Cohen.*

* * *

La ŝtato Tenesi en Ameriko, fama pro sia kristana amo al negroj, pasis leĝon, kiu malpermesas la instruon de Evoluo en iu lernejo de tiu ŝtato; same malpermesas iun alian instruon pri la kreo de la mondo, krom tiu de la biblio. Dua leĝo postulas, ke ĉiuj instruistoj konfesu kredon en dieco de Jesuo Kristo antaŭ ol iri ricevi salajron. Kaj senĉese oni aŭdas, ke la homaro progresis! Ĉu?! Estas ankoraŭ miloj de milionoj da homoj, kiuj ankoraŭ estas en Ŝtona Epoko. Sen ia dubo, se la homo, kies kranion antaŭnelonge estis elfosita en Afriko, povus rehejmiĝi sur la teron, li sentus sin tute hejme en Tenesi.

*F. J. Gould.*

* * *

Kelkaj preĝejoj estas malplenaj, aliaj estas tro plenaj. Ne Dio, Kristo aŭ Sankta Spirito estas, kiuj altiras la amasojn. Estas nur viroj kaj virinoj kun oratora talento, kiuj ellernis la arton sukcese impresi aŭskultantaron, kiuj atingas tion. Kaj ili neniam malsukcesas dum ilia talento estas ĉe ili.

*J. T. Lloyd.*

* * *

## Surskribo legebla sur pastra tombo en Noyers (Loiret) Francio

**Egaleco.**

Ĉi tie ripozas la civitano Eŭgenio Courson, pastro de Noyers, mortinta la 17-an de decembro 1905. Li estis 81-jara. Li estis espriminta al sia nevo la deziron esti enterigata nereligie, ĉar li ne volis, ke lia ĉerko estu profanata per la afektaj hipokritaĵoj de liaj ekskolegoj.

## Landreprezentantoj

*Anglio:* F-ino D. White, 166 Church Rd. Upper Norwood, *London SE 19.*
*Aŭstrio:* E. Hübner, p. Adr. „Freie Weltanschauung" (Max Tonner), *Salzburg,* Fürstenweg 24.
*Belgio:* Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, *Antwerpen.*
*Blankrusio:* Dim. Snejko, poŝtkesto 33, *Minsk.*
*Ĉekoslovakio:* S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, *Dolni Kounice.*
*Ĉinio:* Pandiŝo, N.Y.M.S., Lunghwa, *Shanghai.*
*Francio:* Emil Gasse, 15 place Gambetta, *Le Havre.*
*Germanio:* vidu Sekretario (unua paĝo).
*Hispanio:* R. Wood, Calle Molas, 32, 3o, 3a, *Barcelona.*
*Hungario:* S-ro Hugai Ferenc, *Gyöngyös.*
*Japanio:* Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, *Tokio.*
*Jugoslavio:* S-ro Paskal Bogdanoviĉ, *Komixa-Vis.*
*Nederlando:* C. F. Everts, Vespuccistraat 91, *Amsterdam.*
*Polio:* Jan Zawada, ul. Kröla Leszczeryńskiego 36 m. 2, *Lublin.*
*Rusio:* Dunajev, *Leningrad,* Gubkom Esperantistov, Smolnijprospekt 15, kv. 11.
*Skotlando:* Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, *Glasgow.*
*Svedio:* Einar Adamson, *Göteborg,* Box 73.
*Turkio:* S-ino. T. Yelland 25/37 rue Kerestedje, Pera, *Konstantinople.*
*Ukrainio:* V. Kolĉinski, *Kremenĉug.*
*Usono:* S-ro Karl Fröding, 221, 7th st., *Rockford, Ill.*

## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

"Sormovskij sojuz bezboĵnikov", Sormovo, ap. N.-Novgorod, Sovet-Unio, deziras interŝanĝi antireligiaĵojn.

*Albert Weinhold,* Leipzig-Stö., Schönbachstr. 55, deziras koresp. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

INSTRUISTOJ
via gazeto estas
INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)
Gazetabono: 2,50 mk. g.
Kotizo al TAGE: 0,50 mk. g.
Specimenon petu de **M. Goldberg,** Frohburger Str. 68, p., Leipzig S 3 (Germ.)

**Germana Literaturo**
**Liberpensa — Pacifista**
**Socialista — Komunista**
**Sindikata — Vivreforma**
Mi liveras laŭ originalprezoj de la eldonistoj. Poŝtelspezoj estas kalkulataj nur duone. Se vi interesas pri iu ajn literatura fako, vi regule senpage estas informata per prospektoj kaj katalogoj pri la novaĵoj en via fako.
**Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22, Poŝtĉekkonto 43 808**

Liberpensaĵojn
**ĵurnalojn, flugfoliojn, afiŝojn statutojn, fotojn, ilustraĵojn ktp.**
sendu plejeble kun esperanto-traduko.
Sendu ankaŭ interesajn novaĵojn eldonitajn de la eklezio en via lando:
Adresu:
**Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22, Poŝtĉekk. 43 808**

GRAVAJ VERKOJ!

| | germanaj markoj |
|---|---|
| *Goethe,* Faŭsto I, 156 pĝ. . . . | 1.20 |
| *Tolstoj,* Tri verkoj, 78 pĝ. . . | —.80 |
| *Barbusse,* Eklumo en abismo . . | —.80 |
| *Kropotkin,* Etiko, 240 pĝ. . . . | 1.80 |
| *Reiche,* El la mondbildo del l' nova fiziko, 52 pĝ. . . . . . | —.60 |
| *Fersman,* La kemio de la universo | —.60 |
| *Ziegler,* Sekspsikologio, 54 pĝ. . | —.60 |
| *Kontraŭ Dio!* (ateista krestomatieto), 28 pĝ. . . . . . . | —.40 |

Haveblaj ĉe:
**R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanlando)**
*Petu nian katalogon!*

**Pagu vian kotizon. Germanoj sendu monon per poŝtĉeko.**

Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig O 30 (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).

3-a Jaro, N-o 3 Majo—Junio 1927

# Liberpensulo

OFICIALA GAZETO DE LA INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ

CELOJ de la "Internacia Ligo de Liberpensuloj": Disvastigi esperanton inter liberpensaj rondoj, disvastigi liberan penson, krei kaj presigi liberpensan literaturon en esperanto, aranĝi fakkunvenojn ĉe kongresoj. — La KOTIZO por la Ligo estas laŭplaĉe, sed minimume gmk. 2.— aŭ sama valoro.

Sekretario: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, I, Leipzig O 30 (Germanio)
Poŝtĉeka n-o 43808 Leipzig

La gazeto estas por membroj senpage.

Manuskriptojn bonvolu sendi al la sekretario.

Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia gazeto. Sendu du pruvekzemplerojn.

## 1887—1927

En Junio 1887 D-ro L. L. Zamenhof publikigis sian lingvan projekton sub la titolo "Lingvo Internacia de D-ro Esperanto" per mono, kiun li devis pruntepreni, ne povante trovi eldoniston. Estante idealisto D-ro Zamenhof ne havis deziron riĉiĝi per sia elpensaĵo; li donis ĝin al la mondo senpage por la progreso de la homaro. Li estas, sen ia dubo, unu el la plej noblaj kaj grandaj homoj de la dudeka jarcento; li donis sian tutan tempon kaj energion por helpi al la homaro paciĝi tra la mondo. Lingvisto, pacifisto, li estis ankaŭ humanisto. Multaj estis la pacientoj, kiuj ricevis senpagan konsulton, en la malriĉaj kvartaloj kie li praktikadis kiel okulisto. Pro sia modesteco li estis amata de ĉiuj, kiuj lin renkontis. Nia lingvo ŝuldas multon al la parencoj de D-ro Zamenhof, precipe al lia bopatro, kiu helpis lin mone por propagandi esperanton. Lia edzino, Klara, ankaŭ ludis neforgeseblan rolon, ĉar ŝi laŭ sia povo helpis lin kaj ofte permesis al sia edzo elspezi monon por esperanto, kiu estis bezonata por la vivo de la familio.

Komence la lingvo tre malrapide disvastiĝis, sed pro la persista kaj senlaca laborado de la entuziasmigitaj adeptoj, jam en 1905 estis miloj da samideanoj, multaj el kiuj kongresis por la unua fojo en tiu jaro en Boulogne sur Mer. De jaro al jaro la movado pli fortiĝadis kaj jam en 1914 estis akceptita de la publiko kiel stabila organismo. Al la Esperanto-kongreso en Parizo 1914 (kiu pro eksplodo de la mondmilito estis oficiale malfermita kaj tuj fermita) aliĝis ĉirkaŭ 5 000 kongresontoj. La grandega "Mondekspozicio por libraj metioj kaj grafikaj artoj" 1914 en Leipzig jam propagandis sin per esperanto. En tiu ekspozicio esperantistoj havis propran pavilonon.

Pro la milito 1914 kaj neebleco internacie korespondadi, la esperanto-movado suferis en progreso, ankaŭ ĝi perdis multe da samideanoj, mortigitaj en tiu milito. Tial, post la fino de la interpopola malpaco nia movado estis nur malpli forta ol en 1914, dum multaj aliaj internaciaj societoj malaperis. Esperantistoj frue en 1919 denove fervore eklaboris kaj nova epoko por esperanto komenciĝis. Dum la pasintaj tri jaroj la movado atingis sukceson post sukceso, pri kiuj ni rajtas fieri. Nun ni solenas la 40-jaran jubileon de la movado. Ree kaj ree ni aŭdas pri novaj sukcesoj en internaciaj rondoj. En preskaŭ ĉiu lando tra la mondo troviĝas nacia esperanto-asocio kun sia nacia gazeto. Krom tio ekzistas gravaj internaciaj fakaj movadoj kaj unuiĝoj kiuj uzas esperanton por propagandi siajn celojn.

La esperanto-movado konsistas el du fortaj internaciaj asocioj; unu — neŭtrala *La Universala Esperanto - Asocio,* kies oficejoj estas en Ĝenevo, kun monata gazeto *Esperanto* kaj reprezentantoj en miloj da urboj kaj vilaĝoj tra la mondo; alia — laborista *Sennacieca Asocio Tutmonda* kun administrejo en Leipzig, eldonanta ĉiusemajnan gazeton *Sennaciulo* kaj monatan *Sennacieca Revuo.* Ĉi tiu asocio havas "Libran Eldonan Kooperativon", kiu eldonis multe da tre valoraj libroj.

Ne estas eble ĉi tie raporti ĉiun sukceson. Nia lingvo jam estas akceptita kiel internacia lingvo de Radiaj Societoj, de la Poŝta Unuiĝo, registaroj ktp. USSR eldonis specialajn poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun esperanto-teksto. La fervoja kompanio de Jugoslavio uzas esperanton en internaciaj vagonaroj.

Kvankam kontraŭbatalata de naciistoj, neniam lernintaj la lingvon, asertantaj, ke oni ne povas paroli per science aranĝita idiomo, tamen esperanto paŝas antaŭen kaj grade ekokupas gravajn postenojn. La vivo mem elektos la plej bonan mondlingvon kaj signoj montras, ke tiu lingvo estas esperanto.

En la arĥivo de la antaŭmilita internacia societo esperantista de liberpensuloj "Libera Penso" estas letero de D-ro Zamenhof, kiu povas interesi la legantojn. Faksimilon vidu paĝo 10. Jen la teksto:

*Kara Sinjoro!*

*Kun plezuro mi subskribis kaj resendas al vi la folieton pri "La Vojo".*

*Mi nun ne scias ankoraŭ, ĉu mi povos veni al la Pariza kongreso; sed se mi venos, estos al mi tre agrable ĉeesti ĉe la kulturkoncerto, kiun la Libera Penso intencas aranĝi.*

*Via Zamenhof.*

D-ro Zamenhof revis fondi etikan movadon por kio li verkis traktaton "Homaranismo". En ĝi li tute ne proponis iun religion. Kvankam mem teisto, kion pruvas liaj verkoj, li estis tre tolerema homo kaj sincere promesis ĉeesti la liberpensan kunvenon dum la Pariza kongreso.

Bedaŭrinde nia majstro mortis multe tro frue en aprilo 1917. Por honorigi lin la plej bona monumento estos nia senlaca, intensa, fervora kaj entuziasma propagando de lia kreitaĵo, ĝis kiam ĉiu homo sur la tero povos paroli en ĝi. Jen nia tasko. Ni liberpensuloj esperantistoj metu nian ŝultron al la veturilo de progreso por akiri novajn sukcesojn dum la nuna jubilea jaro. Ĉu vi, leganto, kiel individuo, puŝas kun via tuta pezo? Se ne, tion faru ... ĝis plena venko.

★

## Teologia Vortaro

de *Grace Verne Silver*

*Anĝelo:* Ĉiela flirtulo.

*Ĉiopovulo:* Alia nomo por dio. Li pruvis sian ĉiopovecon pro nekapableco ĉesigi la grandan mondmiliton, ĝis mankis mono por daŭrigi la buĉadon, kaj allaso de dek milionoj da senkulpaj nebatalantoj morti pro malsato kaj malsano.

*Diablo:* La plej sankta patrono por pastroj. Sen li ne estus okazinta la tento, tial nenia peko, neniu bezonus savon, kaj pastroj ne havus ion por priparoli.

*Dio:* La granda enigmo.

*Eterneco:* Havas nek komencon nek finon; nek tempon, spacon, substancon.

Uzata kiel misteraĵo por timigi malfortulojn.

*Evo:* La unua virino; farita el ripo de Adamo. Tio klarigas kial edzinoj ĉiam riparas, ripetas aŭ ripozas.

*Fanatikulo:* Pia persono, piediranta al paradizo de dio, estus konsiderata mense malsana, se ne estus religia.

*Filo de Dio:* La sola viro konata en la historio de la mondo, kiu estis samtempe tiom aĝa kiom la patro, pli aĝa ol la patrino je kelke da trilionoj da jaroj, estis edzo de la patrino, patro de si mem kaj filo de la propra avino.

*Homo:* Estaĵo simila al dio, farita de dio kaj agas preskaŭ same malbone kiel dio.

*Idoladorado:* Adorado de iu alia dio ol tiu laŭ la modo adorata en via komunumo.

*Infero:* Loko kie vapora hejtado neniam ĉesas; dio kreis ĝin por havi lokon eterne stuvi kanibalan saŭcon.

*Jesuo:* Filo de Mario. Neniu scias, kiu li estis. Patro estis dio, kiu forlasis lian patrinon antaŭ la nasko, lasinte ŝin sen ĉambro, sen mono por lupago kaj sen helpo dum akuŝo.

*Kredo:* Akcepti ion, kion neniu iam vidis, aŭ estas eble vidi, kaj kio, se estus videbla, ridigus aŭ abomenigus.


*Kristo:* Estaĵo, kiu venis por savi la mondon kaj mortis; ne povis savi sin mem.

*Morto:* Elpensaĵo de dio por konfuzi la homaron. Kiam homoj mortas, poste komenciĝas iliaj zorgoj. Oni diras, ke bonaj homoj ĉion scios en la morto, kvankam ili nenion scias dum ili vivas.

*Malamo:* Dia emocio. Laŭ Jesuo (12:51 Luko) "Ĉu vi supozas, ke mi alvenis por doni pacon sur la tero? Mi diras al vi, ne; sed pliĝuste dividon." (14:26 Luko): "Se iu venas al mi kaj ne malamas sian patron kaj patrinon, kaj edzinon, kaj infanojn, kaj fratojn kaj fratinojn, jes, kaj eĉ sian propran vivon ankaŭ, tiu ne povas esti mia disĉiplo."

*Nenio:* Materio el kiu la universo estis farita. Adamo estis fabrikita el ĝi, post kiam ĝi estis transformita en polvo. Tamen, nenio estis metita en lian kapon kaj ankoraŭ nenio estas tie.

*Patrineco:* Se laŭ licenco — sankta; se virgulina — dia; se eksteredziĝo — senmorala, malpura kaj malvirta.


Dro L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

14/X 1913

Kara Sinjoro!

Kun plezuro mi subskribis kaj resendas al Vi la folieton pri „La Voĉo".

Mi nun ne scias ankoraŭ, ĉu mi povos veni al la Pariza kongreso; sed se mi venos, estos al mi tre agrable ĉeesti ĉe la kulturkunveneto, kiun la Libera Penso intencas aranĝi.

Via
L Zamenhof

*Pomo:* La preferata frukto de dio. Kiam Evo manĝis la solan pomon, kiu ornamis lian arbon, li treege koleriĝis. Li volis gardi ĝin por fari cidron.

*Religio:* Laŭsisteme aranĝita trompaĵo. Venas de la latina vorto "religio", kiu signifas: ligi, firmeligi; ligi la cerbon.

*Sango:* Uzata de kristanoj anstataŭ akvo. Ili trinkas sangon, kantas pri sango, banas sin en sango. La tuta sango venas de Jesuo. Ne estas mirinde, ke li mortis, doninte tiom da sango bezonata de kristanoj tra la mondo por iliaj ceremonioj.

*Ŝafido:* Ŝatata manĝaĵo de anĝeloj, kiam ili vizitas homojn. Estas bontono buĉi ŝafidon por soleni ilian alvenon. Ŝafidoj ne ŝatas vizitojn de anĝeloj.

*Scio:* La unua afero, kiun dio malpermesis al homo. "De la arbo de la scio vi devas ne manĝi," diris sinjoro dio; kaj de tiu tempo ĝis hodiaŭ neniu vera religiulo volas ion scii.

*Ŝtuparo* (de Jakobo): Tiel metita, ke ĝi apogiĝis kontraŭ la traboj de ĉielo; anĝeloj grimpis suben per tiu ŝtuparo anstataŭ uzi siajn flugilojn kaj poste suprengrimpis la ŝtuparon. Jakobo metis malmolan ŝtonon sub sian kapon anstataŭ kusenon, kio kaŭzis al li inkubon, dum kiu, li pensis, ke li vidas dion, kiu afable informis al Jakobo, ke li donos al li multe da tero kaj tiom da idoj kiom da polveroj sur la tero.

*Tantiemo:* Sanktigita imposto per kiu la eklezio prenis dekonon da ĉies enspezo por la laboro por dio. Tantiemoj jam ne ekzistas, ĉar nuntempe estas la kutimo preni la tutan enspezon de homo.

*Unueco:* Speco de ŝmiroleo; tri-en-unu; (unu en tri, tri en unu.) Miriga matematika eltrovo, kiu decidige pruvas, ke

1 plus 1 plus 1 = 1.

*Virgulino:* Patrino needzigita. Nuntempa societo ne donas ĉi tiun vorton, sed alian, malpli belsonan, en tiu okazo.

*Zeloto:* Fidela imitanto de zelota dio; fisankta aĉulo; sanktigita kristana kanajlo.

(Daŭrigota.)

★

## Potpurio en la regno de Dio

En ĉiu lando la delegitoj de dio vestiĝas alimaniere ol ordinaraj homoj. En katolikaj landoj ili promenas sur la stratoj en longaj roboj ĝis maleolo, dum normalaj homoj portas pantalonojn aŭ jupojn ĝis genuoj. Ortodoksaj delegitoj krom tio portas sur la kapo renversitajn sitelojn el ŝtofoj por ŝajnigi, ke ili estas superuloj. La dia delegito por la protestanta kredo portas rondan kolumon, izotera simbolo de gardanto inter ŝafoj. Se la kolumo estos ĵetita al hundoj kaj la speciala paroltono ne daŭrigata, estos granda danĝero, ke el la religia komerco restos nur fumo. Ni konsilas al diaj delegitoj, ke ili tenu sin forte al la longa robo, al la sitelo kaj al la hunda kolumo, ĉar pro tiuj signoj ordinaraj homoj indulgas kaj toleras ilin, rilatas en paca spirito, vidante en ili homojn, kun kiuj oni ne povas serioze paroli.

L*

La Metodista sekto de dio nun volas, ke la delonge mortinta literaturisto Dickens (Dikenz) estu ano de ĝia sekto. Ili presigas en gazetoj artikolojn pri Dikenz, lia religio, kristnasko kaj La bebo de Betlehemo. Ili diras, ke Dikenz estis

tre religia, ke lia religio estis tute alia ol religio kaj ritoj de piuloj de lia tempo, sed tamen lia religio estis Kristanismo. Alivorte la metodistoj penas pruvi, ke Dikenz estis la sola vera kristano kaj la tiamaj piaj homoj ne estis kristanoj. Tiel artifikas kristanoj kun homoj jam mortintaj. La vero estas, ke la tiamaj piuloj estis la veraj kristanoj, kiuj montris la mensecon produktitan de kristana kredo, kaj Dikenz estis humanisto, kiu en siaj verkoj penis humanigi la kristanajn menson kaj agojn.

*

La vivo por gejunuloj, viroj kaj virinoj estas nuntempe tragedia. Gazetoj penas per ĉiuj talentoj de siaj korespondantoj, per artikoloj kaŭzi panikon en la animo de cerbe nefortaj homoj. De tio profitas religiaj ĉarlatanoj, vidante en tiu stato de homa animo bonegan merkaton por sia komerco. En Japanio, Anglio, Persio, Ameriko aperas homoj, kiuj proklamas sin dioj; ĉie histeriaj homoj de malnovaj kultoj proklamas "reviviĝo de religio" kaj ĉirkaŭe ripetadas la scenojn de primitiva kristanismo kaj de sovaĝuloj de Centra Afriko. La kutimaj rakontoj pri miraklaj kuracoj aŭdiĝas. Esploroj pruvas, ke la kuracitoj estas homoj mense malsanaj. Multaj pastroj vivas pro la ekscito atingita inter histeriuloj aŭ mensaj malsanuloj.

*


En reakciaj gazetoj lastatempe oni multe okupas sin pri Jesuo, metante sur lian kapon kronon kiel al reĝo kaj metante glavon en la manon per kiu li venis ne por paco ktp. Oni planas novajn militojn kaj bezonas la helpon de Jesuo. La "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo), laborista ĵurnalo en Londono, bezonas ankaŭ Jesuon, sed li devas esti laboristo. Do, en tiu ĵurnalo, estas priskribata la juneco de Jesuo, lia hejmo, lia metio, lia ĉirkaŭaĵo ktp. Ni miras, de kie ili ĉerpas tiujn informojn. En la Nova Testamento estas nenio pri tio. Oni devas nur miri ĝis kiu grado laboristaj gvidantoj estas kapablaj skribi sensencaĵojn pri Jesuo, kiam la sola bildo kiun ni havas estas, ke li estis predikanto sur vojoj. La aserto, ke li gajnis sian panon per la ŝvito de sia frunto, estas absurda. Kial do ne bildi lin kiel karbministon, kial ne? Ke ne estis, kie li vagadis, karbminejoj, tute ne gravas por priskribo. Tio igos la historion nur pli mirinda.

*

La faroj de disĉiploj de la afabla Jesuo estas strangaj, speciale de misiistoj. En Koreo, amerika misiisto devis sin prezenti antaŭ tribunalo, ĉar li forte batis korean knabon. La bona kristano trafis la knabon ŝtelanta, krimo kiu feliĉe ne ekzistas en iu kristana lando. Tuj kun la vorto "ŝtelisto" en korea lingvo, la misiisto lokigis pezan frapon sur la vangon de la knabo tiel pruvante, ke dum misiistoj rajtas helpi al aliaj ŝteli de pajenoj, neniu pajeno rajtas ŝteli de misiisto. La koreaj ĵurnaloj postulas, ke tiu misiisto estu forpelata. Kial tia milda puno? Tiu estas taŭga okazo por puno per malliberejo.

*

La angla ĵurnalo "Manchester Guardian" komunikis, ke apud la tombo de mortinta membro de "Kristanaj Spiritualistoj" kunvenis ĉirkaŭ cent amikoj pro memora soleno. Post kelke da mallongaj



laŭdaj paroladoj en kiuj estis asertita, ke la spirito de la mortinto estis videbla inter la ĉeestantoj, multaj fotografiloj klakis por fotografi la spiriton. Ĝis nun neniu gazeto publikigis fotografaĵojn de tiu spirito.

*

Belgrada korespondanto, deziranta esti je la flanko de anĝeloj, skribis en angla ĵurnalo "Spectator": "Se la turkoj postlasis ne multe da materialaĵoj en Belgrado, ili lasis al ĝi teruran moralan heredaĵon de Orienta maldiligenteco, korupto kaj nekapableco." Ĉiu lerneja knabo scias, ke la krucmilitistoj, kiam ili estis en Konstantinopolo, forŝiris la orajn ornamaĵojn de la egipta obelisko kaj detruis multe da monumentoj de la Bizantia epoko, kiujn la turkoj zorge konservadis por estontaj generacioj; ankaŭ, ke Saracenoj instruis al la krucmilitistoj la neceson sin lavi. Ĵurnalistoj suferantaj de religia komplekso devus liberiĝi de ĝi, aliĝante al la Savarmeo aŭ Stambulaj Dervîŝoj, anstataŭ sugesti, ke turkoj ne rajtas esti sur la tero.

*

Antaŭ la enirejo de la katedralo "Sacré Coeur", Parizo, staris la statuo de "Kavaliro de la Barre". Tiu kavaliro estis bruligita pro tio, ke li ne salutis procesion katolikan. Ĉe la statuo okazis multe da grandaj manifestacioj por Libera Penso. Ĉar la statuo ĝenis katolikajn pilgrimantojn, la ekleziuloj petis permeson translokigi ĝin al alia loko, kiun permeson ili ricevis. Kaj tio okazis en distrikto, kie estas socialista plimulto.

## Tra Liberpensa Mondo

"De Daagerad" (la aŭroro), la holanda liberpensa unuiĝo, festis en sia kongreso dum pentekosto en Haarlem la 70-jaran jubileon. Pro tiu okazo K-do *Hoving* la redaktoro de "De Vrijdenker", presigis bonegan verkon "La konflikto inter religio kaj scienco."

Oni festos en aŭgusto en Bruselo la 100-an naskiĝtagon de la famekonata flama poeto *Charles de Coster,* aŭtoro de la fama "Till Ulenspiegel". De Coster estis liberpensulo kaj membro de "Libera Penso" en Bruselo.

La internacia kongreso de la "Fédération des Societés de Libre Pensée" okazos de 3-a ĝis 6-a de septembro en Antverpeno, Belgio.

La 8-an de junio estis "Festo de la Junularo", kiun organizis la liberpensulaj organizaĵoj de Bruselo.

"Freigeist", unuiĝo por Liberpenso en Vieno (Aŭstrio), likvidiĝis pro grupo da anarkiistaj membroj, kiu volis konsideri ĉi societon kiel anarkiista ĉelo.

"Sojuz Bezbojnikov", ateista societo en Sovetio, nombras hodiaŭ 200 000 da membroj. El ili estas 70 000 vilaĝanoj, 80 000 senpartiuloj kaj 40 000 virinoj.

En Ameriko estas fondita Asocio por propagandi Ateismon. Ĝia celo estas forigi kredojn en dio kun ĉiuj formoj de religioj, kiuj sin bazas sur tiu kredo. Ankaŭ ĝia tasko estas liberigi la amerikajn scienculojn kaj ŝtatoficistojn de la neceso patroni religion. La tre konata al niaj membroj 17 jara knabino Queen Silver estas membro de la konsilantaro por Kalifornio. La branĉo de tiu ligo en Los Angeles, kiun ŝi formis, estas nomata "Anĝeloj de Diablo".

*

Estas ĝojiga fakto, ke post la kuniĝo de la du plej grandaj germanaj liberpensulaj organizaĵoj "Gemeinschaft proletarischer Freidenker" kaj "Verein der Freidenker für Feuerbestattung" en la "Verband für Freidenkertum und Feuerbestattung" (Asocio por Libera Penso kaj Kremacio), ankaŭ en Belgio kuniĝis la organizaĵoj "L'Afranchissement", fondita 1854 kaj "Les Solidaires", fondita 1857. Ankaŭ la liberpensula junularo en Germanio, dividita en tri organizaĵoj — monista, liberpensa kaj proletoj liberpensaj — kuniĝis lastan paskon en "Bund freigeistiger Jugend" (Ligo de liberpensa junularo). La delegitaro de ĉi ligo estis fotografita antaŭ preĝejo en Leipzig, kaj pro tio okazis konflikto kun pastro.

## LISTO DE SUBTENANTOJ

*Fröding,* Rockford . . . . . m. dol. 4.—
*Bund prolet. Freidenker,*
Rheinland-Westfalen . . gmk. 10.—
*De Daagerad,* Amsterdam hol. guld. 10.—

## Sonoriloj klakadas ankoraŭ

(Letero el Sovetio.)

En n-o *2* de *"L"* K-do E. E. Y. tute ĝuste diras, ke en Sovetio "la pastraro estas nun pivoto, ĉirkaŭ kiu ariĝas la restintaj blankuloj kaj reakciuloj". Sed, ke la sovetia registaro "uzas la ekleziulojn por kloroformi neklerulojn, kiel registaroj en aliaj landoj," kompreneble, estas erara. Sovetia registaro ja tute bone komprenas rolon de la ĉarlatanoj.

Sed plej notindaj estas la vortoj: "Kamaradoj asertas, ke kun alveno de komunismo aŭ socialismo, religio malaperos. Nenie en Sovetlando faktoj pravigas tiun diron." — Unue, mi devas atentigi, ke fakto de diktatoreco de Proletario en Sovetio, ne signifas atingon de komunismo hodiaŭ. Due, faktoj pruvas, ke la nombro de kredemuloj en Sovetio malpliiĝas kaj konsistas plejparte el gemaljunularo. Religio restas nur kiel tradicio, sen enhavo.

Por ke la religio estu tute forpelita el la cerboj de laborista klaso, "Ligo de Sendiuloj" en Sovetio agadas persiste, kaj kun sukceso. La kapo de la laborista klaso definitive kraĉas sur la fantaziaĵojn kaj tiras la voston for el sub la influo de la hipokrita bando.

Mi gratulas la aŭtoron de la artikolo pro lia maniero prezenti la religian vivon en Sovetio. Traduko de ĝi estis aŭskultita kun intereso de lokaj sendiuloj.

*Sormovo,* Sovetio.

*J. Kokuŝkin.*

★

## GRAVA AL RUSAJ MEMBROJ

Nia antaŭa reprezentanto K-do *Dunajev,* Gubkom Esperantistov, *Leningrad,* Smolnijprospekt 15, kv. 11 estas kvazaŭ mortinta. Plendo post plendo venas, ke membroj sendis al li kotizon. Nenion ni ricevis de *Dunajev.* Jam dufoje ni skribis al li sen sukceso. Li silentas. Ni petas membrojn, kiuj pagis kotizojn de tempo de Leningrada E.-kongreso ĝis nun, ke ili sciigu nin pri tio. La sintenado de *Dunajev* tute ne prosperigas nian movadon en USSR. Krom tio ni urĝe bezonas monon por propagando en liberpensaj rondoj, ankaŭ la presado de nia gazeto kostas multe. Nuna reprezentanto estas: *Leningrad, Fontanka 21, Gubkom Esperantistov, Geo. Teterin.*

Krom tio K-dino *T. Yelland* petas la K-dojn de Sovetio, eltrovi la nomojn kaj adresojn de Kamaradoj, kiuj dum Leningrada kongreso en Liberpensula kunveno donis al ŝi po rublo por aliĝi al la ligo. Ŝia mansako kun adresoj estis ŝtelita kaj malgraŭ anonco en "Sennaciulo" ŝi ankoraŭ ne aŭdis de tiuj du K-doj unu el kiuj estas instruisto. Ŝi ne volas proprigi ilian monon.

## LETERKESTO

**Ariadno.** Loko ne permesas artikolojn pri novaj sociaj teorioj.

**St. Moserov.** Ne taŭgas por L. sed por flugfolio. Poezio ne ĉiam rimas ĝuste. Ĉiam skribu sur nur unu flanko de papero.

## RECENZO

*La Individualisma Socialismo* de D-ro Axel Robertson Proschowsky, eldonita de Rasa Virina Klubo, 1 bis, Rue Coutures St. Gervais, Paris, III. Prezo ne montrita. 15-paĝa broŝureto pri Socialismo kaj Eŭgeniko.

*Internacionalstenografio* de F. de Kunovski, Lübecker Strato 63, Essen-Ruhr, Germanio. Prezo ne montrita. Interesa por studantoj de stenografiaj sistemoj. Kia la titolo, tia la sistemo. *E. E. Y.*

## Landreprezentantoj

*Anglio:* F-ino D. White, 166 Church Rd. Upper Norwood, *London SE 19.*

*Aŭstrio:* E. Hübner, p. Adr. „Freie Weltanschauung" (Max Tonner), *Salzburg,* Fürstenweg 24.

*Belgio:* Jan Jacobs, Boomschen Steenweg 444, *Antwerpen.*

*Blankrusio:* Dim. Snejko, poŝtkesto 33, *Minsk.*

*Ĉekoslovakio:* S-ro Theodor Kilian, Jiráskova 317, *Dolni Kounice.*

*Ĉinio:* Pandiŝo, N.Y.M.S., Lunghwa, *Shanghai.*

*Francio:* Emil Gasse, 15 place Gambetta, *Le Havre.*

*Germanio:* vidu Sekretario (unua paĝo).

*Hispanio:* R. Wood, Breton de los Herreros 7—1° (G), *Barcelona.*

*Hungario:* S-ro Hugai Ferenc, *Gyöngyös.*

*Japanio:* Joshi H. Ishiguro, Koojimachi P. O. Box 1, *Tokio.*

*Nederlando:* C. F. Everts, Vespuccistraat 91, *Amsterdam.*

*Polio:* Jan Zawada, ul. Kröla Lesczerynskiego 36 m. 2, *Lublin.*

*Skotlando:* Thomas Crawford, Kelvinhaugstr. 24, *Glasgow.*

*Svedio:* Einar Adamson, *Göteborg,* Box 73.

*Turkio:* S-ino. T. Yelland 25/37 rue Kerestedje, Pera, *Konstantinople.*

*Ukrainio:* V. Kolĉinski, *Kremenĉug.*

*Usono:* S-ro Karl Fröding, 221, 7th st., *Rockford, Ill.*

*USSR:* Gubkom Esperantistov, Geo. Teterin, *Leningrad,* Fontanka 21.

## ANONCETOJ

Ĉiu membro rajtas unufoje ĉiujare al trilinia anonceto.

*Emil Mai,* Mühlfeldgasse 11, *Gablonz a. N.* (Ĉ. S. R.) deziras korespondadi pri Okultismo, Liberpenso, libera religio kaj similaj temoj.

*Oskar Naumann,* Lange Strasse 43/I, *Pirna* (Germanio). Idealan korespondadon pro eventuala vivkamaradeco kun simpla idealpensanta Kamaradino deziras nedancanta naturamanta 34-jara germanulo.

*Geo. Morozov,* Barak 21 b, kv. 2, *Kandalakŝa* (Murmanskoj j.-d.), deziras korespondadi.


INSTRUISTOJ via gazeto estas INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Gazetabono: 2,50 mk. g.

Kotizo al TAGE: 0,50 mk. g.

Specimenon petu de **M. Goldberg,** Frohburger Str. 68, p., Leipzig S 3 (Germ.)

**Germana Literaturo**

**Liberpensa — Pacifista**

**Socialista — Komunista**

**Sindikata — Vivreforma**

Mi liveras laŭ originalprezoj de la eldonistoj. Poŝtelspezoj estas kalkulataj nur duone. Se vi interesas pri iu ajn literatura fako, vi regule senpage estas informata per prospektoj kaj katalogoj pri la novajoj en via fako.

**Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22, Poŝtĉekkonto 43 808**

**Liberpensaĵojn**

**ĵurnalojn, flugfoliojn, afiŝojn statutojn, fotojn, ilustraĵojn ktp.**

sendu plejeble kun esperanto-traduko. Sendu ankaŭ interesajn novaĵojn eldonitajn de la eklezio en via lando:

Adresu:

**Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22, Poŝtĉekk. 43 808**

Ĉiu *progresemulo* legu la internacian, laboristan, semajnan gazeton

SENNACIULO!

**Enhavo:** Raportoj pri vivo kaj batalo de la Laboristaro en la tuta mondo, seriozaj studoj pri sociaj problemoj, artikoloj pri moroj kaj kutimoj en diversaj landoj, kroniko pri la esperanto-movado, sciigoj pri scienco kaj tekniko, Radio, ateismo, laborista sporto, lingvaj demandoj, ktp., ktp.

—o—

Semajna, 8-paĝa, ilustrita, kun senpaga monata aldono *"La Lernanto"*. La plej malmultekosta esperantogazeto!

—o—

**Abonprezo:** 2¼ germ. markoj en 3 monatoj (membroj de SAT 2 g. m.).

Abonejo: **R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio.**


Eldonejo: Kurt Hubricht, Mariannenstrasse 22, Leipzig O 30 (Germanio). — Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio).